

EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 1

JANUARO-FEBRUARO 1966





Junaj pioniroj prezentas en "RUĜAJ DAŬRIGANTOJ DE LA REVOLUCIO"
(la 6-a parto de la Kolektiva Gimnastika Prezentado en la Dua Tutlanda Sportkunveno).

Foto de Ĝeng Jonggju



Ĉe la Sojlo de 1966

Proksimiĝante al la jaro 1966, ni retrorigardis kun ĝojo la laborojn, kiujn ni faris en la pasinta jaro fervore subtenate de niaj legantoj kaj antaŭen rigardis al la nova jaro en la perspektivo.

Pasintjare, laŭ postuloj de niaj legantoj ni plivastigis la kampon de informado kaj plibonigis la raportadon ĝenerale. Multaj el niaj legantoj skribis ke nia gazeto helpis ilin koni la veran staton de la nova Ĉinio, la agresajn krimagojn de la usona registaro, la mondan situacion en disvolviĝo kaj la opiniojn kaj sintenon de la ĉina popolo pri la aktualaj gravaj internaciaj problemoj. Ili esprimis siajn aprobon kaj laŭdon, kaj esperas, ke nia gazeto sekvos plu tiun ĉi korektan vojon. Pro tia subteno kaj kuraĝigo, ni esprimas niajn elkorajn dankojn.

En la pasinta jaro, nia gazeto spegulis kelkajn flankojn de la disvolviĝantaj aktualaj situacioj en Ĉinio kaj la mondo. Ekzemple, ni raportis pri la nova periodo de la ĉina nacia ekonomio, la nova entuta leviĝo en la produktado de industrio kaj agrokulturo, kaj plia firmiĝo kaj disvolviĝo en la kolektiva ekonomio de la popola komunumo.

En EPC aperis ankaŭ artikoloj pri la novaj sukcesoj en la kampoj de kulturo, arto, medicino, sanprotektado kaj sciencoj en efektivigado de la principo priservi la socialismon kaj la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, kaj pri la nova ĝojinda afero ke multegaj intelektuloj iris en kamparojn kaj sur la montojn, por vivi profunde en la kamparanaj amasoj kaj ilin servi.

Koncerne la internaciajn problemojn, ni raportis pri tio ke en la pasinta jaro, alte tenante la standardon kontraŭ-imperiisman, la ĉina popolo daŭre subtenis la revoluciajn batalojn de la subpremataj popoloj kaj nacioj, pri ĝiaj starpunktoj kaj principo en opono kontraŭ la agresiva politiko de la usona imperiismo kaj pri ĝia firma volo decideme subteni la vjetnaman popolon en ĝia batalado kontraŭ la usona imperiismo por savi la patrolandon. Krome, ni raportis ke la agresaj krimagoj de la usona registaro jam renkontis oponadon de ĉiuj popoloj de la mondo, kaj ke eĉ la usona popolo leviĝis amase por oponi kontraŭ la agresiva kaj milita politiko de la Johnson-registaro.

La ŝanĝiĝo de la ĉina situacio, laŭ nia opinio, rezultas el tio, ke sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, ĉiuj nacioj de Ĉinio pene luktas kontraŭ malfaciloj sin apogante sur la propraj fortoj. La spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj strebado por prosperiĝo tralinas la ŝtatan ekonomian planon kaj la produktan laboron de ĉiu laboristo kaj ĉiu komunumano. Ankaŭ la defenda forto de Ĉinio pli kaj pli grandiĝas dank' al kuraĝigo de tiu spirito.

Alia grava faktoro estas tio, ke la socialisma konscio de la vasta popolamaso de Ĉinio altiĝis senprecedence kaj pli kaj pli multe da homoj kunligis siajn ĉiutagajn laborojn kaj studojn kun la servado al la popolo kaj kun la granda celo de la revolucio. La penso ke "ĉiuj laboroj estas por la revolucio" ĉiam pli profundigis en la koron de la popolanoj. Ĉiuj homoj, ĉu laboristoj ĉu kamparanoj, ĉu komercaj laborantoj ĉu batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, rigardas sian laboron kiel parton de la tuta laboro de socialisma revolucio. Tial en nia lando ĉie regas revolucia etoso vigla kaj energia.

La ŝanĝiĝo de la monda situacio montras, ke la agresiva kaj milita politikoj de la usona imperiismo jam fariĝis pli kaj pli antipatiaj al la popolo. Sed la usona imperiismo ne volonte haltos post siaj malsukcesoj, kaj nun per ĉiuj fortoj klopodas flegi kaj revivigi la japanan militarismon, kaj sin okupas pri ekspedo de trupoj por disetendi la militon en la tutan Azion. La agresiva agado de la usona imperiismo estas oponata de ĉiam pli multe da popolanoj de Usono kaj la aliaj landoj de la mondo. Kune kun ĉiuj aliaj popoloj, la ĉina popolo pli akriĝos sian atenton kaj klopodos por malhelpi ĝian agreson.

En la nova jaro, ni daŭre raportados al nia legantaro la novajn progresojn de Ĉinio inkluzive de atingajoj akiritaj en la efektivigado de la Tria Kvinjara Plano por disvolvi la nacian ekonomion, novaj fruktoj rikoltitaj en la revolucio de kulturo kaj arto kaj la kreskado de novaj moroj kaj kutimoj de la popolamaso.

Samtempe, ni daŭre informos niajn legantojn ankaŭ pri la klopodoj de la ĉina popolo por oponi la usonan imperiismon kaj defendi la mondpacon, la pliapaŝa disvolviĝo de la revolucia batalado de la subpremataj popoloj kaj nacioj en la mondo kaj ilia pli granda venko en la batalo kontraŭ la usona imperiismo. Daŭre plibonigos nia informado kaj la gazeto pli multe kontentigos la bezonon de nia vasta legantaro.

La Red.


NOVA HINGIANG

EN

PROSPE-

RIGÔ

ĜENGHIN



Multaj el la ŝafinoj paŝataj de Abudeĥalan, kazaĥo, tutlanda labor-modelo, naskis ĝemelojn. La foto montras ke li nutras la ŝafidojn per lakto.

LA 1-an de okt., 1965 estis la 10-a datreveno de la fondiĝo de la Hingianga Ujgura Aŭtonoma Regiono. Tiutage, en la ĉefurbo Urumĉi kaj aliaj urboj okazis grandaj celebradoj por samtempe soleni la 16-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono.

Dum la pasintaj dek jaroj depost la fondiĝo de la Hingianga Ujgura Aŭtonoma Regiono, gigantaj sukcesoj estis atingitaj en la socialisma

revolucio kaj socialisma konstruado de tiu regiono. La unuiĝo de la nacioj solidiĝis, la socia sistemo de klasa ekspluatado malamegata de la laborantaj popolanoj de ĉiuj nacioj aboliĝis, la socialisma socisistemo aspirata de ĉiuj nacioj estis starigita kaj firmigita, rapide disvolviĝas la industrio, agrokulturo, bestobredo, komunikado kaj transporto, kulturo kaj eduko, medicino kaj sanprotektado, fizika kulturo, kaj la materia kaj kultura vivo de ĉiuj nacioj multe pliboniĝis.

Hingiang, situanta en la nordokcidenta parto de nia lando, kun areo de 1,650,000 kvadrataj kilometroj, okupas ĉ. sesonon el la totala areo de Ĉinio. Ĉi tie, kuŝas la ĉiam neĝkovrataj montaroj Kara Kunlun, Kunlun, Tianŝan kaj Altaj, kaj Turfan-baseno, unu el la plej malaltaj basenoj en la mondo. En tiu ĉi vasta regiono, troviĝas ankaŭ fekundaj ebenegoj, grandspacaj paŝtejoj, densaj arbaroj kaj riĉaj fontoj de diversaj mineraloj. Sed antaŭ la Liberiĝo, Hingiang estis tiel malriĉa kaj postiĝinta ke tie troviĝis nenia moderna industrio, neniu institucio de scienca esplorado, kaj neniu metro da fervojo. Ĝiaj kelkaj ŝoseoj restis longe neriparitaj, ĝiaj agrokulturo kaj bestobredado baraktis en agonio. En tiu tempo Hingiang vivis en grandaj malfaciloj kaj dronis en stagno, pro subfosado, ekspluato kaj prirabo de la imperiistoj, pro klasaj ekspluato kaj subpremo interne de la nacioj, kaj pro la regado de Kuomintang-reakciularo.

Post la Liberiĝo, la mallumo kaj mizero de la popola vivo finiĝis por ĉiam. Hingiang vekigis post dormo dum centoj da jaroj. Sub la gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, tie estiĝis tre profunda kaj historia ŝanĝiĝo. Nun, tie konstruiĝis ferŝtala, petrola, karba, elektrenergia, maŝinfabrika, kemia, konstru-materiala, ŝpinteksa, sukerrafina, paperfara kaj aliaj modernaj industrioj. La specoj de ĝiaj industriaj produktaĵoj plimultiĝis de 11 en 1949 ĝis ĉ. 2000 nuntempe. La Lanĝou-Hingiang Fervojo sin etendis ĝis Urumĉi, kaj finis la senfervojecon de Hingiang. Kaj



Angulo de laborejo de la "Juli-unua" Koton-ŝpinteksa Fabriko en Hingiang.

fundamente formiĝis transporta reto ĉefe el moderna trafiko de fervojo, aŭtovojo kaj civila aviado kun Urumĉi kiel la centro, kunliganta la urbojn kaj kamparon. Post la Liberiĝo la areo de la nove kulturitaj kampoj en Hingiang estas multe pli vasta ol tiu de la kampoj kulturitaj dum generacioj antaŭ la Liberiĝo. Ankaŭ grandan disvolviĝon ricevis la akvoutiliga afero en agrokulturo. Nun la totala kvanto de greno, kotona kaj olea produktoj



Diversnaciaj popoloj en Hingiang aĉetas necesajojn en la ŝtata magazeno.

de Hingiang pooble pligrandiĝis en komparo kun tiu en 1949 antaŭ la Liberiĝo, kaj la totala nombro de brutoj kreskis je pli ol unu oblo ol antaŭ la Liberiĝo. La socia aĉetpovo preskaŭ duoble pliiĝis jam en 1964 kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Granda disvolviĝo estis atingita ankaŭ en la aferoj de kulturo kaj edukado. Nun Hingiang havas jam 9 altajn lernejojn, pli ol 600 mezlernejojn kaj pli ol 5000 elementajn lernejojn. Kelkdekoble pliiĝis la hospitaloj, kuracejoj, malsanulaj litoj kaj medicinaj laborantoj ol antaŭ la Liberiĝo.


Hingiang estas multnacia regiono de Ĉinio. Tie loĝas ujguroj, kazaĥoj, hanoj, hujoj, ĥalĥazoj, mongoloj k. a. sume 13 nacioj. En la 16 jaroj post la Liberiĝo, precipe en la 10 jaroj post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono, sub la gvido de la Partio kaj la Registaro de la regiono, ĉiuj nacioj de Hingiang efektivigis sian nacian regionan aŭtonomecon, tiel ke plene garantiata estas la rajto de tiuj nacioj pri direktado de siaj propraj aferoj, efike forigita estas la malsolidareco inter la nacioj postlasita de la pasinteco, kaj plifirmigita estas ilia unuiĝo. Prezidanto Maŭ diris: "Nacia batalo, analizite ĝisfine, estas problemo de klasa batalo." Tio ĉi estas marksism-leninisma principo por observi kaj pritrakti la problemon de nacioj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, la nacioj en Hingiang nuligis la ekspluatadon kaj subpremadon de klaso al klaso,

efektivigis socialisman socisistemon, kaj elhakis larĝan vojon al komunaj prospero kaj disvolviĝo por ĉiuj nacioj en Hingiang.

En la pasintaj 16 jaroj, estiĝis en la regiono de Hingiang vicoj da kadroj komunismaj el ĉiuj nacioj. Dank' al kulturado de la Partio, la nacimalplimultaj kadroj plimultiĝis de ĉ. 3000 personoj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis pli ol 106,000 personoj, t. e. 2.5 obloj de tiuj ĉe la fondiĝo de la aŭtonoma regiono. En diversgradaj partikomitatoj kaj registaroj de la aŭtonoma regiono kaj ĉiuj organoj de ekonomio, kulturo k. a. laboras nun kadroj el la nacimalplimultoj kiel gvidantaj funkciuloj. Multaj bonegaj naciaj kadroj partoprenas ankaŭ la gvidajn laborojn de la partikomitatoj de popolaj komunumoj, gubernioj, regiono k. c. El la membroj de la diversgradaj partiaj komitatoj de tiu regiono, 67 procentoj estas kadroj el diversaj nacimalplimultoj. Ili jam spertis diversajn malfacilojn, kaj pruviĝis tra hardo kaj elprovoj ke ili estas batalantoj tutkore servantaj al la proleta revolucio kaj fidindaj fortoj por gvidi kaj unuigi la naciojn en Hingiang por marŝi antaŭen de venko al venko.


Kolosa ŝanĝo okazis en la sferoj de politiko, ekonomio, kulturo kaj la natura fizionomio de Hingiang. La malnova Hingiang, mizera, postrestinta kaj feŭdisma jam sin transformis en tute novan socialisman Hingiang ĉiam pli prosperiĝantan.

Kujtun, nova urbo konstruita de la Korpuso por Produktado kaj Konstruado en Gobi-dezerto.





Prezidanto Maŭ Zedong, Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj aliaj gvidantoj de la partio kaj la ŝtato kun junaj geamikoj el Japanio.



AMIKECO

inter Ĉinaj kaj Japanaj Junuloj

de Ĵurnalisto de Qingnian-bao

PLI ol unu monaton daŭris en Ĉinio la Festivalo de Amikeco inter Junuloj de Ĉinio kaj Japanio.

La granda amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj estas nerompebla. Kiel alegorion pri tio iu japana amiko citis la jenan version de Li Baj, poeto de la ĉina antikveco: "Mi glave batis akvon bari, sed ĝi ree fluas."

AMIKOJ DE LA SAMA BATALFRONTO

Ekde la mezo de aŭgusto, 1965, junaj japanaj geamikoj venis al nia lando en grupoj unu post alia. Ili venis al Pekino kaj poste iris laŭ tri vojlinioj al la

Sudo, Nordoriento kaj Nordokcidento de Ĉinio, farante vizitojn al dekkelkaj urboj kaj famaj pitoreskejoj, ĉiu el ili iris dekmil liojn da vojo. Tio estas longmarŝa parado de intima solidareco inter la ĉinaj kaj japanaj gejunuloj, longmarŝa manifestacio de ĉinaj kaj japanaj gejunuloj en kunagado kontraŭ la komuna malamiko, nome la usona imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj!

Baldaŭ post kiam miliono da pekinaj gejunuloj febre bonvenigis la amikojn el Japanio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis aŭdiencon al ili persone kaj esprimis sian bonvenigon. Ekvidinte Prezidanton Maŭ, multaj japanaj amikoj ege ekscitiĝis kaj kriis en la ĉina lingvo: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Multaj el ili

diris: "Hodiaŭ estas tago neforgesebla por mi dum la tuta vivo!"

La varma akceptado fare de la gejunuloj kaj aliaj popolanoj en Ŝenjang tiel ekscitis niajn japanajn amikojn ke la lastaj eĉ endormiĝi ne povis. En Hian, kilometrojn longaj vicoj de popolamasoj ilin bonvenigis. Tio montris ke la popolo de tiu antikva urbo havinta komunikiĝon de kulturo kun la japana popolo jam antaŭ pli ol du mil jaroj, ĉiam alte taksas la fajrerojn de amikeco al la japana popolo. Kiam ili atingis Vuhan ili estis varme bonvenigataj de la tiea popolo. Ĝuste kiel la japana amiko Kafuku Ŝigeharu diris: "La vetero de Vuhan estas tre varma, sed la amikeco de la popolo de Vuhan estas pli varma!" Kiam ili alvenis al Ĉangŝa, ili renkontis tie inter la bonvenigantoj maljunulojn kun bastono en mano kaj patrinojn kun infano en la brakoj. Kiam ili forlasis Nankinon, iu grupestro de la Jingfang-a komunumo kaj lia familio kune piedirinte kelkdek liojn da vojo venis al la stacidomo por ilin adiaŭi kaj donaci al ili lun-kukojn por la Aŭtunmeza Festo!

Kial la ĉina popolo havas tian profundan amikecon por la japanaj gejunuloj? Ĉar la vastaj amasoj de japana junularo estas niaj amikoj sur la sama batalfronto. En Ĉinio, la junuloj kaj la maljunuloj eĉ pli klare scias ke la popoloj de Ĉinio kaj Japanio havas inter si komunikon kaj amikecon dum la longa pasinteco de du mil jaroj. Koncerne la agresan militon kiun la japanaj militaristoj lanĉis kontraŭ Ĉinio antaŭ 20 jaroj en servo al sia monopola burĝaro, la japanaj popolo kaj junularo havas nenian respondecon pri ĝi.


Ĝuste pro tio japana fraŭlino Fuzivara Masako atinginte Ĉinion diris al siaj ĉinaj amikoj: "Mia patro venis siatempe al Ĉinio por partopreni la agresan militon kontraŭ Ĉinio, sed mi venas nun al Ĉinio por disvolvi amikecon. Kiam mi reiros en mian landon mi certe klopodos per ĉiuj fortoj malhelpi reviviĝon de la japana militarismo!" Brave! Kara amikino, ni komprenas vin! Ni akceptis vin kiel suferanton de la agresita milito similan al ni!

Ŝenjang estas urbo kiu suferis plej longan kaj plej profundan agreson kaj subpremadon de la japanaj militaristoj. Sed same kiel ĝiaj gejunuloj tiel ankaŭ ĝiaj plenaĝuloj kaj maljunuloj faris varman akcepton al la japanaj geamikoj! Tio pli multe ekscitis la japanajn geamikojn. Oba Kazuo diris al siaj ĉinaj amikoj apudstarantaj: "Via bonvenigo montris al ni, ke estas tre vasta kaj profunda kompreno ĉe la ĉina popolo rilate la kaŭzon kial oni diferencigas la japanajn militaristojn de la japana popolo!"


NOVA TAJDO DE LA KOMUNA Batalo

En la tagoj de la Festivalo, la gejunuloj de ambaŭ landoj, starante en la pozicio de la du popoloj, bone konis sian komunan malamikon kaj konsiderante pri la estontaj bataltaskoj pli profundigis sian amikecon de kunbatalantoj.

En Jan-an, la junaj japanaj amikoj per siaj propraj okuloj vidis kiel la pli ol 300 reprezentantoj de la japana



Japanaj gejunuloj revenas de la vizito al la antaŭa Japana Laborigista-kampana Lernejo apud la Pagoda Monto en Jan-an.



Ekskurso sur la Ĉina Murego.

popolo, kun Nozaka Sanzo kiel la ĉefo, vivis dum la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio tra la malfacilaj jaroj, ili loĝis en kaverndomoj, manĝis miliaĵoj kaj sin vestis per kruda vesto same kiel la ĉinaj kamaradoj. Multaj el ili iris sur la fronton kune kun batalantoj de la Okavoja Armeo, alparolis japanajn soldatojn kaj sangbatalis, ŝultron ĉe ŝultra kun la ĉinaj armeanoj, kontraŭ la japanaj militaristoj.

La japanaj geamikoj iris ankaŭ al Janggialing en Jan-an, kie ili vizitis la halon de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio dum la Rezistmilito. Antaŭ pli ol 20 jaroj, tie ĉi, Nozaka Sanzo faris sian raporton "Konstrui Demokratian Japanion". Dum la pasintaj 20 jaroj, la japana popolo faris heroan lukton por oponi la usonan imperiismon kaj konstrui Japanion en landon sendependan, demokratian, pacan kaj neŭtralan, kaj tiu ĉi lukto iras nun senĉese de venko al venko!

En la kunveno de la CK de KPĈ en Zauĵuan (la Ĝardeno de Jujuboj), niaj japanaj amikoj havis parolojn kun veteranoj el la Ruĝa Armeo. Dum ripozo, la amikoj de ambaŭ landoj intime babilis. Iu ĉina junulo diris: "En sia versaĵo, nia fama poeto Ge Biĝoŭ diris: "Trinkinte la akvon el Jan-rivero, oni neniam forgesos sian devenon kien ajn li iros...". Ĉe tio iu japana amiko tuj demandis lin: "Ĉu la akvo kiun ni nun trinkas estas el Jan-rivero?" Ekaŭdinte "Jes", ĉiuj japanaj amikoj levis siajn tasojn kaj diris: "Eltrinku la tason da akvo el Jan-rivero, por la sendependeco kaj demokratio de Japanio!"

Dum multaj okazoj de la ĝojaj renkontiĝoj kaj intimaj konversacioj, la japanaj geamikoj ĉiuj preparolis al siaj ĉinaj geamikoj la krimagojn faritajn de la usona



La virina teamo formita de ĉinaj kaj japanaj knabinoj ŝnurtiregas en la sporta festivalo.



Ĉinaj kaj japanaj gejunuloj reciprokas memorigajn aŭto-grafojn ĉe la pinarbido de amikeco.

imperiismo en Japanio. Aŭskultinte la akuzon de la japanaj amikoj kontraŭ la usona imperiismo, junuloj de Ŝanhajo fingre montris la bordon de Huangpu-rivero ekster la fenestro kaj diris: "Antaŭ 16 jaroj, tie ankris militŝipoj de Usono kaj krimagis usonaj marsoldatoj. Tiuj barbaraj agresantoj sovaĝis sur la ĉina tero. Estis tiu usona imperiismo kiu donis apogon al la ĉinaj reaktiuloj en subpremado al la ĉina popolo!" Jes, hodiaŭ, ĝuste tiu sama usona imperiismo perforte okupas la insularon Okinava de Japanio kaj la ĉinan teritorion Tajvan, kaj ĉiam pli sovaĝe krimagas en diversaj lokoj tra la mondo kiel fiĝendarmo!

Parolante pri la usona imperiismo, la gejunuloj de ambaŭ landoj ĉiuj sentas intimecon de batalamikoj kun la sama batalcelo. En la vespero de la 14-a de septembro, la japanaj amikoj manifestaciis en Ŝanhajo por oponi kontraŭ la "Japani-Sud-koreian Kontrakton". Ankaŭ 5000 ĉinaj gejunuloj partoprenis la manifestacion, levante la komunan batalon al nova alta tajdo en kiu marŝas antaŭen ŝultron ĉe ŝultro la gejunuloj de ambaŭ landoj.

ĈIAM LERNI RECIPROKE

Dum la Festivalo, la japanaj amikoj ĉiam modeste diris: "Alveninte al Ĉinio ni multon lernis." Sed ankaŭ

la ĉinaj junuloj multon lernis de la japanaj amikoj. Ilia heroa batalspirito, interalie, kunportita el batalfronto de Japanio kontraŭ la usona imperiismo forte kuraĝigis la ĉinajn junulojn. Ĉiu junulo de Ĉinio bone scias ke la amikoj, kiuj venis al Ĉinio de malproksime tenante alte la standardon de Japanio-Ĉinia amikeco, ja luktis en sia lando tra malfaciloj. Kiam niaj japanaj amikoj faris senvoĉan sidadon sur la stratoj de Tokio, ni salutis ilin de la alia bordo trans la vasta oceano! Kiam ni aŭdis ke iuj amikoj estis persekutataj pro vizito al Ĉinio, senliman indignon ni sentis. La klopodoj faritaj de la japanaj junuloj por ke la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj daŭru de generacio al generacio profunde nin kortuŝis! Ĝuste kiel diris nia japana amiko: "Estas forta bato por la usona imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj ke ni sukcesis veni al Ĉinio kaj renkontiĝi kun la ĉina junularo."

Plenan sukceson rikoltis la Festivalo de Amikeco inter Junuloj de Ĉinio kaj Japanio. Ili decidis firme tenadi la amikecon generacion post generacio. Ĉifoje la ĉina popolo akceptis 300 amikojn el Japanio, kaj estonte ni akceptos senĉese ankoraŭ pli multe da japanaj amikoj!



Varma amikeco.

La Petrola Industrio de Ĉinio Pasinta kaj Nuntempa

Antaŭ du jaroj, kiam Ĉinio unuafoje deklaris ke la petrolo enlande produktita jam fundamente sufiĉas por ĝia uzo, la aŭtoritatoj de multaj landoj ege miris pri tio. Sed en la lastaj du jaroj, la petrola industrio de Ĉinio ricevis novan disvolviĝon, rimarkinde plimultigis la specojn kaj kvanton de siaj petrolaj produktaĵoj kaj oni ankaŭ kreis novajn teknikojn de avangarda nivelo de la mondo. Tio ĉi estas brila venko de la nova Ĉinio en konstruado de socialismo laŭ la principo sin apogi sur la propraj fortoj.

Petrolo estas grava materialo nemalhavebla en la konstruado de modernaj industrio, agrokulturo, nacidefendo kaj en disvolvado de modernaj scienco kaj tekniko. Sed tre postrestis la industrio de petrolo en la malnova Ĉinio, tiam la enlande bezonataj benzino, keroseno, dizeloleo, lubrikoleo, eĉ bitumo por pavimado estis preskaŭ tute importitaj el eksterlando. Tiutempe en la urboj kaj kamparoj de Ĉinio estis merkato por konkura vendado de petrolo fare de ĉiuj imperiismaj landoj. Sole en 1947, la importokvanto de petrolo jam atingis 1,970,000 tunojn kaj okupis la trian lokon inter la importitaj materialoj de tiu jaro. Laŭ la statistiko, dum 42 jaroj de 1907 ĝis 1948, la profito akirita nure de la usonaj *Standard Oil Company of New York, Texas Corporation (Texaco)* kaj la brita *Asiatic Petroleum Company* el la malnova Ĉinio jam egalvaloris 2,800,000 traktorojn. La petrola merkato en la malnova Ĉinio estis tute metata sub la absoluta superego de la petrolaj vampiroj kun la usona imperiismo kiel la ĉefo. Estis tiam 366 benzin-stacioj tra la tuta lando, sed 97% el ili apartenis al la imperiismaj landoj de Usono, Britio, Nederlando k. a.

Kun intenco strangoli la petrol-industrion de Ĉinio, longe monopoligi petrolon en la ĉina merkato, kaj akiri grandan profiton, la imperiistoj senĉese distrumpetis senhontajn babilaĉojn pri la “malabundeco de petrolo”, “malhavo de petrolo

de Ĉinio”. Ekzemple, la prezidanto de la nomita *Texaco* de Usono, *W.S.S. Rodgers*, skribis en sia libro *La Disvolviĝo de Usonaj Industrioj* (1946) ke granda parto de Ĉinio estas preskaŭ sen petrolo. Kaj iuj usonaj “specialistoj” kiuj venis en Ĉinion por “esplorado” de petrolo ludis la saman arion pri “malabundeco de petrolo”. Eĉ en 1950, la libro *Petroleum Facts and Figures* eldonita en Usono tiel montris ke Ĉinio estas lando kiu prezentas plej malgrandan perspektivon je provizo de petrolo.

La ĉefa kaŭzo kial la petrola industrio de la malnova Ĉinio ne havis eblon sin disvolvi kuŝis en tio, ke la tiama Ĉinio estis duonfeŭda kaj duonkolonia lando subpremata de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Nur de post kiam la ĉina popolo forpelis la imperiisman forton, renversis la kriman regadon de la Ĉiang Kajŝek-reakciularo, kaj starigis la ŝtatan reĝimon kun la popolo kiel ĝia mastro, nia petrola industrio tiom prospere disvolviĝis.

Dum la pasintaj 16 jaroj, la nova Ĉinio ĉiam tenis la petrol-esploradon sur la unua loko grava en la disvolvado de la petrola industrio, kaj laŭ la konkretaj kondiĉoj de la geologia konsisto, tekniko kaj ekonomio en nia lando, oni kreis, paŝon post paŝo, serion da novaj procedoj kaj metodoj de geologia esplorado, entreprenis grandajn laborojn por serĉi petrolon en diversaj lokoj, kaj trovis petrolgasajn kampojn dekkelkoble pli multajn ol tiujn trovitajn en la malnova Ĉinio, kaj impete grandigis la ciferon de la jam sciita petrola riĉfonto de Ĉinio. Kaj tio donis solidan kaj realan bazon de materia fonto al rapida leviĝo en produktado de kruda petrolo de nia lando. Fine de la periodo de la Unua Kvinjara Plano la kruda petrolo jam pli ol trioble superis la kvanton plej grandan kiun la malnova Ĉinio produktis en 1943. Kaj ekde tiam ĝis nun, la produktokvanto de kruda petrolo de Ĉinio pli grandigis kaj superis la difinitajn ciferojn de la ŝtata plano en ĉiu jaro.

En la malnova Ĉinio oni klopodis dum 42 jaroj por la konstruado de petrola industrio, sed oni povis produkti nur 9 specojn de ordinaraj petrolaĵoj. Nun en la nova Ĉinio, oni jam povas produkti centojn da petrospecoj post nur 15 jaroj. Kiel ĉiuj scias, la prilaboraj teknikoj de petrolo en la antaŭa Ĉinio estis treege postrestintaj, estis tre malfacile por ĝi realigi al si la memprovizon de diversaj petroloj. Sed la petrolaj laboristoj de Ĉinio ne subigis sin antaŭ la malfaciloj, male, sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ili disvolvis la revolucian spiriton kuraĝe pensi kaj agi, alprenis la labormetodon de kooperado de gvidantoj, teknikistoj kaj laboristoj. En la produktado, oni faris ripetajn sciencajn eksperimentojn, mastris modernan teknikon de petrola rafinado, sukcese provfaris pogrande diversajn petrolaĵojn, kiujn oni ne povis produkti antaŭe, kaj levis la rafinan teknikon de Ĉinio al nova, pli alta nivelo. Nun Ĉinio povas produkti ne nur diversajn specojn de ordinaraj benzino, keroseno, dizeloleo kaj lubrikoleo, uzataj por veturiloj, ŝipoj kaj maŝinaj ekipaĵoj, sed ankaŭ multajn specojn de altrangaj petroloj. Multaj petrolaĵoj, kiujn oni devis importi en la pasinteco, nun povas esti produktiaj pogrande en Ĉinio.


Dum la produktado de kruda petrolo kaj diversaj petrolaĵoj rapide disvolviĝis, novaj modernaj petrolaj kampoj kaj rafinejoj estas konstruitaj en diversaj lokoj de nia lando. La vaste konata

Petrola Kampo de Daking estas unu el ili. Same kiel la aliaj novaj petrolaj rafinejoj konstruitaj dum la lastaj jaroj, tiu ĉi petrola kampo estas projektita kaj konstruita de ĉinaj propraj teknikistoj kaj laboristoj, kaj la konstrua kvalito kaj projekta nivelo povas bone plenumi la bezonojn de moderna produktado de petrolo.

En la malnova Ĉinio, preskaŭ ĉiuj ekipaĵoj kaj materialoj bezonataj de la petrola industrio devis esti importitaj el eksterlando. Sekve de la disvolviĝo de la metalurgia kaj mekanika industrioj post la Liberiĝo, serio da maŝinfabrikejoj, kiuj speciale aŭ krome funkcias por la fabrikado de petrolaj ekipaĵoj, jam estas konstruitaj paŝpostpaŝe. La specoj kaj kvalitoj de iliaj produktaĵoj estas en rapida progresado. Nuntempe, Ĉinio jam povas amase produkti ĉefajn ekipaĵojn de geologia esplorado, putoborado, ekspluatado, rafinado kaj multajn precizajn instrumentojn kaj aparatojn, kiuj povas kontentigi la bezonojn de produktado kaj konstruado de la petrola industrio.

La fakto de la rapida disvolviĝo de la ĉina petrola industrio konvinke montras, ke sub la ĝusta gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina popolo povas memstare disvolvi sian petrol-industrion sin apogante ĉefe sur la homaj, materiaj kaj financaj fortoj de sia propra lando kaj ebligi la ĉinan petrolan industrion iri sur la vojno de vera prospero.

Angulo de la Lanĝoŭ-a Petrola Rafinejo. Dum la pasintaj 5 jaroj, instaligis en ĝi multe da novaj instalaĵoj projektitaj kaj faritaj de Ĉinio mem.




Nova Fizionomio de Hingiang



Novaj fabrikoj en izola valo

Nova ekipajo de la oleo-rafinejo en Duŝanzi

Foto de Ŝi Ŝaŭhu



En la malnova Ĉinio oni klopodis dum 42 jaroj por la konstruado de petrola industrio, sed oni povis produkti nur 9 specojn de ordinaraj petrolaĵoj. Nun en la nova Ĉinio, oni jam povas produkti centojn da petrospecoj post nur 15 jaroj. Kiel ĉiuj scias, la prilaboraj teknikoj de petrolo en la antaŭa Ĉinio estis treege postrestintaj, estis tre malfacile por ĝi realigi al si la memprovizon de diversaj petroloj. Sed la petrolaj laboristoj de Ĉinio ne subigis sin antaŭ la malfaciloj, male, sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ili disvolvis la revolucionan spiriton kuraĝe pensi kaj agi, alprenis la labormetodon de kooperado de gvidantoj, teknikistoj kaj laboristoj. En la produktado, oni faris ripetajn sciencajn eksperimentojn, mastris modernan teknikon de petrola rafinado, sukcese provfaris pogrande diversajn petrolaĵojn, kiujn oni ne povis produkti antaŭe, kaj levis la rafinan teknikon de Ĉinio al nova, pli alta nivelo. Nun Ĉinio povas produkti ne nur diversajn specojn de ordinaraj benzino, keroseno, dizeloleo kaj lubrikoleo, uzataj por veturiloj, ŝipoj kaj maŝinaj ekipaĵoj, sed ankaŭ multajn specojn de altrangaj petroloj. Multaj petrolaĵoj, kiujn oni devis importi en la pasinteco, nun povas esti produktiaj pogrande en Ĉinio.


Dum la produktado de kruda petrolo kaj diversaj petrolaĵoj rapide disvolviĝis, novaj modernaj petrolaj kampoj kaj rafinejoj estas konstruitaj en diversaj lokoj de nia lando. La vaste konata


Petrola Kampo de Daking estas unu el ili. Same kiel la aliaj novaj petrolaj rafinejoj konstruitaj dum la lastaj jaroj, tiu ĉi petrola kampo estas projektita kaj konstruita de ĉinaj propraj teknikistoj kaj laboristoj, kaj la konstrua kvalito kaj projekta nivelo povas bone plenumi la bezonojn de moderna produktado de petrolo.

En la malnova Ĉinio, preskaŭ ĉiuj ekipaĵoj kaj materialoj bezonataj de la petrola industrio devis esti importitaj el eksterlando. Sekve de la disvolviĝo de la metalurgia kaj mekanika industrioj post la Liberiĝo, serio da maŝinaj fabrikoj, kiuj speciale aŭ krome funkcias por la fabrikado de petrolaj ekipaĵoj, jam estas konstruitaj paŝopostpaŝe. La specoj kaj kvalitoj de iliaj produktaĵoj estas en rapida progresado. Nuntempe, Ĉinio jam povas amase produkti ĉefajn ekipaĵojn de geologia esplorado, putoborado, ekspluatado, rafinado kaj multajn precizajn instrumentojn kaj aparatojn, kiuj povas kontentigi la bezonojn de produktado kaj konstruado de la petrola industrio.

La fakto de la rapida disvolviĝo de la ĉina petrola industrio konvinke montras, ke sub la ĝusta gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina popolo povas memstare disvolvi sian petrol-industrion sin apogante ĉefe sur la homaj, materiaj kaj financaj fortoj de sia propra lando kaj ebligi la ĉinan petrolan industrion iri sur la vojno de vera prospero.

Angulo de la Langŝou-a Petrola Rafinejo. Dum la pasintaj 5 jaroj, instaligis en ĝi multe da novaj instalaĵoj projektitaj kaj faritaj de Ĉinio mem.





Maturiĝis la melonoj (en Turfan).

Foto de Ŝi Ŝaŭhua



Paŝtejo en la Jili-a Kazaha Aŭtonoma Subregiono

Foto de Ŝi Ŝaŭhua






Intima babilo
Je Ĝikiang (meze), hano,
vicestro de Fuhaj-gubernio,
gastas ĉe la paŝtista familio de
la Taramae-komunumo.
Foto de Ŝi Saŭhua

La Karamai-petrolmineja
Ensemblo prezentas por
la putoboristoj.
Foto de Ŝi Saŭhua



Multe da nova kotono
al fabriko.



ĈEN ĴIBIAŬ:

Kaj Greno kaj Kotonono

Kidong-gubernio lokiĝas ĉe la norda flanko de la enfluejo de Jangzi-rivero en Giangsu-provinco. En la pasinteco tiu ĉi gubernio estis unu el la famaj koton-produktaj regionoj en Ĉinio, sed ĝia bezonata greno estis provizita ĉefe de aliaj lokoj. Lastatempe tiu stato jam tute ŝanĝiĝis. En la jaro 1964, la loĝantoj en tiu ĉi gubernio akiris ne nur daŭran riĉan rikolton de kotonono, sed ankaŭ riĉan rikolton de greno. Krom 38,250 tunojn da sensemigita kotonono, ili vendis al la ŝtato ankaŭ 28,250 tunojn da superflua greno.

PRODUKTI KAJ KOTONON KAJ GRENON

Samtempa produktado de kotonono kaj greno estis multjara deziro de la loĝantoj en Kidong. Antaŭ la jaro 1959, al tiu ĉi gubernio la ŝtato devis provizi ĉiujare ĉirkaŭ 50 milionojn da kilogramoj de greno. Depost 1960, samtempe kun pliproduktado de kotonono la loĝantoj akiris ankaŭ pliproduktadon de greno dum la lastaj sinsekvaj jaroj. Sed la produktokvanto ankoraŭ ne sufiĉis por kontentigi la bezonon de la loĝantoj kaj la landa konstruado. La loĝantoj en Kidong decidis sin puŝi antaŭen.

La komunumanoj diris: “La ŝtato subtenas nian agrikulturan produktadon per ĥemi-sterko, agrikulturaj medikamentoj, maŝinoj, ŝtalaj stangoj, cemento, ktp., ni do devas pliprodukti grenon kaj kotonon por subteni la landan konstruadon.”

Kaj la gvidantoj de Kidong-gubernio ĉiumaniere subtenis ilian decidon. En 1963, ili trovis modelajn grupojn de alta produkto de greno kaj kotonono en la gubernio, resumis ilian sperton kaj pluapase firmigis la fidon de la vasta amaso pri efektivigo de riĉa rikolto de greno kaj kotonono. Ni citu ĉi tie la vortojn de unu el la produkto-grupes-troj de Hiŝi-komunumo: “Ni estas homoj ne pli malaltaj ol aliaj, nia tero estas ne pli malmulta, niaj kondiĉoj estas ne pli malfavoraj ol tiuj de aliaj. Certe ankaŭ ni povas fari ĉion, kion aliaj povas.” Ankaŭ kadroj de multaj oficejoj de la gubernio iris sur la produktan fronton por partopreni fizikan laboron kaj gvidi la produktadon. Kune kun la teknikistoj kaj la popolamaso ili kulturis pli ol kvardek mil muojn da modelaj kampoj. Tiamaniere, ili povis apliki efikajn teknikojn unue en tiuj modelaj kampoj por doni ekzemplojn, organizi lernadon pri ili ĉeloke, kaj poste disvasti-

gi tiujn teknikojn en tut-gubernia skalo laŭplane kaj sub gvidado.

RENOVIGO DE KULTURA SISTEMO

La someraj agropiantoj de Kidong-gubernio, kiaj tritiko, fabo, ktp. ĝenerale bezonas ĉirkaŭ ducent tagojn por maturiĝi. La aŭtunaj agropiantoj, kia kotono — ĉirkaŭ 210 tagojn por maturiĝi. Sed ĉi tie en la tuta jaro nur estas 230 tagoj konvenaj por kreskado de agropiantoj. Nature do aperis nesolvebla problemo en samjara kulturado de greno kaj kotono sur la sama kampo. Ĝuste tiu ĉi problemo malhelpis dumlonge la loĝantojn de Kidong efektiviĝi samtempan pliprodukton de greno kaj kotono.

De la lastaj kelkaj jaroj, la loĝantoj de Kidong-gubernio faris multajn klopodojn por solvi la problemon. Per eksperimentado en la modelaj kampoj, ili trovis kulturen sistemon taŭgan por samjare kulturi kaj grenon kaj kotonon sur sama kampo, nome la sistemon de alterna kulturado de kvar specoj de agropiantoj en du jaroj, kaj solvis la problemon.

La alterna kulturado iras jene:

En la unua jaro, inter la linioj de tritikoplantoj oni kreskigas kotonplantojn. En aŭtuno, antaŭ la elradikigo de la kotonplantoj, oni kreskigas inter ili faboplantojn. En la dua jaro, inter la linioj de la faboplantoj oni kreskigas printempajn maizplantojn, kaj poste inter la maizplantoj oni kreskigas plantojn de ruĝa fazeolo. Post rikolto de fabo, inter la linioj de maizoplantoj oni kreskigas sojfabplantojn. Post rikolto de maizo, sojfabo kaj ruĝa fazeolo, oni plugas la grundon por denove kreskigi tritikoplantojn.

Adoptante tiun ĉi kulturen sistemon, oni povas racie vicigi la rikoltojn, plene utiligi la grundon kaj solvi la problemon de kulturado de greno kaj kotono samjare, kaj krome la legumenacaj plantoj mem povas fekundigi teron kaj la fabo-trunke-

toj povas uziĝi kiel sterko. Tia aranĝo bone akordigas la utiligon kaj plibonigon de grundon.

PLIFORTIGO DE KAMPO-MASTRUMADO

Post eltrovo de la racia kultura sistemo, oni tamen devas ankoraŭ penegi labori por akiri samtempe riĉan rikolton de greno kaj kotono. Kaj sub la gvidado de la gubernia partia komitato, la loĝantoj de Kidong plifortigis la agropiantan kulturadon kaj kampomastromadon.

Vidante en la komenco ke la kotonoplantidoj en la kampoj kreskas tre bone, ĉiu el la komunumanoj de la naŭa produktogrupon de la kvara produktogrupon de Ŝaŭĝi-komunumo en tiu ĉi gubernio, sentis tian koran ĝojon ke ili ridis kun nefermebla buŝo. Iutage la grupestro sendis unu membron al unu el la kotonkampoj por translokigi plantidojn al la vakantaj lokoj. La grupano pensis: “Ĉu povus esti plantomankejoj inter la bonordaj kotonoplantidoj?” Sed kiam venis la tagmeza ripozhoron, anstataŭ iri hejmen por manĝi li tuj iris al la grupestro kaj diris al li: “Starante sur la kamp-rando, mi vidis nur vastan verdejon, sed kiam mi atente kontrolis la plantojn linion post linio kaj bedon post bedo, mi vidis, ke estas plantomankejoj. Pensu, kvankam la manko de tridek aŭ kvindek plantidoj en unu muo da tero ne tre gravas unuavide, tamen tio kaŭzos al la tuta rikolto mankon de kelkaj ĝinoj da kotono!” Poste, oni sendis dek ok komunumanojn el tiu grupo por kontroli la kvardek tri muojn da kotonoplantoj. La komunumanoj trankviliĝis nur post kiam ili neniigis la breĉojn.

Tian zorgeman mastromadon de kotonoplantidoj faris ne nur tiu produktogrupon de Ŝaŭĝi-komunumo, kaj ne nur kontroladon kaj breĉo-eliminon oni faris. En la pli ol naŭ mil produktogrupoj de la kvardek komunumanoj en la tuta gubernio disvolviĝas streĉa aktivado de kampomastromado antaŭ somera rikolto. Antaŭ rikolto



de tritiko, inter la linioj de tritikoplantoj oni ekstermas insektaĉojn, malfirmigas la teron kaj sarkas la herbaĉojn; post la rikolto de tritiko, oni plugas la teron, ekstermas insektaĉojn, sterkas la grundon, translokigas plantidojn kaj fosas kanaletojn. Ĉar la sperto diris al ili, ke frua plugo povas malkompaktigi la grundon kaj altigi ĝian temperaturon. Frua maldensigo de kotonplantoj kaj forigo de herbaĉoj ebligas ke ili kresku sen malhelpo. Frua transplantado por plenigo de vakantaj lokoj ebligas la transplantitajn kotonplantojn facile daŭrigi sian vivon. Frua sterkado povas ĝustatempe doni al kotonplantoj nutraĵon bezonantan kaj plifortigi ilian povon por kontraŭstari naturan katastrofon. Frua ekstermo de insektaĉoj povas plej bone protekti la kotonplantojn. Frua fosado de kanaletoj por drenado protektas la kotonplantojn kontraŭ superakvego. Tiamaniere, oni povas eviti la malbonajn fenomenojn de malfrua elkreskiĝo, fruktado de la kotonplantoj, kaj meti fundamenton por la efektivigo de tio ke la kotonplantoj ekfruktu ĉe sia mezparto en la plej varmaj tri dektagoj de somero, kaj plene kovriĝu de fruktoj sur la kapo en aŭtuno.

Post tiuj ĉi prizorgoj, sekvas kampomastrumaj klopodoj kun pliigo de burĝonoj, protektado de fruktoj kaj ekstermo de insektoj en la malfrua kreskoperiodo kiel la centro. En la jaro 1964, dank' al tia zorga mastrumado super la grenkaj kotonplantoj farita de la vasta amaso de komunumanoj, sub la gvido de la diversrangaj partiaj organizoj — la laboro-kvanto de ĉiu muo pliigis je 10 ĝis 15 procentoj ol tiu de 1963 — la sensemigita kotono produktita de ĉiu muo da tero pliigis je 51 ĝinoj kaj la po-mua produkto-kvanto de greno pliigis je pli 130 ĝinoj kompare kun tiuj en 1963. Finfine la loĝantoj de Kidong-gubernio akiris riĉajn rikoltojn de greno kaj kotono.



Komunumaj Brigadoj entuziasme vendas sian grenon al la ŝtato.



En Konstruado

LA UNUA FABRIKO DE GLOBLAGRAJ KONTROLILOJ EN ĈINIO — Iu malgranda fabriko en Ŝandong-provinco, kiu povis produkti nur ordinarajn ilmaŝinajn tranĉilojn kaj mezurilojn en la pasinteco, hodiaŭ, disvolviĝis en la unuan fabrikon de globlagraj kontroliloj en Ĉinio.

Antaŭe, ĉi tiu fabriko havis nur 13 ordinarajn ilmaŝinojn, kaj antaŭ la dua jarduono de 1962 ĝi povis fabrikati nur tiajn produktojn kiaj ŝraŭbingo-fariloj kaj ŝraŭboplatoj.

Post kiam ĝi sin disvolvis en la nunan fabrikon de globlagraj kontroliloj kun la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj, pli ol 40 specoj de globlagraj kontroliloj jam estis elfaritaj kaj liveritaj al globlagraj fabrikoj kaj aliaj bezonantoj.

MILIONO DA NOVAJ SPINDELOJ — En la unuaj naŭ monatoj de 1965, 1,000,000 novaj spindeloj aldoniĝis en Ĉinio. Konforme al tio ekipaĵoj por teksado kaj pres-tinkturado jam estas instalitaj sinsekve por produktado. La kotonfadenoj pretigitaj ĉiujare de la miliono da spindeloj sufiĉas por teksti kotonan ŝtonon de pli ol 900,000,000 metroj. La novaj instalaĵoj ĉefe uzigos por produkti katunon taŭgan por vestaĵoj de kamparanoj.

KINOFILMOJ EL ĈINA FABRIKO — Antaŭ nelonge estas finkonstruita en Baŭding de Hebej-provinco, moderna fabriko de kinofilmoj kaj jam funkcias por produktado.

Ĝi povas produkti pli ol 30 specojn de nigra-blankaj, koloraj, diversaj specialaj filmoj, por-produktaj filmoj, kaj ordinaraj filmorulaĵoj, kiuj povas plejparte kontentigi la nunan bezonon de filmfarado. La kinofilmoj, kiujn tiu ĉi fabriko produktis, provizite de filmfarejoj, pruviĝis tre bonaj en kvalito.

TRANSISTORA KORBATIGILO — Progresinta kuracaparato — transistora korbatiĝilo estas sukcese profarita en Nankino. Ĝi estas projektita de ĉinaj kuracistoj mem kaj elfarita per enlande produktitaj partoj.

Tiu ĉi aparato havas nur la grandecon de paketo de cigaredoj, kaj pezas nur 200 gramojn. Per sia regule pulsanta kurento, ĝi incitas la koron de malsanuloj, kies batado fariĝis malrapida aŭ subite ĉesis, por ke ĝi funkcii normale.

La Rondiranta Hospitalo de Kinjuan-gubernio

En la pasinto, la kinjuan-anoj kutimis diri: "Jen venas gubernia kuracisto." Sed nun, ili diras aliel: "Jen venas la gubernia hospitalo."

La ŝanĝo de la diro montras, ke la Kinjuana Popola Hospitalo faris grandan paŝon antaŭen sur la vojo por servi al la vasta kamparanaro kaj produkto!


LA HOSPITALO AL LA PACIENTOJ

Ni havis okazon viziti la Rondirantan Hospitalon de Kinjuan-gubernio, kiu antaŭ du tagoj venis al Diangivilaĝo, Hanhong-popolkomunumo, 45 kilometrojn malproksime de la gubernia urbo.

La oficejo de la hospitalo sidas en ĉambro de malnova malsupera mez-kamparano Sun Vukjuan. Kaj en la loĝejo de la kuracistoj de la brigada kuracejo sin trovas la operaciejo kun disetendita neĝblanka tendo kaj diversaj operaciiloj bonorde metitaj sur la rando de la terlito. Apude staras unu prunteprenita tablo kovrita de faldita dika litkovrilo kaj kelkaj tavoloj da plastaj kovriloj. Tio estas la operacia stablo. La direktoro de la hospitalo Ma Tongĉong diris, ke ĝuste sur tiu tablo oni faris abdomenajn operaciojn al tri akuŝantoj pro malfacila nasko, unu operacion pri skrofolo, tri pri hernio, unu pri akuta apendicito kaj unu pri eksterutera gravedo. Ĉiuj tiuj operacioj iris sukcese.

La hospitalo havas krome diagnozejon, laboratorion, apotekon, kuracejon de ĉina medicino kaj oficejon de la flegistinoj, ĉiujn lokitajn en domoj de malnovaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj. Sur la muro de la flegistina oficejo pendas malsanohistoriaj notoj pri la kuracataj pacientoj. En la laboratorio funkcias milobla mikroskopo, per kiu oni povas fari ordinaran kontrolon pri sango, fekaĵo kaj urino.

Ĥirurgoj de la Rondiranta Hospitalo operacias pacienton en simpla operaciejo.



La plejparto de la kuŝantaj malsanuloj de la hospitalo loĝas hejme aŭ ĉe siaj parencoj, kaj kuracistoj kaj flegistinoj ilin vizitadas je fiksita tempo. Cetere, la hospitalo pruntis kvar vakajn ĉambrojn de komunumanoj kaj ilin ŝanĝis en simplajn malsanulajn kuŝejojn por malproksimaj pacientoj. Ĝuste en tiu tago, kiam ni vizitis la hospitalon, la kvar ĉambroj estis okupataj de ok pacientoj grave malsanaj venigitaj de pli ol dek liojn fore.

UNUE POR LA MALNOVAJ MALRIĈ-KAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZ-KAMPARANOJ

Elirinte el la ĉambroj de la malsanuloj, ni vidis, ke de transa deklivo de la valo venas tri homoj, el kiuj du vektoportas akvositelon. La direktoro diris, ke ili estas flegistino, farmaciisto kaj laboratora laboranto. Same kiel aliaj medicinaj laborantoj, ili ofte hakas brullignon kaj portas akvon en libera tempo por ŝpari elspezon al la malsanuloj.

Plie, la hospitalo organizis ses-personan rondirantan kuracan grupon. Ĉiutage, ili eliras frumatene kaj revenas post vesperiĝo por viziti tri-kvin montvilaĝojn, por kio ili devas piediri kelkdek liojn. Ili kuracas la negravajn malsanojn kaj venigas la suferantojn de gravaj malsanoj al la hospitalo.

Kuracate ĉi tie, la pacientoj ne nur povas ŝpari multe da tempo ol en la urbo, sed ankaŭ ne bezonas pagi por la diagnozado kaj loĝado en hospitalo. Ankaŭ la medikamento-kosto estas malalta. La kuraco de ia malsano, kiu aliloke bezonas pagon de 30 juanoj, ĉitie nur pagon de pli ol 5 juanoj. Tiel do la problemo pri malfaciloj en kuracado ĉe la kamparanoj vere solviĝis.

Laŭ enketo, el la 11 enhospitaligitaj malsanuloj 7 estas malnovaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, 3 — malnovaj mez-kamparanoj kaj unu — malnova supera mez-kamparano.

LA REVOLUCIA TRADICIO DE MEDICINA LABORO

Kinjuan-gubernio de Ŝanhi-provinco estis revolucia bazloko. Tiu regiono sin karakterizas per montozo, profundaj valoj, vasteco kaj disloĝateco. Tuj post sia fondiĝo en 1949, la Kinjuana Popola Hospitalo heredis la revolucian tradicion de la malnova Juebej-hospitalo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ĝiaj kuracistoj ofte iris al montvilaĝoj vektoportante medikamentkestojn por doni medicinan helpon al la popolamaso. Ĉiujare ili ankaŭ kelkfoje sendis kurac-grupon por fari servon al la popolanoj dum la urbetaj foiroj.

La persistado en tiu glora tradicio de servado al la vasta kamparanaro iris tamen ne ĉiam glate. Depost la jaro 1955, al la Kinjuan-a Hospitalo sinsekve venis labori diplomitoj el higiena mezlernejo kaj medicina instituto. Ili alportis novan kuracan teknikon kaj altigis la kurac-efikon. Sed, iuj opiniis, ke diplomitoj el instituto ne devas fari tiajn "krurrompigan piediradon kaj langlacigan klarigadon" en la kamparo. Kaj iu maljuna kamarado opiniis, ke la militaj jaroj jam forpasis, do oni devas fini la rondiran kuracadon kaj agi kiel "sinjoroj-kuracistoj en sia kuracejo".

Informiĝinte pri tio, la gvidanta organo de la gubernio decidis fari edukon pri la revolucia tradicio al la medicinaj laborantoj. Multaj medicinaj laborantoj servintaj dum la jaroj de revolucia milito venis al la hospitalo por rakonti al la novaj kuracistoj kaj flegistoj historiojn pri kuracistoj de la malnova Juebej-hospitalo, kiuj faris rondiran kuracadon al kamparanoj dorseportante siajn bezonaĵojn, kaj heroaĵojn de la popularmeaj medicinaj laborantoj en servado al armeanoj spite multajn malfacilojn.

La guberniaj gvidantoj, kiaj la estro de la gubernia higiena buroo, la direktoro de la hospitalo k. a. donis bonan ekzemplon persone gvidante aliajn fari rondiran kuracadon al vilaĝoj dorseportante pakajon. Sub ilia influo, multaj kamaradoj, kiuj antaŭe ne volis iri al la kamparo, nun fervore tien iris.

Ekde 1957, la Kinjuan-a Popola Hospitalo organizis rondirantan kuracan trupon. Dum la tri jaroj de 1958-1960, la trupo faris ĝeneralan san-ekzamenon al pli ol 55,870 personoj kaj kuracadon de pli ol 10,000 persono-fojoj. Pli ol 2,000 homoj kun endemiaj kaj kronikaj malsanoj ricevis efikan kuracon, nun jam resaniĝis kaj povas fari fizikan laboron. Krome ili ankaŭ elkulturis pli ol 1,300 sanprotektantojn kaj akuŝistinojn por vilaĝoj.

DEVIO DE LA ĜUSTA VOJO

Kun la disvolviĝo de la afero, estiĝis nova penslukto interne de la hospitalo.

Post la jaro 1960, al la hospitalo venis labori plimulte da diplomitaj studentoj. Dank' al tio, la malnovaj kaj pli frue diplomitaj kamaradoj iris en grandajn hospitalojn de urbegoj, por plialtigi sian kuracarton, kaj ankaŭ la estroj de la hospitalo iris en la provincan ĉefurbon por sin progresigi. Post la lernado ili reportis progresintajn teknikojn kaj altigis la kuracan nivelon de la hospitalo ĝis nova alto. Tamen, ĝuste tiam en la hospitalo aperis nova devizo de la tiel nomata "reguligo". Pro tio denove multiĝis la giĉetoj en la kuracejo, kiaj tiuj por registrado, kostokalkulo, enkasigo, apoteko, ktp. Laŭaspekte, la labordivido kun tiom da fakoj, estis tre preciza, tial iuj ĝoje diris: "Nun la hospitalo vere meritas sian nomon!"

Sed, la "reguligita" hospitalo postulis pli multan pagon al la malsanuloj ol antaŭe.

Fervore klopodante por la "reguligo" oni neglektis la bezonojn de la vasta kamparanaro, kaj iom post iom paliĝis la revolucia tradicio servi al kamparanoj, en kiu ili persistis dum multaj jaroj. En la jaro 1963, ili nur dufoje vizitis vilaĝojn, kaj la partoprenantoj nombris nur duonon de tiuj en la jaro 1960.



La Rondiranta Hospitalo survoje al alia montvilaĝo.

REIRO AL LA ĜUSTA VOJO

Kelkaj malnovaj komunistoj kaj funkciuloj rimarkis tion kaj diskutis: "Kien direktas sin la gubernia hospitalo?"

En la jaro 1964, la gvidanta instanco de Kinjuan-gubernio donis instrukcion al la hospitalo: Iru en la popolamasojn, faru enketadon kaj esploron por eltiri ĝustan konkludon. Tuj poste la hospitalo sendis enketan grupon al du brigadoj kun pli ol 2,200 loĝantoj de la Antaŭurba Komunumo. La rezulto de la ĝenerala enketado surprizis ilin: 70% malsanuloj en la vilaĝoj estas malnovaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj!

La publikigo de la rezulto kaŭzis bruan diskutadon en la tuta hospitalo. Multaj oponiis, ke la hospitalo unue devas servi al la vasta kamparanaro, precipe al la malnovaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj. Sed iuj diris kun dubo: "Ĉu hospitalo devus esti tia, kiu tutjare ĉien vagadas?" Aliaj diris: "Tio estas revolucia hospitalo." Tra la diskutado oni finfine akiris unuecan opinion: Ne deviu de la revolucia direkto, ne perdu la revolucionan tradicion!

Nun, en la hospitalo okazis serio da ŝanĝoj: Kelkaj giĉetoj estas fermitaj, pli multa enkasigo por urĝa kuraco forigita, ankaŭ la kuracistoj de ĉina medicino vizitas la kuŝejojn de malsanuloj, la portempe neokupataj ĥirurgoj donas helpon al la kuracistoj de internaj malsanoj por akcepti pacientojn, la operacia pago reduktiĝis. En la pasinteco, 50-60 laborantoj ne sufiĉis por la laboroj, sed nun oni jam ne havas tiom da laboroj por fari.

Do la ne-okupataj kuracistoj iris al vilaĝoj. Dekkelkaj kuracistoj, flegistoj, laboratoristoj kaj farmaciistoj iris, sub la gvido de la direktoro, kunportante la kuracilojn al la montvilaĝoj pli ol 70 kilometrojn malproksime de la gubernia urbo, por servi al la komunumanoj per kuracado.



Nova generacio de la liberigita servutularo.


LA urbo Lhasa en la tibeta regiono de Ĉinio, nun aperas kun nova fizionomio sur la monda tegmento.

En la pasinteco, Lhasa estis la centro de la regado de la tibetaj servutulaj mastroj. La centoj da grandaj servutulaj mastroj de Tibeto preskaŭ ĉiuj loĝis en Lhasa. Ili nomis ĝin "La Sankta Loko" kaj "La Okcidenta Edeno". Tie estis iliaj grandaj domoj, parkoj kaj privataj ĝardenoj por amuziĝo. Ĉiu servutula mastro havis multe da servistoj kaj kondukis luksan vivon. Sed tiam la vastaj popolamasoj vivis en neelteneblaj mizeroj kaj suferoj. Sur la stratoj en Lhasa ĉie vidiĝis almozuloj kaj vagabondoj. Ili loĝis en aĉaj budoj el ŝtonoj kaj eluzita lanŝtofo, kiuj ne povis ilin protekti de vento kaj pluvo, kaj iuj eĉ dormis kun hundoj por sin varmigi.

Post la demokratia reformo, Lhasa travivis radikalan ŝanĝiĝon. Sekve de la rapida disvolvigo de produktado kaj konstruado, la vivnivelo de la loĝantaro multe pliboniĝis. Ĉiuj almozuloj kaj vagabondoj nun jam havas profesion kaj transloĝiĝis en novajn domojn. Pli ol duono de la oficistoj, laborantaj en la Lhasa-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Popola Komitato de Lhasa, estas liberigitaj servutuloj kaj sklavoj. En la loĝantar-komitato funkcias centoj da tiaj liberigitoj. Ili sekvas la gvidadon de la Partio, tenas sin en intima rilato kun la amasoj, kaj ĉio

ŜANĜOJ EN LHASA

HU GUANG



en Lhasa iras bonorde dank' al ilia zorga administrado.

Dekmiloj da loĝantoj en Lhasa, kiuj suferadis kruelaĵojn de la servutulaj mastroj pasintec, nun energie laboras sur ĉiuj postenoj por konstrui novan Lhasa-n kaj novan Tibeton. En fabrikoj, entreprenoj kaj diversaj institucioj, en grupoj de aŭtomobiloj kurantaj sur altebenaj ŝoseoj kaj ĉe la konstruejoj ĉie diligente laboras loĝantoj de Lhasa. La maljuna laborulo Tandezin Vangĉug en la Avangarda Tajlora Interhelpa Grupo ĉe la Okangula Strato laboras tre diligente depost sia partopreno al la grupo antaŭ 6 jaroj. En la pasinteco, li servis dum sia duona vivo kiel sklavo. Unufoje li ricevis ducent tiel fortajn vangfrapojn de la mastro, ke liaj oreloj preskaŭ surdiĝis, kaj krome, la servutula mastro lasis sian hundon demordi parton de lia maldekstra orelo. Li diris: "Se ne estus la Komunista Partio, Prezidanto Maŭ kaj la revolucio, mi ne povus vivi ĝis nun. Nun mi vivas feliĉe, sed mi ne povas forgesi la pasintajn mizerojn. Mi pene laboros por revolucio kaj la tuta popolo."


En la malnova Lhasa sub la reĝimo de la servutula sistemo, estis neniun moderna fabriko. La mizeraj metilaborejoj preskaŭ sufokiĝis sub la premo de la servutulaj mastroj, kiuj deklaris, ke la ferforĝistoj estas "nigraj ostoj" kun socia pozicio pli malalta ol tiu de almozuloj. Post la demokratia reformo, estiĝis kaj disvolviĝas moderna industrio

kaj prosperas ankaŭ la meti-industrio. En la orienta kaj suda antaŭurbo aperis multaj fabrikoj, stariĝis elektra centralo, muelejo, medikamenta fabriko, agrikulturila fabriko, aŭto-riparejo, cement-fabriko, led-preparejo, ktp. kune ekformante industriaran kvartalon.

En la malnova socio, Lhasa havis neniun bone pavimitan straton, neniun bone funkciantan kloakon, neniun publikan necesejon. Ĉie estis forĵetaĵoj kaj fetoraj marĉetoj. Nun tio estas jam pasinta historio. Dum la lastaj jaroj, la popola registaro kaj la loĝantaro faris multe da laboroj por ŝanĝi la fizionomion de Lhasa. Oni forigis la malpuraj-ojn, ebenigis la fetorajn marĉetojn, konstruis novajn kloakojn, ordigis kaj pavimis stratojn. Tagon post tago Lhasa puriĝas kaj beliĝas.

La totala plankareo de la nove konstruitaj domoj en Lhasa dum la pasintaj 15 jaroj estas pli granda je unu oblo ol tiu de la malnovaj konstruitaj dum la pasintaj pli ol mil jaroj. Tiuj novaj konstruaĵoj estis konstruitaj plejparte post la demokratia reformo. En la unua duono de tiu ĉi jaro aperis nova kvartalo kun du asfaltaj stratoj, kie estas junpionira palaco, pligrandigita tibeta hospitalo, manĝejo, magazeno kun spaco por 2000 klientoj, laborula kultura palaco, Tibeta Revoluci-Historia Ekspoziciejo kaj Hinhua-librejo, Popola Banko, poŝtejo kaj aŭtomobila stacio, ktp. La stratoj trafiko-plenaj impresas per intensa prospero.

Nova Lhasa.



La Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo en Santajŝan

SE oni veturas per aŭto okcidenten de la ĉefurbo de la Dehong-a Aŭtonoma Subprovinco de taj-oj kaj gingpo-oj en Junnan-provinco, ĝi trakuros la verdan tapiŝegon de Mangŝi-ebenaĵo, ĉirkaŭkuros supren inter krutaj pitoreskaj montoj, kaj post ĉirkaŭ duonhora grimrado atingos lokon pli ol mil metrojn altan. Tiam, sur monto kovrita de verdaj bambuoj kaj baŝooj ekaperos kelke da blankaj tegoltegmentaj domoj kun ebena ludejo de korbopilko inter si. Tio estas la Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo de Santajŝan.

Santajŝan estas loko mikse loĝata de gingpo-oj, benglong-oj, han-oj kaj aliaj pluraj nacioj, kun sume pli ol 2,800 homoj. Antaŭ la Liberiĝo, la tieaj loĝantoj vivis en mizero kaj postiĝinteco. Ilia produktado restis je la stadio de plugado per glavo kaj semado post bruligo kaj tie neniam troviĝis lernejo. La nacimalplimultaj loĝantoj estis

Ĝaŭ Lulu, diplomito de tiu ĉi lernejo, nun laboras kiel estro de la Popola Komunumo Donggua (III-a).



senescepte analfabetoj kaj dum longa tempo ili registris aferojn per ŝnurnodoj aŭ gravuro sur ligno. Post la Liberiĝo, la diversnaciaj popolanoj forte postulas klerigon kaj fondiĝis kvar tuttagaj naciaj elementaj lernejoj. Kaj poste fondiĝis ankaŭ tiu ĉi Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo.

FONDAĴO PRO DISVOLVIĜO DE LA KOLEKTIVA EKONOMIO

La historio de la Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo de Santajŝan komenciĝis en 1956.


Tiam en multaj montvilaĝoj de Santajŝan estis fonditaj agrokulturaj produktaj kooperativoj. La nova produkta organizo postulis novan metodon de administrado. Sed en multaj kooperativoj de gingpo-oj kaj benglong-oj la membroj estis senescepte analfabetoj, inkluzive la gejunulojn kiuj estis la fundamentaj fortoj de la kooperativo. Tia stato fariĝis problemo urĝe solvenda.

Kaj la Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo de Santajŝan naskiĝis konforme al la aktuala bezono.


LERNEJO LAŬ PRAKTIKAJ BEZONOJ

La Duonagrokultura kaj Duonlerna Lernejo de Santajŝan estas elementa lernejo, kaj la plejparto de ĝiaj lernantoj estas diversnaciaj gejunuloj de 14 ĝis 20 jaroj. Ĝi celas elkulturi personojn kun socialisma konscio, elementa klereco, relative progresaj agrokulturaj teknikoj kaj librotena scio.

Laŭ la direkto, ke eduko servu al la proleta politiko kaj kombiniĝu kun la produkta laboro, konsiderante la praktikajn bezonojn kaj kulturan nivelon de la tie loĝantaj nacioj, la lernejo instruadas 4 lernobjektojn, nome, politikon, lingvon, matematikon kaj produktajn sciojn. Dum la lingvaj lecionoj, oni lernigas la gejunulojn ĉefe pri ideografiaj kaj skribado de letero, ricevatesto, atestilo, raporto ktp.; dum la matematikaj lecionoj, oni lernigas ilin ankaŭ pri uzado de abako kaj scioj pri librotenado. La lernoperiodo estas ĝenerale tri jaroj, dum kiuj oni laboras kaj lernas poduontage. Kaj konforme al la bezonoj de agrokultura produktado, la lernejo aranĝas la instruadon tiamaniere, ke oni lernas multe, kiam agrokulturaj laboroj estas malmultaj, kaj malmulte aŭ eĉ tute ne lernas dum



Li Lejong, ĝingpo-naciano, el la unuaj diplomitoj de tiu ĉi lernejo, nun fariĝis instruisto.



Instruistoj kaj lernantoj kune flegas arbedojn.

la sezonoj, kiam multas agrokulturaj laboroj, por ke la lernantoj sturme laboru. La lernotempo en ĉiu jaro ĝenerale atingis okcent horojn.

LERNI RAPIDE, MEMORI FIKSE

Ĉar la lernantoj duontage lernas kaj duontage laboras, faras kion ili lernas kaj praktikas lernante, tial la efiko de la instruado montriĝis tre rapide. Ekzemple, dum leciono de matematiko la instruisto lernigis en klasĉambro pri la kalkulo de areo. La abstraktajn konceptojn la lernantoj ne povas kompreni facile. Sed post kiam la instruisto praktike mezuris la areojn de diversaj kampoj kune kun la lernantoj, ili rapide komprenis kaj ellernis la kalkuladon pri areo.

Foje, post leciono pri pozitiva proporcio, la instruisto kondukis la lernantojn al kafo-ĝardeno por prepari Bordo-fluidaĵon — medikamenton por preventi malsanon de kafarbo. Tiu medikamento estas laŭproporcio miksaĵo de kupra sulfato, kalko kaj akvo. Dank' al la preparado de tiu medikamento la lernantoj facile posedis la proporcian rilaton. La ĝingpo-nacia lernanto Ŝi Mubang diris: “Antaŭe kiam mi vidis teknikiston prepari kaj ŝpruciĝi tian fluidaĵon surkampe, mi pensis, ke tiun laboron povas fari nur personoj kun alta klereco, kaj ni malmulte kleriĝintaj neniel povas tion fari. Mi ja ne atendis, ke mi povas ellerni tiun teknikon tiel facile.”

Dank' al kombino de enĉambra lernado kaj praktika laboro kaj samtempaj lernado, laboro kaj aplikado, la lernantoj akiris sciojn ne nur el libroj, sed ankaŭ el la praktikado. La lernantoj diris: “Kion ni lernis, tion ni povas tuj apliki en praktiko.” Kaj la gepatroj de lernantoj diris: “En la duonagrokultura kaj duonlerna lernejo oni lernas rapide,

komprende kaj memoras firme dank' al la kombino de lernado kaj praktiko.”

KULTURADO DE REVOLUCIAJ LABORULOJ

Plejparto de la lernantoj en tiu lernejo estas gefiloj el familioj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, kiuj longe suferadis antaŭ la Liberiĝo subpremado kaj ekspluatado de kuomintangaj reakciuloj, tiranaj feŭdestroj tajnaciaj kaj montĉefoj de iliaj propraj nacioj.

Por ke la lernantoj ĉiam tenu en memoro la klasan malamon, ĉiam estu revoluciuloj kaj fidelaj servantoj al la laboruloj, al socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la lernejo ofte invitis lokajn malnovajn malriĉkampanojn al la lernejo por rakonti pri la pasinta mizera vivo. Kaj multaj lernantoj skribis historion pri la mizera pasinteco de sia familio. La lernantoj de la triajara klaso lernas artikolojn de Prezidanto Maŭ “Servi al la Popolo” k. a. Dank' al tio, rapide altiĝis la klasa konscio de la junuloj, kiuj antaŭ la enlernejiĝo jam estis laboruloj. Ili ne nur pli amas kolektivian laboron, sed ankaŭ povas ĉiam teni en si ardan revolucionan entuziasmon.

DISVASTIGO DE PROGRESA PRODUKTA TEKNIKO

En progresigo de la kultura metodo kaj disvastigo de modernaj teknikoj, la lernejo donis modelan ekzemplon al la lokaj terkulturistoj.

La terkulturistoj de ĝingpo-nacio ne kutimis sterki la kampojn. Krom instruo al la lernantoj pri sterkado kaj ĝia efiko, la lernejo ankaŭ gvidis ilin fari eksperimenton por kompari la produktojn de sterkita kaj ne-sterkita kampoj, ke la lernantoj vidu la efikon de sterko, kaj bone konu kaj uzu diversspecajn sterkojn. Krome, la lernejo aktive

Ĉiam por la Revolucio

NIMACERING: sekretario de la filio de la Komunista Partio de Ĉinio en Keson-hiango, Najdong-gubernio, reprezentanto al la Unua Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.*

disvastigis progresajn produktajn teknikojn pri kulturado kaj transplantado de kelkaj ĉefaj grenplantaĵoj kaj industriaj plantaĵoj. En 1963, la kamparanoj de Santajŝan forte disvolvis kulturadon de arboj de teo, kafo, oranĝo k. a. industriaj arboj kaj plantaĵoj. Sed pro manko de sperto, ili renkontis multe da malfaciloj en produkta tekniko. La lernejo faris sciencajn eksperimentojn kaj bone sukcesis. Multaj kamparanoj ĝin vizitis kaj laŭdis ĝiajn atingojn.

PLI KAJ PLI EVIDENTIĜIS LA SUPERECO

Dum la lastaj kvin jaroj, tiu lernejo akiris nemalmultajn sukcesojn. Per sia laboro la instruistoj kaj lernantoj konstruis 6 kabanojn, kreis 12 muojn da irigaciaj kampoj, 108 muojn da kampoj sur montoj, kulturis 2 muojn da arbidoj, plantis

LA oficiala fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estas nia grandega feliĉo. Kiel reprezentanto al la Unua Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kun ĝojego en la koro mi venis al Lhasa por ĉeesti la fondiĝan kunvenon de la aŭtonoma regiono. En la lastaj tagoj mi pensis pri multaj aferoj, kaj plej multe mi pensis pri la favoro de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. Se ili ne gvidus nin entrepreni la epokfaran movadon de la demokratia reformo, kiel ni povus ĝui la hodiaŭan feliĉan vivon?

Mi jam estas 30-jara. En la socio de kruela feŭdisma servut-sistemo, mi travivis 24 jarojn. Mia patro estis sklavo de Khalsum Ĵika (kultivejo de feŭda mastrosinjoro), kaj mia patrino estis servutulino. Laŭ la regularo de la feŭdaj mastrosinjoroj, la idoj de sklavo ĉiam estas sklavoj, tial tuj post mia naskiĝo, mia nomo jam estis registrita en la nomlibro de la kultivejo.

Mia patro paŝtadis bovojn por servutul-mastro. Foje iu bovo manĝis plantaĵon en kampo, kaj pro tio li estis mortigita de iu sendita de agento de la mastro. Tiam mi estis nur unumonata bebo. Kiam mi fariĝis ok-jara, mi estis kaptita de la servutul-mastro kaj sendita kiel sklavo al la hejmo de Traŝii, lia agento.

Servante kiel sklavo, mi kvazaŭ falis en inferon. Dum la 16-jara sklava vivo, mi neniun fojon satmanĝis, neniam portis bonan veston, kaj neniun tagon ne ricevis riproĉojn kaj batojn. Kiam mi estis 11-jara, foje laborinte sur kampo mi revenis

* *hiango* — administra unuo sub distrikto.

pli ol 2,000 kafarbojn, 15,000 tearbojn, 600 baŝuojn, 440 oranĝarbojn, bambuojn en 120 terpecoj kaj bredis multe da bovoj, ĉevaloj, porkoj, kokoj kaj anasoj. Ĝis nun la lernejo jam kulturis por diversaj kooperativoj sume 72 diplomitojn, el kiuj iuj funkcias kiel kooperativaj estroj, aliaj kiel milicaj taĉmentestroj aŭ instruistoj de vesperaj lernejoj, sanprotektaj laborantoj k. a.

La lernejo estas oportuna precipe por la malriĉaj kooperativanoj, ĉar ili ne bezonas pagi por siaj gefiloj lernokoston al la lernejo, kaj iliaj gefiloj lernante tie eĉ povas gajni laborpagon por pagi parton aŭ la tuton de iliaj manĝ- kaj lern-kostoj.

Al tiu izola loko limregiona, kiu estis malriĉa kaj postĝinta la duonagrokultura kaj duonlerna lernejo ne nur alportis kulturon sed ankaŭ akcelis la produkton. Tial ĝi ricevas ĉiam pli multe da ŝato kaj laŭdoj de la diversnaciaj popolanoj de Santajŝan.

iom malfrue. La mastrumanto min kaptis, kulpigis pri maldiligenteco, forte min vipis, ne donis al mi manĝaĵon, kaj ordonis min tuj reiri al la kampo por daŭre labori. Mi plorante kuris hejmen kaj plendis al mia panjo. Panjo petis Traŝii min pardoni kaj ne plu bati, ĉar mi ja estis ankoraŭ tro juna. Sed Traŝii kruele diris al mia patrino: "Restigu lin! Li estas mia. Ĉu lin premtordi en bulon por meti en mian poŝon, aŭ lin tiri en fadenon por ĉirkaŭligi mian talion, ĉion mi faros laŭ mia plaĉo!" Mia patrino ne kuraĝis diri pli, kaj revenis hejmen kun larmoj.

Tuj post la foriro de mia patrino, Traŝii ordonis ligi miajn harojn kaj miajn dikfingrojn al trabo per ŝnuro, ke miaj piedfingroj apenaŭ tuŝetis la teron. Tiamaniere ili min pendigis kaj vipis de la mateno ĝis la posttagmezo. Kelkfoje mi svenis pro la vipado. Iu sklavo suferanta kune kun mi en la hejmo de Traŝii, tion informis al mia patrino. Ŝi plorante alrapidis, kaj petis la mastron ne bati min plu. La mastro diris: "Reiru! Mi ne batis lin, li estas laboranta en mia hejmo." Ŝi petis la mastron lasi ŝin eniri por min iom rigardi. Sed la mastro respondis: "Absurdaĵo! For kun via revaĉo!"

Nigraj nuboj ne povas kaŝi la sunon. Post kiam la ribelo en 1959 estis subpremita, levita de la reakciularo, la Komunista Partio sendis laborgrupon al nia kultivejo. La servutul-mastro jam forkuris eksterlanden. Foje mi renkontis survoje k-don Dzanpagjaco (nun li estas la sekretario de la komitato de la Komunista Partio en nia Ĉangĝu-distrikto) de la laborgrupo. Li demandis min: "Ĉu vi estas sklavo?" "Jes," mi respondis. "Ni estas alsenditaj de Prezidanto Maŭ, por helpi la sklavojn sin liberigi," li diris. "La vivo de la sklavoj estas tro mizera, ili nepre liberiĝu kaj havu sian propran hejmon!" Trovinte ke li bone konas la mizeron de ni sklavoj, mia koro tuj varmiĝis. Mi diris: "Ni sklavoj suferis grandegan mizeron, vivis eĉ pli malbone ol la ŝarĝbrutoj. Ĉu ni vere povus liberiĝi?" "Jes certe," li diris. "Dank' al la gvidado de Prezidanto Maŭ, vi certe liberiĝos. Venu ofte al nia laborgrupo por aŭskulti la veron pri la liberigo de sklavoj!"

Ekde tiam mi iradis al la laborgrupo ĉiam, kiam mi havis libertempon. En la grupo troviĝis laborantoj han-naciaj kaj tibetaj. Mi rakontis al ili kiom mi suferis kiel sklavo. Mi ekploris, kaj ankaŭ la han-naciaj laborantoj ekploris.

La laborantoj de la grupo multe klarigis al mi la veron pri liberigo. Kaj mi transdiris la lernitan veron al la malriĉaj fratoj suferantaj kune kun mi. Ili ĉiuj opiniis ke la laborgrupo diris prave. Baldaŭ ni fondis kamparanan ligon. La suferantaj

malriĉaj fratoj elektis min kiel estron, kaj kiel vicestrojn oni elektis Ngagvang (nun estas nia hiangestro) kaj Kjikjag, kiuj suferis profundan mizeron kaj havas grandegan malamon kontraŭ la subpremantoj. Ĉiuj unuanime postulis fari kalkulon kun la reakciaj feŭdsinjoroj kaj la agentoj de la servutul-mastroj.

Post la demokratia reformo, kiel la aliaj sklavoj, mi ricevis distribuitajn domon kaj teron, transloĝiĝis en mian domon kaj ekhavis mian propran hejmon.

Tra la demokratia reformo mi ekkomprenis, ke nur dank' al la bona gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj la organizita kolektiva forto, ni povas nin liberigi kaj ĝui la feliĉan vivon. Mi decidis pene labori kaj lerni diligente por la feliĉo de la proletaro kaj fariĝi komunisto. En junio de 1960, mi estis sankciita kiel membro de la glora Komunista Partio. Poste mi prenis sur min la laboron de sekretario de la partia filio en Keson-hiango. En 1962, oni elektis min kiel popolan reprezentanton de tiu loko.

Ekde la demokratia reformo, sub la gvidado de la Partio, ni pli ol 120 familioj da liberiĝintaj servutuloj de Keson-hiango fondis 10 interhelpajn grupojn. Per la kolektiva forto de la interhelpaj grupoj ni venkis multajn malfacilaĵojn, kiujn neniu sola familio povis venki, kaj senĉese disvolvis la produktadon kaj plibonigis la vivon tagon post tago.

En la lastaj ses jaroj, multe altiĝis la po-mua produktokvanto de pli ol 1,600 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) da tero en nia tuta hiango. Pli ol 95 procentoj de la kamparanoj jam havas pli-malpli multe da superflua greno. Antaŭ la demokratia reformo, krom la servutul-mastroj kaj iliaj agentoj, tra nia tuta hiango troviĝis neniu kiu ne estis ĉifonvesta kaj nudpieda; sed nun ĉiu el ni havas almenaŭ du kompletojn da bonaj vestoj. Ankaŭ la produktaj rimedoj ege plimultiĝis: En 1960 tra nia tuta hiango troviĝis nur 20 bovoj kaj 19 plugiloj, sed nun ni havas 80 bovojn kaj 40 plugilojn. Ni ĉiuj liberiĝintaj servutuloj esperas pli rapide disvolvi la produktadon. Ĉiuj diris: "Pliapaŝe ni disvolu la produktadon, kaj nur se ni pliapaŝe organiziĝos, ni povos kune riĉiĝi." Ili diris prave. Ni organiziĝos pliapaŝe kaj marŝos laŭ la socialisma vojo montrita de la Partio.

En nia vilaĝo oni ofte diris al mi: "Nimacering, vi ja estis mizera knabo, vi devas bone aŭskulti la instruon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj bone labori. Neniam forgesu la mizeran pasintecon!" Prave diris la samvilaĝanoj. Mi neniam forgesos la mizeron de la pasinteco, kaj des pli ne forgesos la favoron de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Mi ĉiam sekvos ilin, kaj daŭrigos la revolucion por ĉiam!



Vang Ĉengfa, stacidoma policisto de Hajĉeng, Liaŭning-provinco helpas la maljunulinon en irado.

Fidelaj Servantoj de la Popolo

— Pri la Popolaj Policianoj
de la Nova Ĉinio

ĜENG DONGFENG

Iuposttagmeze en septembro de 1963, suden iranta vagonaro muĝante proksimiĝis al Hajĉeng-stacio de Liaŭning-provinco. Ĝuste tiam, je kelk-dek metroj antaŭ la vagonaro, transiras la fervojon iu grizhara kaj grizbarba maljunulo kun klinita kapo kaj peza sako sur la dorso. Malgraŭ fajfado de la vagonaro, la maljunulo nenion aŭdis pro sia surdeco. Vidante, ke tuj okazos akcidento, ĉiuj sur la perono ekkriegis konsternite. Subite iu popola policano en blanka uniformo sin ĵetis tra la homamaso al la maljunulo kaj tutforte lin brakprenis de la reloj. En tiu palpebruma daŭro la vagonaro brue preterpasis ilin.

Kiu estas la policano, kiu spite danĝeron savis alies vivon? Li estas Fu Keju de la policejo de Hajĉeng-stacio.

En la policejo de Hajĉeng-stacio troviĝas ne nur unu homo kia Fu Keju kun tia nobla komunisma karaktero, kaj ne nur unu tia kortuŝa ekzemplo de sinoferemo kaj ĝojo en helpado al aliaj. En tiu ĉi policejo jam fariĝis moro, ke la popolaj policianoj amas la popolon. Kaj la policejo de Hajĉeng-stacio estas nur unu el la policejoj de publika sekureco en la tuta lando. Kun senlima fideleco al la patrujo kaj popolo, la ĉinaj policianoj defendas la ŝtatan sekurecon, konservas la socian ordon, kaj samtempe ĉiam kaj ĉie diligente servas al la popolo. Per siaj modelaj agoj la popolaj policianoj havigis al si prestiĝon inter la popolamasoj kaj komprenigis al ili, ke la popolaj policianoj estas iliaj plej lojalaj servantoj kaj fidindaj amikoj, de kiuj ili ĉiam povas ricevi helpon.

Kial la popolaj policianoj de la nova Ĉinio havas tian bonan moralon? Kial ili kaj la popolo estas tiel intimaj kiel fiŝo kaj akvo? La fundamenta kaŭzo kuŝas en la socia sistemo de nia lando. Nia socialisma sistemo decidis la karakteron de la popolaj policianoj "servi al la popolo". Antaŭ longe en 1949, en sia fama verko *Pri Popol-demokratia Diktaturo*, Prezidanto Maŭ Zedong montris, ke la popola polico estas konsistiga parto de la popola ŝtatmaŝino. Por la antagonismaj klasoj ĝi estas instrumento de subpremado, sed por la popolamaso, solida garantio por defendi la revolucion frukton kontraŭ atenco de la malamiko. Li diris: "La kombino de ĉi tiuj du flankoj, demokratio interne de la popolo kaj diktaturo al la reakciularo, estas popoldemokratia diktaturo." La grava instrukcio de Prezidanto Maŭ jam fariĝis la fundamenta politiko por konstruado de la vicaro de la popolaj policianoj de la nova Ĉinio. Dum la pasintaj 16 jaroj la popolaj policianoj fidele praktikis tiun ĉi instrukcion. En la batalo kontraŭ spionoj kaj sekretaj agentoj de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek-banditoj kaj aliaj kontraŭrevoluciuloj, la popolaj policianoj sin montris bravaj, obstinaj, de-

cidemaj, spritaj kaj akiris venkojn unujn post aliaj, sed al la popolamaso ili estas servantoj kaj per ĉiu rimedo certigas la demokratiajn rajtojn de la popolo, kiuj estis difinitaj en la konstitucio.

Por garantii, ke la popolaj policanoj efektive observu la leĝojn en sia laboro, la gvidaj organoj de publika sekureco difinis severan labor-disciplinon por ĉiuj laborantoj de publika sekureco. La popolaj policanoj povas ne nur konscie kaj modele observi kaj praktiki ĝin, sed ankaŭ konstante fari kritikon kaj memkritikon, peti opiniojn de la popolamaso kaj akcepti ĝian kontrolon. Ĉiujare la gvidaj organoj de publika sekureco difinas unu monaton por konduki la movadon "amzorgi la popolon". En tiu monato la popolaj policanoj devas raporti al la loĝantoj pri sia laboro, aŭskulti opiniojn kaj kritikojn de la popolamaso por konstante plibonigi sian laboron. La kombino de tiuj tri flankoj, la revolucia konscio de la popolaj policanoj, la kontrolo de la ŝtato kaj de la popolamaso, plene garantias, ke la popolaj policanoj estas ĉiam fidelaj al la popolo kaj la ŝtato.

La Perdaĵejo de Ŝanhajo kiu ricevas ĉiumonate milojn da perdaĵoj kiujn urbanoj trovis kaj alsendis.



Lu Fuhiang, popola reprezentanto de Ŝanhajo (1-a maldekstre) retrovis dank' al la helpo de policisto, sian filon (2-a maldekstre), kiun li donacis al iu alia antaŭ 24 jaroj pro malriĉeco.

La popolaj policanoj kaj la popolamaso estas tiel intimaj kiel fiŝo kaj akvo, ankaŭ pro tio, ke tiu ĉi vicaro devenis rekte el tiu de la laboristaro kaj kamparanaro, el la revolucia popolamaso. Sun Ĝaŭvej, estro de la supre menciita policejo de Hajĉeng-stacio, estis ferajisto antaŭ ol fariĝi popola policano. Li Hongda, la vicestro, antaŭ la Liberiĝo vivis en tre mizera kamparana familio. En sia infanaĝo, kiam lia patrino almozpetis kun li ĉe iu bienulo, li estis mordita de hundaĉo de la bienulo je la kruro, kaj ĝis nun la cikatro ankoraŭ restas. Hĵue Jinki, la politika direktoro, antaŭe estis mizera lignajisto. Kiel povas ne esti senlime fidela al la Patrujo, senlime ami la popolon vicaro de tiaj popolaj policanoj!

La popolaj policanoj kaj la popolamaso estas tiel intimaj, kiel fiŝo kaj akvo, des pli pro tio, ke la Komunista Partio de Ĉinio starigis firman politikan laboron en la vicaro de la popolaj policanoj, ĉiam armas ilin per la penso de Prezidanto Maŭ Zedong kaj instruas ilin servi la popolon tutkore kaj tutanime. "Servi al la Popolo", "Memore al Norman Bethune", "Zorgu pri la Vivo de la Popolamaso, Atentu pri la Labormetodoj" kaj aliaj artikoloj verkitaj de Prezidanto Maŭ Zedong jam fariĝis lernolibroj kaj gvidilo de agado por la popolaj policanoj.

En la brilo de la penso de Maŭ Zedong la popolaj policanoj de la nova Ĉinio lojale efektivigis sian devon kaj bonege plenumis la konfidon de la ŝtato kaj popolo. Ĝuste pro tio, ili gajnis unuaniman laŭdon de la tutlanda popolo.



Anoj el la fiŝista brigado "Sputniko" de la Daĉen-insulara Popola Komunumo revenas kun kaptitaj trikiuroj.

NUNTEMPA DAĈEN- INSULARO

DONG LIU

SUR la Orienta Maro de Ĉinio sin trovas aro da grandaj kaj malgrandaj insuloj, kiuj distancas je ĉ. 30 maraj mejloj de la apudmara Hajmen-urbeto de Ĝiang-provinco. Ili estas Daĉen-insularo, kiu antaŭ 11 jaroj suferis katastrofon fare de la Usono-Ĉiang-a kliko. Kiam la malamikoj panike forkuris de tie, ili forbruligis la plejparton de la domoj, disrompis ĉiujn fiŝboatojn, forrabis loĝantojn de la insularo kaj enterigis dekmilojn da usonaj minoj, kaj faris Daĉen-insularon morta mondo.

Tamen hodiaŭ socialisma konstruado jam bolas sur Daĉen-insularo, kiu revenis en la brakojn de la patrio nur antaŭ 11 jaroj. Ĝi majeste staras ĉe la antaŭposteno sur la Orienta Maro kaj gardas la pordegon de la patrio.

LA NOVAJ MASTROJ SUR LA INSULARO

Ĉe la vesperiĝo de la 12-a de februaro, 1955, la vundoplena Daĉen-insularo unuafoje aŭdis paŝojn de siaj novaj mastroj. Ili estis batalantoj de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Apenaŭ ili surinsuliĝis, ili tuj komencis forigi minojn por resanigi la insularon.

Post paso de unu monato, iun tagon, sur la vekiganta Daĉen-insularo subite aŭdiĝis konata voĉo: "Ja estas neatendite, ke mi, He Ĉaŭcaj, revenas al Daĉen-insularo." Ekde la aĝo de 11 jaroj He Ĉaŭcaj jam devis penlabori por fiŝkaptista tirano de Daĉen-insularo kiel metileranto. Kiam li atingis la aĝon de 30 jaroj, li jam preskaŭ kripliĝis pro la suferitaj turmentoj; kaj pli poste,

maldungite de la loka fiŝkaptista tirano, li forlasis la insularon kaj transloĝiĝis al la ĉeftero. Kelkajn tagojn post la liberiĝo de Daĉen-insularo, aŭdinte, ke la trezora insularo estas tute ruinigita de la Usono-Ĉiang-a kliko, li tiel forte ekindignis ke li neniel povis reteni sian fajran koleron. Kune kun aliaj ses familioj de fiŝkaptistoj, li memvole revenis al sia hejmloko, kiun li forlasis antaŭ ok jaroj. Kaj sub lia iniciato estis organizita la unua interhelpa grupo de fiŝkaptado, kiu prenis sur sin la pezan ŝarĝon rekonstrui Daĉen-insularon.

Novaj mastroj transloĝiĝis aron post aro al Daĉen-insularo. Inter ili estis loĝantoj de urboj aŭ urbetoj, intelektaj gejunuloj kaj laboristoj de diversaj profesioj. Por rekonstrui la trezoran insularon de la patrio, ili fiksloĝiĝis sur la insularo. El ili la plej atentinda estis la Venĝoŭ-a Junulovolontula Terekspluata Brigado, kiu konsistis el gejunuloj viglaj kaj kleraj. Veninte al la insularo, tiu ĉi grupo da gejunuloj, kies meznombra aĝo estis nur 18 jaroj, tuj komencis plugi teron per siaj propraj manoj. En la unua printempo ili jam plantis terpomojn, batatojn kaj legomojn en pli ol 200 muoj da tero. Kiam la brigadano Li Guangdan alvenis la insularon, li estis nur 17-jara. Sed post tri jaroj li jam fariĝis terkulturisto kapabla fari ĉiajn agrikulturajn laborojn kaj, iom pli poste, ankaŭ lerta produktanto de enladigita fiŝaĵo kaj moruhepata oleo. Nun li estas la direktoro de la Daĉen-insulara Magazeno. En Daĉen-insularo ja sennombraj estas tiaj gejunuloj kia Li Guangdan.


AFERO KOMENCIĜIS PER UNU DIFEKTITA BOATO

En aprilo de 1955, kiam la printempa fiŝsezono venis, ĉe la insularo tamen sin trovis neniuj boatoj. Kiel do fari fiŝkaptadon? Iun tagon, He Ĉaŭcaj interkonsiliĝis kun siaj kunuloj por trovi rimedon. Ili ĉiuj venis al la interkonsento, ke ili serĉu ĉe marbordo difektitajn boatojn ripareblajn.


La postan tagon, antaŭ ol la suno ekmontris sian vizaĝon, jam aŭdiĝis sur la kvietaj marbordo paŝbruoj de la boat-serĉantoj. Tamen ili sukcesis trovi en amaso kaj amaso da boat-rompitaĵoj unu malgrandan boaton multe difektitan nur ĉ. la tria posttagmeze. Poste, ĝuste per tiu ĉi riparita boataĉo la interhelpa grupo el sep familioj da fiŝkaptistoj bonvenigis la unuan printempan fiŝsezonon.

Akirinte la unuan boaton, ili povis akiri ankaŭ la duan, la trian... En vintro de la sama jaro ili aĉetis novan sampanon kaj pli ol 130 retojn per la kolektiva fonduso kaj pruntmono de la ŝtato, kaj tuj sekve surmariĝis por kapti fiŝojn malgraŭ frosto kaj ondegoj. Nur en la vintra fiŝkaptado ili jam enspezis entute pli ol 23,000 juanojn kaj, post repago de la pruntmono de la ŝtato kaj flanken-meto de sufiĉe da produkta fonduso por fiŝkaptado en venonta printempo, ĉiu el ili ricevis mezkvante 500 juanojn kontante. Vang Hingŝoŭ estas maljuna fiŝkaptisto, kiu antaŭ 2 jaroj falis en la maron kaj estis savita el pereco de varŝipo de la Popola Registaro kaj post la liberiĝo revenis al la insularo. Kiam li ricevis tiom multe da kontanta mono, varmaj larmoj plenigis liajn okulojn kaj laŭte li diris kun eks-

Kong Giangbo (maldekstre) kaj fiŝisto Vang Ŝoŭĝian ambaŭ elsavitaj de la Popola Liberiga Armeo sur Daĉen-insularo post la prirabado de Ĉiang Kajŝeka trupo.



Nove konstruita marborda strato de Daĉen-insularo.



ciĝo: “Jen komenciĝis feliĉaj tagoj de ni, fiŝkaptistoj de Daĉen-insularo.”

Nun tiu ĉi interhela grupo de fiŝkaptado, kiu en la komenco havis nur unu difektitan boaton, jam disvolviĝis en fiŝkaptan brigadon de la popola komunumo. Ĝi havas kolektivajn posedaĵojn valorantajn je 280,000 juanoj.

La nova fizionomio de tiu ĉi fiŝkapta brigado estas miniaturo de la restarigo kaj disvolviĝo de la fiŝkaptado de la tuta Daĉen-insulara Popola Komunumo. En 1964, la totala produktokvanto de fiŝkaptado pliiĝis je preskaŭ 8 obloj ol tiu en 1956. Nun 78 el la intelektaj gejunuloj, kiuj en la komenco tuj kapturiniĝis ekvidante maron kaj vomadis surboatiĝinte, jam fariĝis lertaj direktilistoj, ret-manipulistoj aŭ vapormaŝinistoj.

REKONSTRUADO DE LA BELA INSULARO

La batalantoj de inĝeniera trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo elterigis pli ol 10,000 minojn ĉe marbordoj, domoj, vojoj kaj en legomĝardenoj de Daĉen-insularo. Kaj sur la ruinoj kaŭzitaĵoj pro la bombadoj de la Usono-Ĉiang-aj reakciuloj, la novaj mastroj de la insularo komencis feliĉigan konstruadon.

Sur Vuhu-monto de la insularo nun alte staras ruĝa konstruo — la mara meteorologia stacio, kiu estas la unua en la historio de la insularo. Dank’ al ĝi la fiŝkaptistoj ne plu bezonas hazarde riski sian vivon por fari fiŝkaptadon sur la maro. Vidalvide al la loĝ-punkto la Hejmo de Laboristoj, situanta sur deklivo de Vuhu-

monto, staras la Amikeca Klubejo, kie la fiŝkaptistoj sin klerigas kaj amuzas. Ĝi estas la plej granda el la 14 klubejoj de la tuta insularo. La centra teatro de la klubejo enhavas pli ol 1,300 sidlokojn. Tie oni povas kaj projekcii filmon kaj prezenti teatraĵojn. Maldekstre de la teatro estas la de fiŝkaptistoj tre frekventataj biblioteko, legejo de ĵurnaloj kaj gazetoj, ŝakludejo kaj tabloteniso-ludejo, kaj sur la supra etaĝo estas ankaŭ megafondisaŭdiga stacio. Kiu povus kredi, ke antaŭ 11 jaroj la grundo sub tiu ĉi etaĝdomo estis ĝuste la milit-ekzercejo de usonaj kaj Ĉiang Kajŝek-aj soldatoj? Kiu povus kredi, ke oni elterigis pli ol 30 usonajn M-14 kemininojn ĝuste en la areo de malpli ol 20 kv. metroj de la podio de la militekzercejo?

Ankaŭ arboj kaj floroj enkondukitaj el diversaj lokoj de la lando bone prosperas sur la insularo. Ĉi tie sin trovas salikoj devenintaj de sur la bordo de la Okcidenta Lago de Hangĝoŭ, rinantoj el Jatsen-parko de Pekino, vinberarboj el Kingdaŭ, ĉiamverdaj kamforarboj el Gianghi-provinco ktp.

Dank’ al la subteno de la ŝtato per pli ol 3,415,800 juanoj, la novaj mastroj de Daĉen-insularo nove konstruis artefaritan lageton de sensala akvo, kiu povas provizi la fiŝkaptistojn de la tuta insularo kaj aliaj lokoj per sufiĉe da trinkebla akvo, kaj ĉ. 2,000 ĉambrojn da loĝejoj. Sur la marbordo, kiu antaŭe estis eroziita de la ondegoj kaj dense kovrita de ĥaosaj ŝtonoj, nun sin etendas ŝoseo longa je 1,100 metroj kaj larĝa je 5 metroj, ĉe kies rando staras en vico diversaj etaĝdomoj de magazeno, vendejoj de cigaredoj kaj alkoholaĵoj, restoracioj, poŝtofiĉejo,



Milicianoj de la Daĉen-insulara Popola Komunumo.

ŝipriparejo, grenproviza stacio k. c. Ĉiuvespere, kiam la generatorbruo ekaŭdiĝas, lampoj tuj brile lumigas la insularon kaj megafonoj laŭte dissendas kantojn: La tuta insularo dronas en ĝojo.

Daĉen-insularo ne nur jam forigis siajn vundojn kaŭzitajn pro la detruo de la Usono-Ĉiang-aj reakciuloj, sed ankaŭ turniĝis en insulojn de riĉa vivo kaj multe disvolvita edukado. Ĉiuj vendejoj estas plenplenaj de flankaj manĝaĵoj, cigaredoj kaj diversaj aliaj komercaĵoj. Dum la fiŝabundaj sezonoj la totala valoro de disvenditaj komercaĵoj en ĉiu tago atingas pli ol 1,000 juanojn. La plej amase vizitata estas la ĉiovenda magazeno kaj la plej multe disvendataj komercaĵoj estas lanfadenoj, silkaĵoj, kaŭĉukaj ŝuoj kaj diversaj trikotoj. Sur la insularo sin trovas, krom kvar elementaj lernejoj kaj unu kurso por mezlernejoj, ankaŭ du duonterkultura-duonlernaj elementaj lernejoj kaj kvar postlaboraj elementaj lernejoj. Ankaŭ la hospitalo kaj kuracejoj sur la insularo estas nove starigitaj. Hodiaŭ la lernaĝaj infanoj povas viziti lernejon, la malsanuloj povas esti ĝustatempe kuracataj kaj la fiŝkaptistoj fariĝis ĉefaj spektatoroj de teatraĵoj kaj filmoj. Kiom malsama estas la nuna situacio ol tiu dum la Usono-Ĉiang-a regado antaŭ 11 jaroj! La naŭdek-jara maljunulo Kong Giangpo, postvivanto de la Daĉen-insulara katastrofo, diris kun senlima ekscitiĝo: "Mi venis al Daĉen-insularo en la aĝo de 24 jaroj kaj ĝis nun vivas ĉi tie jam 66 jarojn. En la pasinteco, kiel ni fiŝkaptisto-almozuloj povus sendi niajn infanojn al lernejo, ne povante plenigi niajn malsatajn stomakojn? La famaj opertrupoj eĉ ne volis prezenti teatraĵojn sur nia malriĉa insularo. Sin trovis ĉi tie ja unu hospitalo, sed ĝi ne funkciis por ni. Malsaniĝinte la malriĉuloj povis fari nenion alian ol bruligi incensojn por peti kompaton de dioj. La estanteco diferencas de la pasinteco same kiel la paradizo de la infero."

GARDOSTARANTOJ ĈE LA FRONTO POSTENO DE LA INSULARO

La novaj mastroj de la insularo neniam forgesas pri la detruo al tiu ĉi insularo fare de la Usono-Ĉiang-aj reakciuloj, tial ili ĉiam gardostaras kun vigla atenteco ĉe la insulara fronta posteno sur la sudorienta teritoria maro de nia lando. Ili neniam forgesas militekzerci sin obstine kaj pene por akiri bonegan batalkapablon kaj tiel fariĝi kuraĝaj pordogardantoj de la patrio.

La juna milicanino Luo Hianjing estas knabino deveninta el malriĉkampana familio. Kvankam ŝi aliĝis al la milico nur antaŭ nelonge, tamen ŝi jam plurfoje honore akiris bonegajn atingaĵojn en fusila celpafado pro sia diligenta ekzercado dum postlaboraj horoj. En 1964, aŭdinte, ke milicanoj de la proksima Venling-gubernio ekstermis surmare armitajn spionojn de la Ĉiang Kajŝek-a bando, ŝi do aldonis al siaj ekzerc-objektoj unu novan: pafado al flosanta celaĵo. Post penega ekzercado finfine ŝi akiris sinsekve sep bonegajn markojn en sep prezentadoj de pafado al flosanta celaĵo. Ankaŭ ŝiaj gefratoj estas multe laŭdataj milicanoj. Ankaŭ la barbiroj kaj komizoj, kiuj ne bezonas surmariĝi, fariĝis lertaj pafantoj. La batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiuj gardas la insularon, estas centoble pli vigl-atentaj kaj ĉiam pretaj doni pezan baton al malamikoj, kiuj kuraĝos nin ataki.



En Konstruado

ELEKTRO SERVAS AL PLI GRANDA PARTO DE LA ĈINA KAMPARO — Elektro estas nun uzata en parto de la vilaĝoj de pli ol 1300 el la 2100 gubernioj de Ĉinio.

Dum la lastaj jaroj, retoj de elektra energio multe disvolviĝis en la vasta kamparo de Ĉinio, precipe en la ĉirkaŭaĵo de grandaj urboj kaj la ĉefaj produktregionoj de greno kaj kotono. Ekde 1957 ĝis nun, 24-oble pliiĝis la kvanto de elektro uzita en la kamparo de la lando. La kamparaj alttensiaj dratoj atingis jam pli ol 126,000 kilometrojn.

JILI-ĈEVALOJ PLIMULTIĜIS — La famaj Jili-ĉevaloj de la montaro Tianŝan, Hingiang, plimultiĝis 12-oble en komparo kun tiuj nombritaj komence de la Liberiĝo, laŭ la statistiko farita en septembro, 1965.

Tiu ĉi specio estas bela kaj giganta, sed kun milda temperamento. Ĝi estas rapidmova kaj kapabla akomodiĝi al diversaj vivkondiĉoj. Kvarrada ĉarego kun paro de Jili-ĉevaloj povas porti la ŝarĝon de 1200 ĝis 1500 kilogramoj. Rajdado sur Jili-ĉevalo por 50 kilometroj bezonas nur 2 horojn kaj 18 minutojn. Jili-ĉevaloj plurfoje gajnis la unuan premion en la rajdkonkurso de la Unua Tutlanda Sportkunveno kaj en aliaj tutlandaj sportkonkursoj.

HORLOĜKONKO EL FAJENCO — Fabrikoj kaj produktaj kooperativoj de fajencaĵoj en Jihing-gubernio, Giangsu-provinco, fama pro siaj belaj fajencoj, projektis kaj elfaris lastatempe novan produkton de fajencaj horloĝkonkoj. La produktaĵoj kovras kvar specojn de fajenco de Jihing kaj estas tre belaj kun nacia stilo.

PRECIZA TEMPODETERMINADO — Nun la norma tempo fiksita de la ĉinaj tempobservadaj institucioj estas tiel preciza ke ĝia eraro ne superas du milonojn. Tiu ĉi alte preciza norma tempo estas difinata de la Ŝanhaja Observatorio laŭ la ciferoj de observado, ricevado kaj tenado de tempo elmetitaj de 4 koncernaj institucioj, nome, la Ŝanhaja Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Nankina Zigin-monta Observatorio, Prepara Oficejo por Pekina Observatorio kaj la Instituto de Geodezio kaj Geofiziko de la Ĉina Akademio de Sciencoj en Vuhan, kaj la norma tempo estas elsendata al la tuta lando kaj la tuta mondo per speciala radiostacio.

Tiel

Mi Servas

al

Agrikulturo

GONG GIDAŬ

Profesoro de la Ŝengjang-a Agrikultura Kolegio

ĜUSTA DIREKTO

Kiam mi faris agronomiajn esplorojn en la malnova socio, mi ĉiam prenis por mi temojn ankoraŭ ne tuŝitajn de aliaj personoj. Tiuj studoj estis tute senutilaj por plibonigo de varioj kaj plialtigo de produktado. La ununura celo de ili estis verki kelkajn disertaciojn, kiuj povis porti al la aŭtoro kaj famon kaj profiton.

En la nova Ĉinio, dank' al la zorgema instruado kaj helpo de la Partio mi eksciis, ke la vojo trairita de mi estas erara, kaj ke agronomiaj laborantoj devas servi al la agrikultura produktado. Ne nur la esploraj temoj devas tute konformi al la bezonoj de la kamparanaro, sed ankaŭ la esplorado ne devas esti limigita al tiu en la laboratorio. La scienca studado devas esti farata kun partopreno de la vastaj amasoj de kamparanoj. La celo de scienca studo devas esti ne nur verki disertacion sed ankaŭ vaste apliki la atingojn al la praktiko de agrikultura produktado

ĈIO POR LA PRODUKTADO

En 1955, mi havis la okazon vidi la sorgon Okkapulo, enkondukitan el fremdlando. La supereco de tiu ĉi vario de sorgo estas altprodukteco. Ĉiu muo da ĝi donas 250 ĝis 300 kilogramojn, kaj la plej alta po-mua produktokvanto atingas 500 kilogramojn. Sed bedaŭrinde, ĝia greno ne estas tiel bongusta, nome la grajnoj gustas iom akre post kuro. Pro tio, oni ne bonvenigas ĝin. Konsiderinte pri la bonaj kaj malbonaj karakteroj de tiu ĉi sorgo, mi planis kulturi novan varion tiel altproduktan kiel Okkapulo kaj tiel bongustan kiel la alttiga vario. La kolegio, kie mi laboras, estas en Liaŭning-provinco regiono tradicie produktanta sorgon, kie la amasoj jam kutimiĝis manĝi sorgon. Se oni povas elkulturi tian altproduktan kaj bongustan novan

varion, tiam ĝi kontentigos la bezonojn de produkto kaj de la amasoj. Aŭtune, mi komencis kolekti materialojn pri kulturado de nova vario.

Subtenate de la kolegia partia komitato, la kultura laboro de la nova vario progresis glate. Tio kion mi selektis estis la posteulo de natura hibridigo de Okkapulo kun la loka sorgo. La hibridaj plantoj estas variaj en alteco kaj maturperiodo. Teorie, tio estas nomata fenomeno de disiĝo. Laŭ genetiko, la posteuloj de hibridaj varioj de malproksimaj sangoj povas stabiligi nur post long-tempa disiĝo. Fremdlandaj materialoj raportas, ke la posteuloj de kelkaj sange malproksimaj plantoj ofte daŭras disiĝi post eĉ pli ol dek jaroj aŭ pli longe. Se Okkapulo agas en la sama maniero, ĉu ĝi povas esti disvastigita en mallonga tempo por kontribui al la agrikultura produktado? Laŭ la penso de Prezidanto Maŭ en sia verko *Pri Praktiko*, mi solvis la problemon. Mi analizis kaŭzon de la nestabileco de la nova vario, detale kaj bone konis la leĝon de ĝiaj kresko kaj disvolvado, kaj fine adoptis konformajn kulturajn metodojn. Konstante resuminte la spertojn kaj farinte novajn provojn, en la daŭro de kvin jaroj, mi fine en 1960 elkulturis la novan varion Disbranĉiga Ruĝkapa Sorgo, kiu estas stabila, altprodukta kaj bongusta.

DISVASTIGO EN REALA PRODUKTADO

Post la sukcesa elkulturo de la nova vario, oni devas fari regionajn eksperimentojn por determini ĝian pliproduktivon kaj lokojn, al kiuj ĝi povas kutimiĝi, kaj nur post tio oni povas ĝin disvastigi sur grandaj areoj. Sed la regionaj eksperimentoj de Disbranĉiga Ruĝkapa Sorgo en la jaroj 1962 kaj 1963 malsukcesis sinsekve. La konkludo estis, ke ĝi kreskas malbone, maturiĝas malfrue kaj produktas malmulte. Tamen tiu ĉi nova kreaĵo donis altan produkton en miaj malgrandaj eksperimentaj kampoj kaj aliaj malgrandareaj kampoj. Ekzemple, Huang Juanling, maljuna modelo de produkto, konstatis laŭ siaj multjaraj spertoj, ke tiu ĉi disbranĉiga vario ŝatas lumon kaj sterkon, kaj akiris riĉan rikolton per maldensa plantado kaj plimultigo de sterko.

La spertoj akiritaj de kamparanoj en sia produkta praktiko kuragiĝis nin persiste daŭrigi niajn regionajn eksperimentojn. Iom poste, post enketo en la loko, ni trovis ke la ĉefa kaŭzo de nia malsukceso en la regionaj eksperimentoj estas la neĝusteco en kulturado. Tiam, unuflanke ni faris malgrandareajn eksperimentojn en Gianĉang-gubernio, Liaŭning-provinco kaj aliflanke ni faris sur niaj eksperimentaj kampetoj eksperimentojn pri diversaj kulturaj metodoj.

En 1964, sub la gvidado de la partia komitato de Gianĉang-gubernio ni faris, kune kun kamparanoj, surbaze de la sperto akirita en la antaŭaj du jaroj, teknikan programon de kulturado de Disbranĉiga Ruĝkapa Sorgo por helpi la kamparanaron en provkulturado. En tiu jaro, oni semis en Gianĉang-gubernio 20,000 muojn per tia sorgo, kaj akiris meznombro 254 kg. po muo, kio estas ĉirkaŭ 50% plimulte ol la po-mua produktokvanto de ordinara sorgoj. Pro tio, ĝi estas treege bonvenigata de la amasoj kaj nomata de ili "altprodukta greno".

Ginggang-monto—la Unua Bazloko de la Ĉina Revolucio

GINGGANG-monto estas la unua revolucia bazloko de la ĉina proletaro por armita luktado, la fortokolektejo kaj star- kaj elir-punkto de la revolucio.

La monto situas en la okcidenta parto de Gianghi-provinco, limtuŝas Hunan-provincon, apartenas al la norda sektoro de Vanjang-montaro de Luohiaŭ-mont-ĉeno. Ĝia plej alta loko superas la marnivelon je pli ol 1,800 metroj. La montregiono, kun Ciping kiel la centro, ampleksas kvin basenojn kun malsama vasteco nomatajn Daging, Hiaŭging, Ĝungging, Ŝangging kaj Hiaging. Ĉiujn basenojn ĉirkaŭas krutaj montoj kovritaj de arbaroj. Por eniri ilin oni devas iuloke trapasi elhakitan vojeton sur rokmuro traireblan nur por unu homo, aŭ surgrimpi 2,900 ŝtonajn ŝtupojn. Loko vere grava en milito pro sia facile-defendebleco kontraŭ atakoj.

En aprilo de 1927, Ĉiang Kajŝek fabrikis sangan ŝtatenverŝon, grandskale masakris revoluciajn laboristojn kaj kamparanojn. Ekde tiam la ĉina popolo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, batalis kontraŭ la armita kontraŭrevolucio per la armita revolucio. En oktobro tiujare, kun malpli ol mil laborist-kamparanaj ruĝarmeoj sub sia gvido, kamarado Maŭ Zedong eniris Ginggang-montregionon kaj starigis tie revolucian bazlokon. La militmarŝo kondukis la armitajn revoluciajn fortojn retiriĝi el la urboj, turnis la ĉefajn atakojn de la revolucio al la kamparo kie la kontraŭrevolucio estis malforta sed kuŝis profunda bazo de revolucia popolamaso — la revolucio suriris la sole ĝustan vojon paŝpostpaŝe ĉirkaŭi kaj fine konkeri la urbojn per la revolucia kamparo.

Tio ĉi estis granda turnopunkto en la strategio de la ĉina revolucio.

Sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong, la Ĉina Laborist-kamparana Ruĝa Armeo, sin bazante sur Ginggang-monto, bone kombinis la armitan batalon, agraran revolucion kaj starigon de revolucia regpotenco, tial disvolviĝis kaj plifortiĝis tagon post tago la revolucia armita forto de la laboristoj kaj kamparanoj.

En aprilo de 1928, Ĉiang Kajŝek, la ĉefo de la kontraŭrevolucia kliko, mobilizis la ĉefajn armeojn el Hunan-kaj Gianghi-provincoj por sieĝi Ginggang-monton. Tamen la Ruĝa Armeo alprenis gerilan taktikon, donis unu post alia gravajn batojn al la malamikoj, kaj akiris gran-

degan venkon. En januaro, 1929, gvidate de kamarado Maŭ Zedong la Ruĝa Armeo venis de sur Ginggang-monto sudorienten por starigi novan bazlokon.

Post la Liberiĝo, en la regiono de Ginggang-monto grandskale iris ekspluatado de ĝiaj naturaj riĉfontoj kaj konstruado. Multaj gejunuloj plenaj de revolucia entuziasmo, meminciate venis tien de diversaj partoj de la lando por partopreni la ekspluatadon de la montregiono. Ciping — la centro de la regiono, la iama sidejo de la Speciala Komitato de la Hunan-Gianghi-a Limregiono de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la Demokratia Registaro de la Laboristoj kaj Kamparanoj de tiu limregiono, nun jam fariĝis urbo tute nova. En la pasinteco Ginggang-monto estis loko “kun malpli ol du mil loĝantoj kaj malpli ol dekmil dan-oj* da greno”, sed nun ĝi jam havas preskaŭ cent elementajn lernejojn, kvin mezlernejojn kaj unu komunisman universitaton de laboro faman tra la tuta lando, kiu altiras al si sen-nombrajn gejunulojn por duonlabori kaj duonlerni. La agrikulturo, industrio, forstokulturo, paŝtado, kulturo kaj edukado akiris grandan disvolviĝon. Ni prenu la industrion kiel ekzemplon, nun funkcias en ĝi dekoj da fabrikoj kiaj hidroelektrejo, maŝinfabrika, paperfabrika, vinpreparo, plant-olea preparo k. a.

Hodiaŭ en la regiono de Ginggang-monto alte flirtas la ruĝa flago de revolucio kaj ĉie regas energi plena prospero.

* 1 dan-o = 50 kg.

Loĝdomo de Prezidanto Maŭ (meze) en Ginggang-montregiono rekonstruita post la Liberiĝo laŭ la originalo.





KANTO AL REVOLUCIO

Notoj pri la Kolektiva Gimnastika Prezento en la Dua Tutlanda Sportkunveno

LA inaŭguron de la Dua Tutlanda Sportkunveno de la nova Ĉinio brile kolorigis la grandioza kolektiva gimnastika prezentado "Kanto al Revolucio" kiun partoprenis pli ol 16,000 gejunuloj kaj infanoj kaj spektis kun admiro la vasta amaso da rigardantoj de Pekino.

Tiu ĉi kolektiva gimnastika prezentado konsistanta el 7 partoj spegulis, per klaraj temoj de politiko, belaj formoj kaj perfekta gimnastika arto, la revolucion spiriton de nia popolo strebi al prospero sin apogante sur la propraj fortoj. Ĝi montris la feran volon de niaj 650,000,000 popolanoj heroe lukti por defendi sian patrion kaj oponi la agreson

de la usona imperiismo kaj konduki la revolucion ĝis la fina venko. Kun granda fervoro ĝi prikan-tis la brilajn sukcesojn de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado en nia lando, kaj la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong.


Apenaŭ eksonis la muziko de la "Prologo", kiam bildo de vasta maro kun verdaj ondetoj kaj disko de ruĝa suno malrapide leviĝanta kun brilaj radioj ekaperis sur la fono vizaĝe al la estrado. Tiu ĉi bildego 133 metrojn larĝa kaj 40 metrojn alta estis kune formita per diverskoloraj kartonpe-coj tenataj en la manoj de pli ol 8500 junuloj kaj infanoj bonorde sidantaj sur la ŝtuparo. Ĉiu fono-

bildo estis en preciza kongruo kun la temo de prezento sur la sportejo kaj fariĝis harmonia parto de la gimnastika prezentado.


En la sama tempo, pli ol 700 knabinoj kaj 400 knaboj kun ruĝaj kaj flavaj girlandoj kaj bukedoj sin movis en la prezentejon kaj formis grandegan kvinpintan stelon en ruĝo kaj dek grandajn girlandojn. Dume la fonobildoj variis laŭ la temo prezentata.

Akompanate de la majesta muziko "Ruĝas la Oriento" aperis sur la fono grandega portreto de Prezidanto Maŭ, pli ol 30 metrojn alta, 20 metrojn larĝa, kaj miloj da floroj ridas balanciĝante al la estrado. Jen pli ol 400 infanoj kuras el la "florbedo" svingante buntajn florojn kaj akklamante "Vivu Prezidanto Maŭ!" en direkton al la estrado kaj la ĉirkaŭaj sidŝtuparoj por prezenti florojn al Prezidanto Maŭ, Prezidanto Liu kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato kaj ankaŭ salutojn al la publiko.

Sceno el la 5-a parto "FIRME TENU LA PAFILON".



JAN NAJHUA



Sceno el la 6-a parto "RUĜAJ DAŬRIGANTOJ DE LA REVOLUCIO".

Tondris jen kaj jen manklakoj en la tuta sportejo.

Kiam komenciĝis prezento de la dua parto "ALTEN LEVU LA TORĈON DE REVOLUCIO!"

tuj montriĝis, sur la fono, bildo de torĉo kaj kolosa slogano "marŝu antaŭen kuraĝe alte tenante la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong!" Pli ol mil junuloj en blankaj sport-kostumoj marŝis kun levata kapo kaj elstara brusto, alte tenante torĉojn el ruĝa silko kaj vigle ŝanĝadis sian vicformon, simbolante ke la revolucia fajro disvastiĝas en ĉiujn direktojn. Subite oni vidis la imponan panoramon de la Ĉielpaca Pordego sur la fono. La prezentantoj sin formis en gigantan nacian standardon de Ĉinio 50 metrojn longan kaj 38 metrojn larĝan, el pli ol 2300 metroj da ruĝa silko. La ruĝa standardo milde flirtis laŭ la movoj de la prezentantoj kiuj jen leviĝis, jen malleviĝis sub ĝi. Tiu ĉi grandioza bildo simbolanta la brilan venkon de nia revolucio vekis varmajn aklamojn kaj aplaŭdojn ĉe la spektantaro.

Nun venis la tria parto "APOGU NIN SUR LA PROPRAJ FORTOJ KAJ STREBU AL PROSPERO!" pli ol mil studentoj laboriste vestitaj en bruno komencis sian prezentadon laŭ la muziko "Ni Laboristoj Estas Fortaj". Sur la fono ekaperis samtempe bildo de fandejo kie ŝtalfluo kuris ambaŭdirekten kun disŝprucantaj fajreroj, ĉ. mil laboristinoj ludataj de studentinoj eniris la sportejon svingante ruĝajn silkojn. La gejunuloj faris bele kaj bonorde fortajn movojn de martelado, segado, putoborado, teksado ktp. kaj bone montris per la eleganta gimnastika ludo la revolucionan spiriton de la ĉina laboristaro diligenta en laboro kaj malcedema al malfaciloj.

Subite vidiĝis sur la fono la petrolkampo de Daking kun arbaro de altaj putoframoj. Kaj en la ludejo la gelaboristoj formis ondantajn vicojn kiuj impresis kvazaŭ torenta oleo-fluo. Tiu pre-

zento vekis koran aklamon de la tuta spektantaro pro la granda frukto kiun akiris niaj petrolistoj en la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj strebado al prospero.

La kvara parto estis "BONA ESTAS LA POPOLA KOMUNUMO" en kiu ludis pli ol mil junulinoj en kostumo de kamparaninoj. Ili dancis alegrete laŭ la melodio de "Lernu de la Daĝajanoj kaj Ilin Kuratingu", svingante kotonkapsulojn kaj tritikospikojn. Ili imitis diversajn labormovojn: semi, transplanti rizplantidojn, falĉi tritikon, kolekti kotonon..... Dume aperis sur la fono kombajno kuranta en ora kampo kaj poste bildo de abunda rikolto de grenoj kaj prospero de brutoj. Ĝojkrioj "Bona estas la popola komunumo!" "Bona ja estas la popola komunumo!" sonis kaj resonis tra la tuta ludejo, esprimante la firman volon de niaj kamparanoj iri la vojon de socialismo.

Sonoj de klariono laŭte aŭdiĝis el la megafonoj, kiam aperis sur la fono kolosa slogano "La tuta popolo en armoj ja estas senlime fortega". Tio anoncis la komencon de la kvina parto "FIRME TENU LA PAFILON". Milica trupo kun fusiloj kaj alfkisitaj bajonetoj, marŝis vigle kaj brave kaj sin ekzercis pri celpafado kaj pikbatalo en ordaj vicoj. Nun oni vidis afiŝon kaj sloganon sur la fono "Helpu al Vjetnamio en rezisto kontraŭ Usono", "Ni nepre liberigos Tajvan". Kaj la milicanoj sur la placo faradis fortajn pikojn en ekzercado kun laŭtaj batalkrioj. Estis neeble por la okuloj de la rigardantaro kapti samtempe ĉion vidindan kaj tondris el ĝi manklakoj de tempo la tempo.

Sekvante la aperon de vivsimila bildo de junpionirino kun bukedo sur la fono, pli ol 1300 ge-

Ĉirkaŭ la Konkursejo

— Notoj pri la Dua Tutlanda Sportkunveno —

Ekde la 11-a ĝis la 28-a de sep., 1965, en Pekino okazis la Dua Tutlanda Sportkunveno. Dum tiuj tagoj, oni trovis ĉe ĝiaj laborantoj kaj sportistoj entuziasmon, modeston kaj la noblajn interlernemon kaj interhelpemon, kiuj rikoltis laŭdojn de ĉiuj rondoj. Jen kelkaj epizodoj pri ili.

LA SUKCESOJ APARTENAS AL LA KOLEKTIVO

Kiam Liang Bogjun, sportisto el la Fugian-provinca Teamo de Volano ripozis en la ĉambro, subite la pordo estis malfermita kaj eniris Tang Hianhu, la ĉampiono de la unuopa konkurso de volano. Li enŝovis brilan ormedalon en la manon de Liang, sincere dirante: “La sukceso estas atingita per la helpo de la kamaradoj, kaj ankaŭ vi kontribuis por ebligi al mi gajni la ĉampionecon. Tiun ĉi medalon mi donacas al vi.”

Ĉar Liang ne anoncis sin por la konkurso kaŭze de la limigo al la nombro de partoprenantoj, sed li ĉiumaniere helpis la aliajn pliperfektigi volanarton por la konkurso. Kvankam li vundiĝis je la kruro, tamen li ludis, malgraŭ la doloro, kun sia kamarado Tang por lin ekzerci kaj helpis lin en resumado de spertoj.

Tiel Tang gajnis poste la ĉampionecon de la vira unuopa konkurso de volano, kaj la trian lokon en la vira duopa kaj estis premiita per unu ora kaj unu bronza medaloj.

GRATULON KE VI ROMPIS MIAN REKORDON

He Zufen, sportistino de mallonga kuro el Siĉuan-provinco rompis la landan rekordon de 24.3 sekundoj de la 200-metra virina kuro. Jam teninta ĉi tiun rekordon dum pli ol 6 jaroj, la veteranino pri trako-kampaj sportoj, Giang Jumin, diris al He: “Gratulon ke vi rompis mian rekordon!” kaj kuraĝigis ŝin penadi plu por akiri pli grandan sukceson.

Giang Jumin diris: “Antaŭ kelkaj jaroj, aliaj trako-kampaj sportoj jam atingis, unu post alia, pli bonajn rezultatojn, sed, nur la virina mallonga kuro estis escepto, montrante neniun signon de progreso. Oni ofte min demandis: ‘Ankoraŭ ne rompita restas via rekordo! Pro kio do?’ Sciu, kiel maltrankvila mi estis! Nun la rekordo estas rompita, do mi sentas ĝojon nedeteneblan!”

KIAM LA RIVALO VUNDIĜIS

En la fina maĉo de piedpilko kiam streĉe konkursis la teamoj de Liaŭning-provinco kaj la Popola Liberiga

pioniroj aklamante kuris sur la placon kaj komencis la sesan parton “RUGAJ DAŬRIGANTOJ DE LA REVOLUCIO”. Akompanate de alegreto ili faris movojn de korpekzerco, naĝo, remo, flago-parolo kaj formis hompiramidojn. Ili prezentis, interalie, kalistenajn movojn de surmana starado, linia etendo de la gamboj, dorsflanka arkiĝo de korpo, staro sur unu piedo k. a.

Sur la fono, vidiĝis nun aro da sunfloroj, inter kiuj estis ses grandaj ideografiaĵoj skribitaj infanmaniere, kun la signifo “Ni amas laboron”, kaj la infanoj sur la placo komencis ŝoveli, sarki, semi kaj akvumi por plantado de arboj.....

Kiam aperis sur la fono bildo de du junpioniroj, ĵurpromesantaj kun levitaj manoj daŭrigi la revolucion, la infanoj sur la ludejo kunkantis la kanton “Ni Estas Daŭrigantoj de la Komunisma Afero”, kaj formis dume gigantan torĉon de revolucio montrante la deziron de la milionoj kaj milionoj da ĉinaj infanoj.

La lasta parto “KONDUKU LA REVOLUCION ĜISFINE” atingis la kulminon de bolanta ĝojo en la prezentado. Nun ĉiuj pli ol 8000 partoprenintoj de la antaŭaj ses partoj eniris en la sportejon kaj kun la bunta kaj varianta hompiramido simbolanta lumturon kiel la centro, oni formis gigantan kvinpintan stelon. Reprezentantaj figuroj de la laboristaro, kamparanaro kaj soldatoj staris, ŝultro ĉe ŝultro, sur la pinto de la piramido. Ĉirkaŭe densaj tavoloj de homoj kune formis grandiozan kvadraton multkoloran.

Pli kaj pli laŭtiĝis la kanto sur la placo. La pli ol 8000 prezentantoj potence kriis kun brakoj levitaj: “Subtenon al Vjetnamio! For la usonan imperiismon!” Nun denove montriĝis, antaŭ la spektantoj, la granda slogano “Konduku la revolucion ĝisfine” kaj aplaŭdoj tondris el la tuta ekscitita publiko, esprimante la neŝanceblan revolucionan volon de la tuta popolo de Ĉinio.

Armeo, ĉefa piedpilkisto de la liaŭninga teamo, sporto-
majstro Gaj Zengŝeng, subite falis en kurego, vundiĝis
je la genuo kaj ne povis sin levi. La maĉo ĉesis portempe.
Medicina laboranto de la PLA-teamo kun sako de me-
dikamento kuris al la vundiĝinto, faris al li rapidan
bandaĝadon kaj ankaŭ la PLA-teamanoj alkuris por
doni sian helpon.

La sekvantan tagon, respondeculo de la PLA-teamo
kun korbo da fruktoj faris konsolan viziton al Gaj
Zengŝeng en la nomo de sia tuta membraro. Ankaŭ
la kolegoj de la gilin-provinca teamo estis tre zorgemaj
pri lia vundo. Guo Hongbin, trejnisto de la liaŭning-
provinca teamo diris kortuŝite: "Ŝanĝiĝis la socisistemo,
ŝanĝiĝis ankaŭ la rilato inter la sportistoj. En la malnova
socio, se ĉefa piedpilkisto de iu teamo ne povis plu
ludi pro vundiĝo, tio estis afero ĝojinda kaj multe
dezirata por la rivala teamo, kaj tiu ĉi certe ne sin ĝenis
per prizorgo aŭ konsolo al li."


"SPERTON AKIRI" KAJ "SPERTON LIVERI"

En konkursado de motorciklistoj, Ma Ginĝang de
la PLA-teamo estas lerta pri rapidega veturado sur kurba
vojo. Tial dum tempo de ripozo, multaj motorciklaj
sportistoj venis ĉirkaŭ lin por akiri de li koncernan
sperton. Ma Ginĝang fervore komunikis al ili sian
sperton en veturo tra kurba vojo, pri elekto de vojlinio
kaj premado de la tenilo ktp, ĝis kiam ĉiuj kontentiĝis.

Ma Ginĝang tiel agis kun la novuloj, kaj tiel same
kun la fortaj rivaloj. Dum la ekzercado antaŭ la duavica
kurado tra kamparo, la fama motorciklisto el la ŝanhi-
provinca teamo, Li Jingŝan, ne povis ne halti pro mal-
sukceso funkciigi la veturilon je la plej alta rapideco.
Ma komunikis al li sian sperton pri ĝia bona funkciigo.
Li Jingŝan kortuŝiĝis kaj diris: "Ni lernoakiris de la PLA
ne nur novan teknikon, sed ankaŭ ĝiajn bonan penson
kaj noblan stilon."

INTER JUĜANTOJ KAJ SPORTISTOJ

Pli ol 1000 juĝantoj laboris en la Dua Tutlanda
Sportkunveno. Ili prenis sur sin ĉiujn preparajn laborojn
sur la sportejo, ekzemple, klarigi al la sportistoj la
regulojn, aŭskulti iliajn opiniojn kaj antaŭpreni kontraŭri-
medojn por eviti misjuĝojn dum konkurso. Dum la
konkursoj ili estis seriozaj kaj justaj. Kaj la sportistoj
havis eblon, pro tio, plene disvolvi sian arton eminentan.
Okaze de ia misjuĝo, trovita surloke, ĝi estis tuj korektita
surloke de la juĝanto; trovita poste, la juĝanto vizitis
la koncernan teamon por fari memkritikon kaj korekti
ĝustatempe la eraron. Kaj la sportistoj multe respektis
la juĝantojn. Kiam ili trovis misjuĝon de la juĝanto,
ili ne parolis tuj pri tio dum la konkursado sed atendis
ĝis ia konvena horo. La vasta rigardantaro diris:
"Antaŭ la Liberiĝo, juĝantoj kaj sportistoj estis mal-
amikoj, kiuj agis mallice unu kontraŭ alia. Sur la
sportejo ofte iris senfinaj kvereloj inter ili, sed nun ili
solidariĝis kaj klopodas por akiri novajn sukcesojn
en fizika kulturo de la patrio. Tio ĉi ja estas nova
moro de la nova socio."



Arkpafistino el la Popola Liberiga Armeo, mondrekordulino, Li Šulan (maldekstre) helpas la tibetan arkpafistinon Jangĉan.







La Tibeta Piedpilka Teamo, kiu la unuan fojon partoprenis la tutlandan sportkunvenon, prezentas varman gratulon al sia venkinta rivalo, la Ŝanhaja Piedpilka Teamo.



Leng Gujĝing (pafiltenanto), ĉampiono en la konkurso pri virina, libera, etkalibro-fusila pafado en pozicioj kuŝanta, surgenua kaj staranta po 30 pafoj, komunikas sian sperton al la pafistinoj el Hingiang.

Novaj Rekordoj de la Dua Tutlanda Sportkunveno

I. Novaj Mondaj Rekordoj

	Sportoj	Rekordoj	Kreintoj
	Pezlevo Bantampeza, ekprena	113 kg. 115 kg.	Je Haŭbo
	Plumpeza, svinga	153 kg.	Hiaŭ Minghiang
	Arkpaŝado Virina, grupa, pounufoja, diversdistanca	3321 p.	Li Ŝulan, Vang Hihua, Ŝi Gujĝen
	Virina, grupa, podufoja, diversdistanca	6574 p.	Li Ŝulan, Ŝi Gujĝen, Vang Hihua
	Pafado Vira, libera, fusila, 300-metra, 40-pafa, surgenua	389 p.	Ŝju Hujmin
	Vira, kuranta cervo, 50 unuopaj pafoj (grupa)	926 p.	Han Ĉangfuj, Lin Feng, Ĝaŭ Juanĉun, Dong Fu
	Vira, kuranta cervo, 50 unuopaj pafoj (individua)	239 p.	Han Ĉangfuj
	Paraŝutado Vira, 1500-metra, grupa, preciza surteriĝo	1. 14 m.	Fang Pinbaŭ, Vu Ŝaŭkiu, Liu Ĝihua, Taŭ Gjunhua, Caŭ Giahjuan
	Vira, 600-metra, grupa, preciza surteriĝo kun prokrasta malfermo	4. 31 m.	Vang Gianje, Liu Ĝenĝong, Ĝang Fuoja, Du Kunming, Ĝu Jujiming, Han Gintang, Ĝang Baŭki, Hie Ŝaŭliang, Ĝang Guoĝeng

II. Novaj Landaj Rekordoj

Sportoj	Personoj	Fojoj	Eroj
Trako-kampaj ludoj	75	80	21
Naĝado	59	134	25
Pezlevo	28	52	22
Biciklado Konkurseja	9	14	10
Arkpaŝado	13	12	7
Pafado	83	57	19
Radiogramaj Ricevado kaj Sendado	24	79	18
Paraŝutado	30	29	4
Aviadilaj modeloj	2	2	1
Marŝipaj modeloj	7	10	3

Mallongigoj: kg. = kilogramo, p. = poento, m. = metro

Statistikoj pri

la Dua Tutlanda Sportkunveno

Estis sume 23 konkursoj kaj prezentoj en la Dua Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio. Krom 1 prezento t.e., la ĉina luktarto, ĉiuj aliaj estis konkursoj, nome, futbalo, basketbalo, volebalo, tabloteniso, teniso, badmintono, akvopolo, kamp-dromaj sportoj, biciklado (inkluzive de la konkursoj en ciklo-kurejo kaj sur ŝoseo), gimnastiko, pezlevo, skermo, naĝo, plunĝo, lukto (inkluzive de ĉinstila, internacia klasikstila kaj liberstila konkursoj), arkpafado, pafado, motorciklado (inkluzive de transkampara kaj ŝosea konkursoj), radiogramaj ricevado kaj sendado, paraŝutado, aerplano-modeloj, marŝipo-modeloj.

* * *

La Duan Tutlandan Sportkunvenon partoprenis 5922 gesportistoj, el kiuj 3911 estis viraj kaj 2011 virinaj. Post eliminado en apartaj regionaj preparkonkursoj de futbalo, basketbalo, volebalo, restis 3305 viraj sportistoj kaj 1709 virinaj, sume 5014 personoj, kiuj konkursoj en Pekino.

* * *

La gesportistoj estis el 28 nacioj nome, la hana, mongola, huja, tibeta, ujgura, mjaŭa, jia, ĝuanga, bujia, korea, manĉua, jaŭa, baja, tuĝjaa, kazaĥa, taja, vaa, tua, dahura, salaa, rusa, siboa, maŭnana, uzbeka, tatara, ovenkea, olunĉuna, luobaa. Kaj 445 el ili estis el 27 nacimallimultoj.

* * *

El la 5922 gesportistoj partoprenantaj en la Dua Tutlanda Sportkunveno 3330 estis sportistoj en diversaj rangoj kiel jene:

1128	Sportaj Majstroj
1710	Unuaklasaj Sportistoj
401	Duaklasaj Sportistoj
91	Triaklasaj Sportistoj

* * *

En la konkurso de la kamp-dromaj sportoj partoprenis plej multe da homoj, nome 833 homoj; en la konkurso de pafado 814 homoj; kaj de basketbalo 675 homoj (inkluzive de tiuj kiuj partoprenis la regionajn preparkonkursojn).

* * *

La plej multmembra delegacio al la konkursoj (inkluzive de la regionaj preparkonkursoj de futbalo, basketbalo, volebalo) estis la Sporta Delegacio de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kiu nombris 269 anojn; la Sporta Delegacio de Pekino, 263; la Sporta Delegacio de Ŝanhajo, 256.

Ĉarkondukisto

ĜANG ĜIMIN

I

*Li ekkondukis ĉaron je l' dekoka jaro;
Nun barbo lia jam similas al arĝento!*

*Sub zorg' de l' avĉjo jen glitkuras ĉaro
Kvazaŭ salika vergo en printempa vento...*

*La ĉaro kuras sur la tero?
Ne, ĝi ŝvebadas en aero!*

II

*Pri kio Avĉjo pensas mute, absorbite,
Kun la okuloj sub la varma larmvualo?*

*Ĉu pri la ĉarkonduko dors-ĝibiga
Aŭ pri la sesdek jaroj en la ĉevalstalo?*

*Ne! Pensas li: La ĉaro restas same tia,
La vojo ne ŝanĝiĝis.*

*La mond' sed iĝis jam alia!
Kaj l' homoj jam noviĝis!*

*Per ĉaro la riĉuloj ne plu faras konkubin-
rabadojn.*

*Hodiaŭ Avĉjo veturigas al kunveno ka-
maradojn.*

*Junuloj ridas laŭte,
Knabinoj kantas ĥore!*

*Okazos tuj Parti-kongreso de la popol-
komunumo.*

*Kiel reprezentanto ankaŭ li ĉeestos ĝin
honore...*

III

*Flirtetas fumspiralo,
Brilegas ruĝnubaro!*

*Jen kian energion havas Avĉjo!
Jen kiel grasas la ĉevalo!*

*Foriĝis jam, foriĝis jam la ĉaro,
La ridoj tamen daŭre ŝvebas super la
kamparo...*

Trad. VANG ĈONGFANG



Kultura Vivo

LA ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG, VOL. III ELDONIĜIS EN LA ANGLA KAJ TIBETA LINGVOJ — La tibetlingva eldono de la III-a Vol. de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong ekvendiĝis en Lhasa en okt., 1965, kaj ĝi ĝuis varman akcepton de la tibetanoj. En la sama tempo, la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, eldonis la libron ankaŭ en la angla lingvo por eksterlandaj legantoj.

LA UNUA PALACO POR GEKNABOJ EN TIBETO — La unua palaco por geknaboj en Tibeto malfermiĝis en septembro, pasintjare. Dum la inaŭguro, pli ol 500 geknaboj de la tibeta, han-a kaj huj-a k. a. nacioj en festaj kostumoj venis en la bele ornamitan halon de la palaco, akompanate de tamtamado kaj tamburado.

Tiu ĉi palaco situas en la antaŭa loĝkvartalo de mizeruloj. Ĝi kovras areon de 26,000 kvadrataj metroj kaj konsistas el aŭditorio, biblioteko, tablotenisa ĉambro, amuzejo, placoj por piedpilko, korbopilko, volebalo k. c. Krome, estas ankaŭ lokoj por aktivadoj utilaj al la sano de miloj da infanoj, kiaj ĉambroj por metiarta ekzerco, eksperimento kaj plantejo de fruktarboj kaj agrokulturaj kreskaĵoj.

ARTEFARITA KOROVALVO — Ĉanghaj-hospitalo dependa de iu milita medicina universitato en Ŝanhajo operaciis lastatempe iun malsanulinon pro serioza malordo de la koro. La operacio estis komplika kaj postulis grandan atenton. La hospitalo sukcese metis en la koron de la malsanulino artefaritan korovalvon enlande produktitan por substitui la malsanan.

Dum la tri monatoj post tio, tute malaperis la seriozaj palpacio, spirmanko, sangosputo k. a. simptomoj de la malsanulino, kaj ŝi povas ellitiĝi por sin ekzerci kaj promeni ofte ekster la ĉambro.

La artefarita korovalvo estis sukcese farita dank' al kunlaboro de kuracistoj kaj flegistoj en la hospitalo, laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Kaŭĉukaĵa Esplorojo, Ŝanhaja Fabriko de Kuracaj Aparatoj k. a., uzinte enlande produktitan materialon kaj ciferojn elkalkulitajn de ni mem.

Ekde la projektado ĝis la sukcesa operacio, oni faris serion da eksperimentoj ĉe animaloj kaj sume bezonis 2 jarojn kaj 3 monatojn.

Kial Mizeras Landoj en Azio kaj Afriko?

GUOHUA

Multaj landoj en Azio kaj Afriko estas konataj kiel ekonomie “nedisvolviĝintaj”, kiel landoj mizeraj kaj postrestaj. Sed kial ili estas “nedisvolviĝintaj”? Kial mizeraj? Kio estas la kaŭzo? Se oni ne povas trovi ĝustan respondon al tiuj ĉi demandoj, oni povas neniel trovi la vojon sin liberigi de mizereco, oni eĉ falos en la kaptilojn de imperiistoj kaj novaj kaj malnovaj koloniistoj, kaj sekve fariĝos ĉiam pli mizeraj kaj postĝintaj.

Plej elokventaj estas la faktoj, do ni prenu faktojn por respondi la demandojn supre menciitajn.

KONSERVADO DE PRIVILEGIOJ

En la pasinteco imperiismo kaj koloniismoj nova kaj malnova, akiris perforte de multaj landoj en Azio kaj Afriko diversajn privilegiojn, kiuj atencas la suverenecon kaj sendependecon de la koncernaj landoj, kaj nun ankoraŭ klopodas akiri novajn aŭ konservi la malnovajn. Ekzemple, la imperiismaj landoj kun Usono ĉe la kapo ĝuas en multaj landoj de Azio kaj Afriko la privilegion de starigo de militaj bazoj kaj

restado de trupoj, konservas eksterteritoriecon, ĝuas la rajtojn de terluo, esplorado kaj ekspluato de mineralaj riĉfontoj, direktado de doganaj aferoj, emisio de mono kaj trudas multe da klaŭzoj de malegaleco al tiuj landoj per provizo de tiel nomataj "helpoj". Estas tiuj ĉi privilegioj kiuj senigis ilin je rajtoj uzi siajn proprajn riĉfontojn de la naturo por konstrui siajn landojn memstare.

SUPERKONTROLADO DE EKONOMIAJ VIVLINIOJ

Imperiismo kaj koloniismoj nova kaj malnova, ankoraŭ nun superkontrolas la gravajn branĉojn de produktado kaj la vivliniojn de la nacia ekonomio de multaj aziaj kaj afrikaj landoj. La monopola kapitalo de kelkaj imperiismaj landoj kun Usono kiel la ĉefo superkontrolas pli ol 3 kvaronojn de la jam sciitaj naturaj riĉfontoj de la ĉefaj krudmaterialoj en la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj. El la totala produktokvanto de iliaj 22 specoj de krudaj materialoj, 4 kvinonoj estas superkontrolataj de la imperiisma monopola kapitalo. Ili superkontrolas ankaŭ grandajn plantejojn, grandajn entreprenojn, trafikon kaj transporton, en- kaj eksterlandajn telekomunikojn, bankojn kaj asekuradon, eksterlandan komercon ktp. por akiri altan profiton.

Koncerne petrolon, la plejparto de ĝiaj riĉfontoj en Azio, Afriko kaj eĉ en Latinameriko nun estas superkontrolata kaj monopoligata ankoraŭ de la monopolaj kapitaloj de la usona, brita kaj aliaj imperiismoj. El la totala produktokvanto de la eksportita petrolo de la mondo, 93% apartenis al aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj (laŭ la statistiko de 1961). Sed en la ekzemplo de la kvar ĉefaj landoj produktantaj petrolon en okcidenta Azio, dum la dek jaroj de 1953 ĝis 1962, la petrolo forrabita de imperiismo el tiu ĉi regiono atingis sume 1,590,000,000 tunojn, aŭ la koston de 23,630,000,000 usonaj dolaroj, post depreno de la produkta kosto de us \$ 2,380,000,000, la akirita profito kaj aliaj enspezoj atingis eĉ la sumegon de us \$ 21,250,000,000, t. e. naŭoble la produktan koston! Inter ili la kvin grandaj petrolaj kompanioj de Usono okupis ĉ. 70% el la luita petroleo en la Meza Oriento. Sole en 1962, la monopola kapitalo de Usono akiris el eksterlando petrolan profiton de 1,716,000,000 usonaj dolaroj.

Ĝuste tiamaniere la riĉaĵoj de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj estas senĉese forrabitaj.

MONOPOLIGO DE LA MONDA MERKATO

Cetere imperiismo ankaŭ superregas la internacian merkaton, monopoligas la mondan prezaron, kare vendas kion ĝi malkare aĉetas kaj faras interŝanĝojn je malegalaj valoroj, kaŭzante grandajn perdojn al landoj en Azio kaj Afriko. Laŭ publikigitaj statistikoj, la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj perdis sume 41,900,000,000 da usonaj dolaroj dum la dek jaroj de 1952 ĝis 1961 pro la senbrida malaltigo de la prezoj de elementaj produktaĵoj, kaj altigo de la prezoj de industriaj varoj fare de la usona kaj brita imperiismoj. Kia surpriza sumego de perdo! Por importi unu traktoron kun 30 ĝis 39 ĉevalpovoj Ganao devis eksporti 3.06

tunojn da kakao en 1955, 4.79 en 1962; la Unuiĝinta Araba Respubliko devis eksporti 2.2 tunojn da kotono kaj nun 3.41 tunojn; Birmo devis eksporti 26.35 tunojn da rizo kaj nun 32.57 tunojn. Tio montras ke la tiel nomata "egala" kaj "volonta" komercado de la imperiismo estas fakte tre malegaleca, alinomita rabado!

GRANDA UZURISTO

Imperiismo ankaŭ faras diversajn pruntedonojn por uzuro. Laŭ statistiko de la Monda Banko, la sumo de eksterlandaj prunteprenoj de 71 landoj (kaj regionoj) en Azio, Afriko kaj Latinameriko jam atingis en 1962 ĉ. 27,000,000,000 usonajn dolarojn kaj la totala sumo de amortizo de kapitalo kaj pago de interezo en tiu jaro estis ĉ. 5,000,000,000 usonaj dolaroj. Por la eksterlandaj pruntoj oni postulis altan profiton, iuj jarprocentoj estis altaj je 5%, aliaj eĉ pli altaj je 7% ĝis 8%. Laŭ publikigita statistiko, en la periodo de 1956 ĝis 1962, imperiismo enportis diversmaniere la suman kapitalon de 30,000,000,000 dolaroj en tiel nomatajn 56 "landojn en disvolviĝo", kaj la interezo kaj profito el la riĉaĵoj, kiujn ĝi forprenis de tiuj landoj, sole jam atingis 15,100,000,000 usonajn dolarojn.

LA VERA KARAKTERO DE "EKONOMIA HELPO"

La "ekonomia helpo" donita de imperiismo, precipe de la usona imperiismo estas fakte tipa rimedo de novkoloniismo, kies celo estas pluapase klopodi por kontrolado kaj prirabado. Publikigitaj statistikoj montras ke la neta sumo de la registaraj donacoj kaj la longtempaj kapitaloj kiujn la imperiismaj landoj (kaj de ili regataj multlateraj internaciaj organizaĵoj) transfluigis en tiujn "landojn en disvolviĝo" atingis ĉ. 2,600,000,000 usonajn dolarojn meznombro en ĉiu jaro de 1951 ĝis 1955 kaj pliiĝis ĝis ĉ. us \$ 6,000,000,000 meznombro en ĉiu jaro de 1960 ĝis 1962. Sed en la sama periodo imperiismo forrabis el tiuj landoj multe pli grandan sumon. Ekzemple en 1961, la imperiismaj landoj ekspluatis landojn en Azio, Afriko kaj Latinameriko per profitoj de us \$ 5,000,000,000 kaj interezo de pli ol us \$ 1,000,000,000 laŭ takso, kaj per interŝanĝo je malegalaj valoroj de ĉ. us \$ 5,800,000,000 en la importa kaj eksporta komercoj — sume 11,300,000,000 usonaj dolaroj.

Estas tute klare, ke la tiel nomata "helpo" de imperiismo, estas nur sumeto da mono el ĝia rabado el la landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiun ĝi uzas kiel rimedon por fari pluan agreson.

La diritaj punktoj klare montras la kaŭzon kial Azio kaj Afriko kie floris la kulturoj de Babilonio kaj Egiptio, kiam Eŭropo kaj Ameriko sin trovis ankoraŭ en la tempo de malklereco kaj barbareco, hodiaŭ sin trovas en malriĉeco kaj postĝinteco!

La aziaj kaj afrikaj landoj havas abundajn naturriĉaĵojn kaj sufiĉe da homfortoj. Multaj faktoj pruvis ke se ili povas sin liberigi de la regado kaj rabado de imperiismo, tute certe ili povas disvolvi siajn ekonomion, kulturon, sciencojn kaj teknikojn sin apogante sur la propraj fortoj kaj komenci sian vojon al riĉeco kaj feliĉo.

Ju Pli Batalas, Des Pli Fortiĝas la Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio

**Pli ol 20,000 anoj el la Usona Armeo Agresanta
Vjetnamion Estas Ekstermitaj**

*Ekde 1961 ĝis 20 nov., 1965, la armeo kaj popolo de suda
Vjetnamio jam ekstermis pli ol 20,000 usonajn armeanojn.*

Tempo	Ekstermitoj	Meznombro en ĉiu monato
1961	30	2.5
1962	443	37
1963	982	81
1964	2,111	176
1965 (jan. — 20 nov.)	17,081	Pli ol 1,550

**Ĉiam pli da Agrestroj el Usono en
Sudan Vjetnamion**

Tempo	Homoj
1961	3,500
1962	12,000
1963	16,000
1964	30,000
1965 (fine de jun.)	60,000
1965 (fine de jul.)	75,000
1965 (komence de okt.)	140,000
1965 (ĉe la jarfino, laŭ la ga- zetaro de la Okcidento)	200,000 — 250,000

28 Ĉeffortaj Batalionoj de la Pupa Armeo de Suda Vjetnamio Estis Ekstermitaj en 1965


*Dum la periodo de la 1-a de jan. ĝis la 4-a de okt., 1965, la armitaj
fortoj liberigaj de suda Vjetnamio ekstermis 28 ĉeffortajn batalionojn de la
pupa armeo. Jen estas la tempo, loko kaj numero de la ekstermitaj trupoj:*

Dato	Loko	Ekstermitaj Malamikaj Trupoj
La 1-a de jan.	Regiono de Binh Gia, Ba Ria	La 4-a marinfanteria B.
La 21-a de jan.	Cho Lon P.	La 52-a aparta B.
La 7-a de feb.	Vjet An de Quang Nam P.	La 3-a B. de la 6-a R. de la 2-a D.
La 8-a de feb.	Deo Nhung de Binh Dinh P.	La 1-a kaj 2-a B. de la 40-a R. de la 22-a D.
La 22-a de feb.	La 19-a ŝoseo de Gia Lai P.	La 22-a aparta B.
La 2-a de mar.	La 16-a ŝoseo de Bien Hoa P.	La 31-a aparta B.
La 9-a de maj.	Regiono de Nhuan Duc, Gia Dinh	La 3-a B. de la 9-a R. de la 5-a D.
La 23-a de maj.	Ca mau P.	La 3-a B. de la 33-a R. de la 21-a D.
La 28-a de maj.	Khe Tre, Thua Thien P.	La 1-a B. de la 3-a R. de la 1-a D.
La 29-a kaj 31-a de maj.	Regiono de Ba Gia, Quang Ngai P.	La 1-a kaj 2-a B. de la 51-a R. de la 25-a D., la 39-a aparta B. kaj la 3-a marinfanteria B.
La 8-a de jun.	Can Tho P.	La 44-a aparta B.
La 10-a kaj 12-a de jun.	Dong Xoai	La 1-a B. de la 7-a R. de la 5-a D. kaj la 7-a paraŝutista B.
La 23-a de jun.	Than Cuu Nghia aerodromo en My Tho P.	La 1-a B. de la 10-a R. de la 7-a D.
La 25-a de jun.	Tan An P.	La 3-a B. de la 49-a R. de la 25-a D.
La 30-a de jun.	Thuan Man de Gia Lai P.	La 1-a paraŝutista B.
La 4-a de jul.	Ba Gia	La 1-a B. de la 51-a R.
La 8-a de jul.	Suoi Dua de Thu Dau-mot P.	La 2-a B. de la 9-a R. de la 5-a D.
La 15-a de jul.	Bau Bang vilaĝo de la 13-a ŝoseo	La 2-a B. de la 7-a R. de la 5-a D. kaj la 4-a kirasaŭta B. de la 1-a kirasa R.
La 15-a de jul.	Loc Bai de Quang Nam P.	La 4-a B. de la 4-a R. de la 1-a D.
La 28-a de sept.	La bazo de Duc Lap, Cho Lon P.	La 33-a aparta B.
La 28-a de sept.	La 1-a ŝoseo	La 22-a aparta B.
La 4-a de okt.	Thanh Phu G., Ben Tre P.	La 41-a aparta B.

Mallongigoj: B=bataliono, D=divizio, G=gubernio, P=provinco, R=regimento.

REVOLUCIO AL KANTO

**Kolektiva Gimnastika
Prezento en la Dua
Tutlanda Sportkunveno**



Sunfloroj al la suno (el la 1-a parto)

La inaŭguro de la Dua Tutlanda Sportkunveno

Foto de G



Ju Pli Batalas, Des Pli Fortiĝas la Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio

Pli ol 20,000 anoj el la Usona Armeo Agresanta Vjetnamion Estas Ekstermitaj

Ekde 1961 ĝis 20 nov., 1965, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio jam ekstermis pli ol 20,000 usonajn armeanojn.

Tempo	Ekstermitoj	Meznombro en ĉiu monato
1961	30	2.5
1962	443	37
1963	982	81
1964	2,111	176
1965 (jan. — 20 nov.)	17,081	Pli ol 1,550

Ĉiam pli da Agrestropoj el Usono en Sudan Vjetnamion

Tempo	Homoj
1961	3,500
1962	12,000
1963	16,000
1964	30,000
1965 (fine de jun.)	60,000
1965 (fine de jul.)	75,000
1965 (komence de okt.)	140,000
1965 (ĉe la jarfino, laŭ la gazetaro de la Okcidento)	200,000 — 250,000

28 Ĉeffortaj Batalionoj de la Pupa Armeo de Suda Vjetnamio Estis Ekstermitaj en 1965

Dum la periodo de la 1-a de jan. ĝis la 4-a de okt., 1965, la armitaj fortoj liberigaj de suda Vjetnamio ekstermis 28 ĉeffortajn batalionojn de la pupa armeo. Jen estas la tempo, loko kaj numero de la ekstermitaj trupoj:

Dato	Loko	Ekstermitaj Malamikaj Trupoj
La 1-a de jan.	Regiono de Binh Gia, Ba Ria	La 4-a marinfanteria B.
La 21-a de jan.	Cho Lon P.	La 52-a aparta B.
La 7-a de feb.	Vjet An de Quang Nam P.	La 3-a B. de la 6-a R. de la 2-a D.
La 8-a de feb.	Deo Nhung de Binh Dinh P.	La 1-a kaj 2-a B. de la 40-a R. de la 22-a D.
La 22-a de feb.	La 19-a ŝoseo de Gia Lai P.	La 22-a aparta B.
La 2-a de mar.	La 16-a ŝoseo de Bien Hoa P.	La 31-a aparta B.
La 9-a de maj.	Regiono de Nhuan Duc, Gia Dinh	La 3-a B. de la 9-a R. de la 5-a D.
La 23-a de maj.	Ca mau P.	La 3-a B. de la 33-a R. de la 21-a D.
La 28-a de maj.	Khe Tre, Thua Thien P.	La 1-a B. de la 3-a R. de la 1-a D.
La 29-a kaj 31-a de maj.	Regiono de Ba Gia, Quang Ngai P.	La 1-a kaj 2-a B. de la 51-a R. de la 25-a D., la 39-a aparta B. kaj la 3-a marinfanteria B.
La 8-a de jun.	Can Tho P.	La 44-a aparta B.
La 10-a kaj 12-a de jun.	Dong Xoai	La 1-a B. de la 7-a R. de la 5-a D. kaj la 7-a paraŝutista B.
La 23-a de jun.	Than Cuu Nghia aerodromo en My Tho P.	La 1-a B. de la 10-a R. de la 7-a D.
La 25-a de jun.	Tan An P.	La 3-a B. de la 49-a R. de la 25-a D.
La 30-a de jun.	Thuan Man de Gia Lai P.	La 1-a paraŝutista B.
La 4-a de jul.	Ba Gia	La 1-a B. de la 51-a R.
La 8-a de jul.	Suoi Dua de Thu Dau-mot P.	La 2-a B. de la 9-a R. de la 5-a D.
La 15-a de jul.	Bau Bang vilaĝo de la 13-a ŝoseo	La 2-a B. de la 7-a R. de la 5-a D. kaj la 4-a kirasaŭta B. de la 1-a kirasa R.
La 15-a de jul.	Loc Bai de Quang Nam P.	La 4-a B. de la 4-a R. de la 1-a D.
La 28-a de sept.	La bazo de Duc Lap, Cho Lon P.	La 33-a aparta B.
La 28-a de sept.	La 1-a ŝoseo	La 22-a aparta B.
La 4-a de okt.	Thanh Phu G., Ben Tre P.	La 41-a aparta B.

Mallongigoj: B=bataliono, D=divizio, G=gubernio, P=provinco, R=regimento.




Celebrado de abunda rikolto (el la 4-a parto)

Foto de Caj Sanghiong


Junaj pioniroj prezentas (el la 6-a parto).

Foto de Ĝeng Jonggju



“Popoloj de la M






Katuno kun plaĉaj
desegnaĵoj (el la 3-a parto)

Foto de Ĵen Ŝijin

londo, Unuiĝu!" (el la 7-a parto)

Foto de Ĝang Hesong



Du Generacioj en la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo

Oriente de la ĉielskrapa Tajhang-montaro kaj la Pekin-Kantona Fervojo, etendiĝas la senlima ebenejo de Hebej-provinco, kaj meze de ĝi kuŝas vastega akvejo kun dens-densaj fragmitaroj — jen la lago Bajjangdian, la hejmloko de la gerilaj herooj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiu brave bataladis kontraŭ la agresantoj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Ne longe antaŭ la 20-a datreveno de la venko de la Rezistmilito, mi vizitis tiun lokon por intervjui la novan kaj malnovan generaciojn de tiu heroo taĉmento.

I

Varmega aŭgusto. Estis brile serene. En la dekojn da kilometroj larĝa lago Bajjangdian trembrilis arĝentaj ondo-skvamoj kaj glitis tien kaj ĉi tien fiŝboatoj; mil-hektaraj fragmitejoj etendiĝis ĝis la horizonto kaj malhele verdis la bonege kreskantaj grenplantoj en la teraskampoj en la lago.

Ni veturis en ŝipeto. Vidante la belajojn de la lago, ni ekpensis pretervole pri la malfacilaj tagoj antaŭ 20 jaroj, la tagoj, kiujn neniam povos forgesi la maljunaj loĝantoj ĉe Bajjangdian.

*Ĉe Lugoŭkjaŭ kanonoj ektondris,
Japanoj invadis Bajjangdian-on;
Per rab', fajr', morto kaj seksperforto
Turmentas ili la popolanojn.*

La popolkanto estas historia noto pri la teruraj krimagoj de la japanaj agresantoj. Ja kiu el la pli ol cent vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo de Bajjangdian ne suferis de la bruligoj, mortigoj kaj priraboj de ili! Sed la popolo estas nesubigebla. Veteranaj batalantoj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiuj heroe luktis kontraŭ la invadantoj, prezentis al ni la grandiozan kontraŭjapanan

rezistmiliton de la popolo per siaj vivecaj rakontoj pri la luktado partoprenita de ili mem.

Nacia kaj klasa malamo flamis en la koro de la fiŝistoj kaj ĉasistoj de Bajjangdian. Kiam ili estis pelitaj ĝis la limo de tolerebleco, ili invitis unu alian, du- aŭ tri-ope veturis en siaj boatoj kun siaj ĉaspafiloj, per kiuj ili kutimis faligi sovaĝanserojn, en fragmitajn densejojn kaj rapide sin organizis en batalan trupon. Dekoj da du-remilaj boatoj kun malnovtipaj longtubaj pafilegoj ŝargitaj per pulvo kaj ferglobetoj kaj metitaj en pafpreta pozicio ĉe la pruoj. Ĉiu pafilo kun bela sovaĝansera plumo en la meĉ-truo laŭ la kutimo de la ĉasistoj de sovaĝanseroj. Jen naskiĝis la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo — popola geriltaĉmento sekrete gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio.

Post sia fondiĝo, la taĉmento tuj komencis malcedeman bataladon kontraŭ la agresantoj, gvidate de la saĝa penso de Prezidanto Maŭ pri popola gerilo. Dank' al subtenado de la popolamasoj kaj siaj kuraĝego, mirinda naĝarto kaj tre bona kono pri la topografio, la taĉmentanoj transformis la sennombrajn akvovojojn kaj akvejojn inter la vastaj fragmitejoj de Bajjangdian en neeskapeblan kaptilegon kontraŭ la malamikoj. Batalante en siaj boatetoj per indiĝenaj pafiloj kaj pafilegoj kontraŭ la agresantoj en motorboatoj kun maŝinpafiloj kaj modernaj bombjetiloj, ĝi lerte kaj flekseble manovradis sur la lago por surprizataki motorboatojn de la malamikoj, ilin embuski, batalakiri provianton kaj nuligi fortikaĵojn de la agresantoj.

La Taĉmento elkreskis kaj plifortiĝis en batalado. Depost sia fondiĝo en 1938, ĝi faris pli ol cent vaste konatajn batalojn kaj ekstermis centojn da japanaj invadantoj kaj iliaj puparmeanoj. Ĝi armis, sole dum la periodo post 1941, siajn pli ol ducent membrojn per fusiloj, pezaj kaj malpezaj maŝinpafiloj kaj modernaj bombjetiloj batalakiritaj for de la malamikoj, kaj en aprilo de 1945,

La Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo en agado sur la lago Bajjangdian dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.









Foto de Meng Ĝaŭjuij



Flirtas la ruĝa flago (el la 2-a parto).

Foto de Kian Haiŭ

Songnian



Torentas ŝtalfluo (el la 3-a parto).

Foto de Ĵen Ŝijin

Du Generacioj en la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo

Oriente de la ĉielskrapa Tajhang-montaro kaj la Pekin-Kantona Fervojo, etendiĝas la senlima ebenejo de Hebej-provinco, kaj meze de ĝi kuŝas vastega akvejo kun dens-densaj fragmitaroj — jen la lago Bajjangdian, la hejmloko de la gerilaj herooj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiu brave bataladis kontraŭ la agresantoj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Ne longe antaŭ la 20-a datreveno de la venko de la Rezistmilito, mi vizitis tiun lokon por intervjui la novan kaj malnovan generaciojn de tiu heroo taĉmento.

I

Varmega aŭgusto. Estis brile serene. En la dekojn da kilometroj larĝa lago Bajjangdian trembrilis arĝentaj ondo-skvamoj kaj glitis tien kaj ĉi tien fiŝboatoj; mil-hektaraj fragmitejoj etendiĝis ĝis la horizonto kaj malhele verdis la bonege kreskantaj grenplantoj en la teraskampoj en la lago.

Ni veturis en ŝipeto. Vidante la belajojn de la lago, ni ekpensis pretervole pri la malfacilaj tagoj antaŭ 20 jaroj, la tagoj, kiujn neniam povos forgesi la maljunaj loĝantoj ĉe Bajjangdian.

*Ĉe Lugoŭkjaŭ kanonoj ektondris,
Japanoj invadis Bajjangdian-on;
Per rab', fajr', morto kaj seksperforto
Turmentas ili la popolanojn.*

La popolkanto estas historia noto pri la teruraj krimagoj de la japanaj agresantoj. Ja kiu el la pli ol cent vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo de Bajjangdian ne suferis de la bruligoj, mortigoj kaj priraboj de ili! Sed la popolo estas nesubigebla. Veteranaj batalantoj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiuj heroe luktis kontraŭ la invadantoj, prezentis al ni la grandiozan kontraŭjapanan

rezistmiliton de la popolo per siaj vivecaj rakontoj pri la luktado partoprenita de ili mem.

Nacia kaj klasa malamo flamis en la koro de la fiŝistoj kaj ĉasistoj de Bajjangdian. Kiam ili estis pelitaj ĝis la limo de tolerebleco, ili invitis unu alian, du- aŭ tri-ope veturis en siaj boatoj kun siaj ĉaspafiloj, per kiuj ili kutimis faligi sovaĝanserojn, en fragmitajn densejojn kaj rapide sin organizis en batalan trupon. Dekoj da du-remilaj boatoj kun malnovtipaj longtubaj pafilegoj ŝargitaj per pulvo kaj ferglobetoj kaj metitaj en pafpreta pozicio ĉe la pruoj. Ĉiu pafilo kun bela sovaĝansera plumo en la meĉ-truo laŭ la kutimo de la ĉasistoj de sovaĝanseroj. Jen naskiĝis la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo — popola geriltaĉmento sekrete gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio.

Post sia fondiĝo, la taĉmento tuj komencis malcedeman bataladon kontraŭ la agresantoj, gvidate de la saĝa penso de Prezidanto Maŭ pri popola gerilo. Dank' al subtenado de la popolamasoj kaj siaj kuraĝego, mirinda naĝarto kaj tre bona kono pri la topografio, la taĉmentanoj transformis la sennombrajn akvovojojn kaj akvejojn inter la vastaj fragmitejoj de Bajjangdian en neeskepeblan kaptilegon kontraŭ la malamikoj. Batalante en siaj boatetoj per indiĝenaj pafiloj kaj pafilegoj kontraŭ la agresantoj en motorboatoj kun maŝinpafiloj kaj modernaj bombjetiloj, ĝi lerte kaj flekseble manovradis sur la lago por surprizataki motorboatojn de la malamikoj, ilin embuski, batalakiri provianton kaj nuligi fortikaĵojn de la agresantoj.

La Taĉmento elkreskis kaj plifortiĝis en batalado. Depost sia fondiĝo en 1938, ĝi faris pli ol cent vaste konatajn batalojn kaj ekstermis centojn da japanaj invadantoj kaj iliaj puparmeanoj. Ĝi armis, sole dum la periodo post 1941, siajn pli ol ducent membrojn per fusiloj, pezaj kaj malpezaj maŝinpafiloj kaj modernaj bombjetiloj batalakiritaj for de la malamikoj, kaj en aprilo de 1945,

La Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo en agado sur la lago Bajjangdian dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.



t. e. kvar monatojn antaŭ la kapitulaco de Japanio, la batalharditaj bravuloj de la Taĉmento pelis la japanajn agresantojn for de Bajjangdian per la bataliloj militakiritaj kaj fondis sian popolan regpotencon.

II

“La popolamasoj estas vere nerompebla muro fera,” diris signifoplene Sun Ge, la vicestro de la heroa taĉmento, kiu la unua rakontis al mi pri ĝia batala historio. “La vortoj de Prezidanto Maŭ entenas brilan veron. Jen vidu, ĉu la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, havanta en la komenco nur indiĝenajn fusilojn kaj pafilegojn, ne jam venkis la japanajn agresantojn kun modernaj pafiloj, kiuj pretendis fiere, ke ili estas nevenkeblaj?”

Sun Ge nun estas komitatano de la kompartia filio de la Daĝang-vilaĝa Produkta Brigado. Dum kvin generacioj lia familio okupiĝis pri ĉasado de sovaĝanseroj. Por oponi la agreson de imperiismo, lia avo aliĝis kune kun siaj fratoj al Jihetuan-movado (1900-1901) kaj batalis kontraŭ trupoj de la Ok Aliancaj Potencoj. Sed la movado estis nur kamparana. Sen gvido de la penso de Maŭ Zedong, la lumturo por la ĉina revolucio, la avo de Sun Ge kaj liaj samtempuloj devis palpadi en mallumo. Ili faris sangan batalon, multaj oferis sian vivon kaj fiaskis finfine. La generacio de Sun Ge reprenis la indiĝenajn pafilegojn uzitajn de la avoj por kontraŭbatali la plej kruelajn faŝistajn banditojn de Japanio, kaj dank’ al la gvido de la granda penso de Maŭ Zedong, tiuj malnovaj pafiloj fariĝis, en la manoj de la nova generacio de revoluciuloj, fortaj bataliloj por ekstermi malamikojn kaj konduki la revolucion al venko.

Jen aŭdu ekscitan rakonton de Sun Ge pri batalo kontraŭ la japanaj agresantoj per indiĝenaj pafiloj kaj pafilegoj:

Estis la periodo, kiam la malamikoj furiozis plej freneze. Somero de 1939, kiam en Bajjangdian densegis

altaj fragmitoj, estis tre oportuna sezono por gerila aktivado. Iutage, oni informis la Taĉmenton, ke naŭ japanaj banditoj veturas per motor-boato al la fortika punkto Ĝaŭbejkoŭ oriente de la lago. La taĉmentanoj, kiuj longe jam deziregis puni la malamikojn, tuj decidis solide ilin bati por subpremi ilian arogantecon. La gerilanoj sin kaŝis en fragmitejon kaj celigis la pafilojn al la vojo trairota de la japanaj agresantoj. Kiam la suno apenaŭ sin klinis, ekaŭdiĝis obtuza bruado de fore kaj ĝi ĉiam pli proksimiĝis. Jen arogante alpuŝiĝis la motorboato de la japanaj agresantoj kun pafpreta maŝinpafilo sur ĝi kaj soldatoj sin apogantaj sur fusiloj. Restis nur ducent metroj, cent metroj... jen ĝi venis en la paf-sferon. “Ek!” — aŭdiĝis ordono. Tuj ekbrulis la meĉoj de dekelkaj indiĝenaj pafilegoj, ektondris pafoj, fumo tuj kovris la lagon kaj hajlo de ferbuloj kun grandeco de fabo peze ŝutiĝis sur la japanajn banditojn. La densaj ferbuloj faris multajn truojn en la korpojn de la malamikoj. Ok el la lastaj tuj pereis kaj nur la direktilisto ne tuj perdis sian vivon pro hazardo, sed ankaŭ li ne povis surbordiĝi viva. Premante vundon sur la brusto per sia mano, li diris al la kadavro-portantoj: “Teruraj estas la balaaj pafilegoj!” Kaj poste ankaŭ li iris en la inferon sekvante siajn kolegojn.

En tiu batalo, la papertigro de la japana militarismo estis malkaŝita per la “balaaj pafilegoj”. La membroj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo ekvidis, ke eĉ per ĉaspafiloj la popolo povas venki ĝis-dente armitajn malamikojn, kaj pligrandiĝis ilia memfido pri venko. La taĉmentanoj strebis senĉese kaj faris kanonon el dika akso por solide bati la malamikojn.

III

En la komenca periodo de la rezistmilito, indiĝenaj ĉaspafiloj kaj pafilegoj estis la ĉefaj armiloj de la Taĉmento. Kun disvolviĝo de la rezistado, la Taĉmento



Nova generacio de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo sin ekzercas pri surakva batalo.

sin armis per bataliloj militakiritaj en heroaj bataloj kontraŭ la malamikoj kaj fariĝis ĉiam pli forta.

Ni veturis laŭ la akvovojo tra vastaj fragmitejoj, kie la Taĉmento kutimis embuski en boatoj japanajn malamikojn, kaj atingis Ĝaŭ-vilaĝon, kie ni intervjuis Ĝaŭ Bo, fame konata rekognoska* heroo ĉe Bajjangdian, kaj nun vicsekretario de la kompartia filio de iu produkta brigado.

Tiu ĉi heroo, forte timata siatempe de la malamikoj, plurfoje forprenis tute nearmite fusilojn de malamikoj, detruis, kun gerila grupo sub sia gvido, dek kelkajn japan-pupajn fortikaĵojn kaj partoprenis unun post alia brile sukcesajn embuskojn. Poste, li fariĝis estro de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo. La japanaj agresantoj, kiuj kaj timis kaj malamis lin, anoncis ĉie premion por lin kapti. Spite al tio, Ĝaŭ Bo daŭre aktivadis en la popolamaso ĉe Bajjangdian kaj senĉese donis batojn al la malamikoj.

Prave diris kamarado Ĝaŭ: "La milito, kiun ni faris, estis ĝuste popola milito, kian Prezidanto Maŭ preparolis. Ĝi estas la plej bona rimedo kontraŭ la agresantoj."

Por ŝirmi siajn proprajn batalantojn, multaj familioj loĝantaj ĉe Bajjangdian fosis siatempe tunelojn sub sia domo riskante sian vivon, kaj sukcese ŝavis per ili batalantojn de la Taĉmento ĉirkaŭitajn de persekutantaj malamikoj.

En la sezonoj, kiam dense kreskis fragmitoj kaj la Taĉmento embuskadis kaj surprizatakis la malamikojn sur la lago, la samlokanoj venis helpi la Taĉmenton el ĉiuj flankoj; kaj en la sezono, kiam oni devis rikolti la fragmitojn, la samlokanoj tamen intence restigis fragmitojn por kaŝi sian taĉmenton, kvankam ilia enspezo estis jam tre malmulta eĉ sen tio; kaj dum la kruelaj "balaadoj" faritaj de la malamikoj, kiam la Taĉmento ne povis akiri grenmanĝaĵon en la fragmitejo kaj devis sin vivteni per senspice kuiritaj fiŝoj kaj fragmitaj ĝermoj, la samlokanoj, kiuj mem suferis malsaton, portis al ĝi krudajn panojn kaj legom-kukojn spite al vivdanĝero.

Protektate de la samlokanoj, la Taĉmento aktivadis kiel fiŝo en maro, kaj transformis la vastan lagon Bajjangdian en tombejon de la agresantoj.

Kamarado Ĝaŭ Bo mem agis kiel nia gvidanto, propramane remante en boato sur la lago Bajjangdian, kies laborantaj popolanoj jam fariĝis ĝia mastro, kaj de tempo al tempo montradis al ni lokojn, kie ili mortigis japan-pupajn malamikojn. Dank' al sia mirinda memorkapablo de rekognoskanto, li detale rakontis al ni multajn danĝerplenajn batalojn en la grandaj kaj malgrandaj vilaĝoj ĉe la lago kaj ĝiaj fragmitejoj.

Somere de 1941, la japana agresa armeo sendis tri motorboatojn kun pli ol cent japanaj soldatoj armitaj per pezaj kaj malpezaj maŝinpafiloj kaj kun alta observejo, por serĉi la Taĉmenton kaj fari decidan batalon kun ĝi. La Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiu kuraĝis batali kaj kuraĝis venki, atendis la malamikojn ĉe loko nomata Lampo da Oleo por batali kontraŭ ili. Tie la fragmitejo estis vasta kaj densa kun bela lotuskreskejo en la ĉirkaŭaĵo. Kiam du el la motorboatoj de la japanaj agresantoj alproksimiĝis arogante, pli ol 30 japanaj banditoj perdis sian vivon en la unua salvo de la Taĉmento. Sekve ekbruis maŝinpafiloj kaj bombjetiloj sur la tria

motorboato de la malamikoj, kaj post ĝi alproksimiĝis ankaŭ pli ol cent armitaj grandaj kaj malgrandaj lignaj boatoj. Ili ĉirkaŭis la Taĉmenton en la fragmitejo. La japanoj tamen ne kuraĝis eniri la fragmitejon kaj nur tondre pafadis per la maŝinpafiloj kaj bombjetiloj. La batalo daŭradis de la vespero ĝis malfrua matenhorio de la sekvanta tago, kiam la japanaj agresantoj opiniis, ke la gerilanoj estis jam tute ekstermitaj. Sed kiam ili eniris la fragmitejon, ili trovis tie eĉ nenian signon de la gerilanoj. Ĉar la Taĉmento intence dronigis en la fragmitejo kelkdek boatojn por trompi la malamikojn, kaj poste sub la ŝirmo de la malluma nokto ĝiaj membroj eknaĝis kun po unu lotusfolio surkape. Flosis lotusfolioj, la gerilanoj transpasis subakve la ŝipojn de la malamikoj, kaj finfine venis per naĝado al Ĝajnan-vilaĝo 11 liojn fore. Dank' al amema prizorgo de la vilaĝanoj, ili ĝuis bonegan dormon tie. Dume, la stultaj japanaj agresantoj brue kriadis en la lago: "La Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo jam forflugis."

En 1943, la Taĉmento faris alian brile sukcesan batalon, pri kies venko ĉiuj loĝantoj ĉe la lago hurais ĝoje. Ĝi atakis survoje pli ol cent ŝipojn ŝarĝitajn per varoj, kiujn eskortis japanaj soldatoj kaj pup-armeanoj. En tiu batalo, ĝi ekstermis pli ol cent malamikojn, akiris tri pezajn kaj malpezajn maŝinpafilojn kaj plenan ŝipon da diversaj fusiloj kaj kugloj. Estis plej ridinde, ke ses japanaj banditoj puŝis siajn kapojn en sakegojn en kajuto lasante siajn postaĵojn montriĝi ekstere. La gerilanoj sukcesis ilin eltiri nur kun granda fortostreĉo.

Post tiu batalo, la japanaj agresantoj ne plu kuraĝis iri al Bajjangdian pro timo de morto kaj ĉiam sin kaŝis en la guberniaj kaj distriktaj urbetoj.

IV

Dudek jaroj jam forpasis kun la orienten fluanta lagakvo. Sed la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo ankoraŭ ne finis sian gloran historion. Nun ĝiaj membroj estas skribanta novan paĝon de sia historio.

Hodiaŭ, la malnova generacio de la Taĉmento, kiu trapasis la provadon de la popola milito, nun estas edukanta sian novan generacion sub la gvido de la brila penso de Prezidanto Maŭ pri armado de la tuta popolo kaj dronigo de la agresantoj en la vasta maro de la popolamasoj.

La kvieta lago Bajjangdian fariĝis bolanta milit-ekzercejo por la fervoraj milicanoj. Kiam somero venas, la milicanoj de Bajjangdian konkure sin trejnus por fariĝi bonaj daŭrigantoj de la Taĉmento, kaj miloj kaj miloj da ili senĉese sin ekzercas pri batalo sur la lago spite al brula varmego en la tago kaj malvarmo de la akvo en profunda nokto. Ili sin ekzercas pri naĝado en plena armo, celpafado, kaptado de malamiko kaj metado de minoj en akvo, ktp.

Dum la pena militekzerco, oni ofte vidas, ke malnovaj membroj de la heroo Taĉmento senlace komu-

* rekognoski — esplori kun milita celo.

nikas siajn batalspertojn al la novaj membroj, rakontas al ili batalhistoriojn kaj ilin edukas per la granda penso de Maŭ Zedong, pri kies ĉiamvenkeco la veteranaj gerilanoj mem spertis en bataloj. En multaj multaj noktoj, ili gvidadis la junulojn en la milica klubejo lernadi verkojn de Prezidanto Maŭ, por ke la lastaj fariĝu bonaj heredantoj de la penso de Maŭ Zedong. Sub la gvido de la veterana gerilano Sun Ge, la milica roto de Daĝangvilaĝo persiste sin trejnadas dum la plej varmegaj tagoj de somero kaj la plej frostaj tagoj de vintro por bone sin pretigi por efektiva batalo. En la vintro de 1964, kiam sur la lago aperis ondforma glacia surfaco, la milicanoj de tiu roto sin ekzercis pri celpafado sur flugrapidantaj glitveturiloj spite al medol-doloriga frosto. Por akiri pli multe da surglaciaj veturrimedoj, 12 junuloj komencis pene lerni glitkuradon. Ili falis kaj refalis, vundiĝis kaj doloris, sed obstine daŭrigis la lernadon spite al malgravaj kontuzoj, kaj finfine ili ellernis glitkuradon kaj pafadon. En la pasinta somero, ili pene sin trejnais en naĝado, senĉese plimalfaciligis sian taskon, ili naĝis kun armiloj cent metrojn, kvincent metrojn, mil metrojn... kaj multaj sukcesis tranaĝi distancon de 27 kilometroj. Nun, la plejparto de la milicanoj de tiu roto jam akiris solidan arton de pafado sur akvo, glacio kaj boato.

Kun profunda malamo al la imperiismo la popolo de Bajjangdian instruas siajn gefilojn pene sin ekzerci por fariĝi lertaj batalantoj kontraŭ imperiismo. Onjo Vang estas unu el la multaj ekzemploj.

En Daĝangvilaĝo ni vizitis tiun onklinon. Ŝi diris al ni: "Por ke la pasintaj maldolĉaj tagoj neniam revenu, ĉu mi povus ne kuraĝigi la infanojn sin trejnadi!" Kaj tiam ŝi ekmemoris la terurajn tagojn, kiam Bajjangdian estis okupita de la japanaj agresantoj: La edzo de Onjo Vang nomiĝis Vang Dama. Ilia familio havis nek domon nek teron kaj devis sin vivteni per fiŝkaptado. Iutage, kiam Vang Dama vendis fiŝojn, li estis haltigita survoje de aro da japanaj banditoj. Ili traserĉis lin kaj trovis ĉe li kelkajn monbiletojn el la liberigita regiono. Ili prenis lin por soldato de la Okavoja Armeo, lin torturis tiel kruele, ke li svenis plurfoje, kaj lin forĵetis en la lagon kaj foriris, nur kiam li preskaŭ fariĝis kadavro. Onjo Vang lin savis kun larmoj per boato. Ŝi ofte rakontas al siaj gefiloj tiun amaran historion kaj ilin kuraĝigas, ke ili neniam forgesu la pasintecon kaj bone lernu de la veteranaj batalantoj de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo kaj akiru batalarton per pena ekzercado por kontraŭbatali la malamikojn. Dank' al ŝia edukado, ŝiaj filoj Tonggiang kaj Tongle kaj la plejaĝa filino Damin, ĉiuj fariĝis aktivuloj en milita ekzercado, kaj ankaŭ ŝia plej juna filino Hujkin, kiu havas nur dek jarojn, fariĝis elstara naĝisto en la "Junpionira Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo".

La nova generacio de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo ĉe la lago Bajjangdian bone heredis la gloran revolucionan tradicion de la malnova taĉmento. Nun ĝi estas transformiĝanta tra trejnado en popolan armitan trupon, kiu povas tuj veni je alvoko, ekbatali post alveno kaj venki en batalo.

Antaŭaj Servutuloj — Nunaj Aktoroj

ĜI ANG

"SERVUTULOJ" estas unu el la plej popularaj kinofilmoj en Ĉinio nuntempe. Ĝi estas la unua rakontfilmo kies ĉiuj roloj estas luditaj de tibetaj aktoroj. Tra la vivo de la ĉefa heroo ĝi spegulas la mizeran, doloran vivon de la miliono da servutuloj en la tibeta altebenaĵo kaj ilian batalon por mem-liberigo. Ankaŭ la luksa vivo de la bienuloj kaj iliaj lakeoj, la kruela subpremo al la servutuloj kaj armita ribelo kontraŭ la popola registaro estis fidele spegulitaj en ĝi.

La intrigo disvolviĝis ĉirkaŭ la heroo Ĝampa kiel la centro. La servutulaj gepatroj de Ĝampa mortas pro vipado de la servutula mastro. Li fariĝas orfo, vivas ĉe sia avino, sklaviĝas je sia dekkelk-jara aĝo, eltenas humiligon kaj torturon de la servutula mastro kaj lia filo. Ĝampa sin ŝajnigas kiel mutulo, kaj decidas ne plu paroli eĉ unu vorton ĝis sia liberigo.

En la jaro 1951, Tibeto liberiĝis. Post kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo atingis Tibeton, li intencas forkuri por ĝin partopreni, sed li estas rekaptita de sia mastro, kiu poste devigas lin fariĝi lamao. En la templo li malkovras la ribelan komploton de la reakciaj regantoj kaj unu "viva budho" kontraŭ la Popola Liberiga Armeo. Kiam la intrigo estas frakasita kaj la servutuloj estas liberigitaj, Ĝampa ekparolas post la longa mutado: "Mi havas multon por diri...".

La rolo de Ĝampa estas ludita de Vangdud el servutula familio. En la filmo li donas kortuŝan, konvinkan prezentadon.

"Kelkfoje mi eĉ ne sciis, ĉu mi aktoras aŭ ripetas mian pasintan vivon," diris Vangdud. "Mi estas kvazaŭ Ĝampa mem, la orfo, la 'ĉevalo' de la servutula mastro kaj forkurinta servutulo... Same kiel Ĝampa, ankaŭ mi havas sur la kapo kaj korpo multajn cikatrojn postlasitajn pro la turmentado fare de la servutulaj mastroj."

La sorto de Vangdud similas tiun de lia ludita rolo. Antaŭ ol Vangdud naskiĝis, lia patro jam mortis. Li fariĝis orfo en sia 15-jara aĝo, kaj poste servutulo. Li ne povis elteni la suferojn kaj forkuris al templo, kie

li fariĝis lamao. Malkovrinte ke li estas fuĝinta servutulo, oni devigis lin genui sur la perono, vipegis lin ĝis kiam disŝiriĝis lia ruĝa sutano kaj sangis lia korpo.

Ses jarojn post la paca liberiĝo de Tibeto, Vangdud fariĝis vojkonstruisto, kaj iom poste li eklaboris en ŝtata eksperimenta agrikulturejo kaj tie lia talento en dramludo altiris atenton. Li neniam ricevis edukon. Li povis nek legi nek skribi. En 1958, la agrikulturejo sendis lin al unu el la unuaj tibetaj elementaj lernejoj. Poste li lernis 2 jarojn en la Ŝanhaja Drama Instituto. Nun li estas membro de la Tibeta Moderna Dramotrupo kaj gajnis sukcesojn en prezentado.

“Servutuloj” estas la unua filmo, en kiu Vangdud ludis sian rolon. Kvankam en tiu ĉi filmo li diras entute nur kvin aŭ ses frazojn, tamen li bone prezentas la tutan internan mondon de kaŝita kaj bolanta kontraŭstaremo de la muta Ĝampa. La lastaj kelkaj vortoj diritaj de li en la fino de la filmo forte kortuŝas multajn spektatorojn, inkluzive de miloj kaj miloj da realaj ekservutuloj. “Jen estas la malnova Tibeto, en kiu ni vivis, kaj neniam ni lasos tian vivon reveni al ni.” Tio estas la voĉo de la antaŭaj servutuloj.

Ankaŭ la aliaj tibetaj ludantoj en la filmo estis servutuloj, orfoj aŭ sklavoj. Ili estas membroj de la unua Tibeta Moderna Dramotrupo kaj ekricevis edukon nur en la lastaj kelkaj jaroj. Per la “Servutuloj” ili komencis la historion de kinfilmo de Tibeto. Ilia prezentado estas varme laŭdata kaj alte taksata de kritikistoj kaj spektatoroj.

Plejparto de la eksterdomaj scenoj en la filmo estis fotita en Tibeto. La vipoj, piedkatenoj kaj aliaj puniloj de la regantoj ne estis falsaj, sed veraj. La nigra-blanka fotografio konvena por la kazo levis ĝian lirikan belecon. La lerte adoptitaj muziko kaj sonoj bone efikas por krei necesajn etosojn.

Ĝampa (rolo ludata de Vangdud, dekstre) kaj lia amikino en la infanaĝo Namgang (rolo ludata de Padmajangĉan).



Kultura Vivo

GRANDA MUZIKODANCA EPOSO DE LA TIBETANOJ — Por celebri la fondiĝon de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, la artaj laborantoj en Lhasa faris prezenton de la granda eposo de muziko kaj danco “Al la Suno Sin Turnas la Liberigitaj Servutuloj”.

Tiu ĉi 9-scena muzikodanco bone spegulas la brilan historion de 15 jaroj, dum kiuj la tibeta popolo marŝis de venko al venko en ĉiu stadio de revolucio sub la saĝa gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ.

Estis 3 artaj grupoj kaj pli ol 250 profesiaj aŭ neprofesiaj artaj laborantoj, kiuj partoprenis la prezentadon.


KULTURADO DE KURACISTOJ POR LA KAMPARO — Medicinaj kolegioj kaj institutoj en Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Kunming, Tiangin, Venĝou k. a. lokoj starigis porkampanajn fakultatojn aŭ kursojn de medicino por multe eduki kuracistojn en servo al la kamparanoj.

La gestudentoj de tiuj fakultatoj kaj kursoj estis varbitaj el la kamparo kaj ili laboros en la kamparo post tri-jara lernado.

KOLORAJ MODLAĴOJ DE TIANGIN KAJ PAPERTRANĈAĴOJ DE HAJLUN — La Ĉina Arta Halo ekspozis en la lasta aŭtuno kolorajn modlaĵojn de Tiangin kaj papertranĉaĵojn de Hajlun, Hejlonggiang-provinco.

La kolora modlaĵo de Tiangin estas popularo kun sia originala stilo kaj havas jam historion de pli ol 130 jaroj. Ĝia iniciatinto estis Ĝang Mingŝan. De generacio al generacio, liaj posteuloj okupiĝas pri tiu arto, kaj ili portas la kromnomon “Argil-homo Ĝang” donitan de la popolamaso. Ili jam edukis multe da novaj adeptoj post la Liberiĝo. Pli ol 90 novaj verkoj de la lastaj jaroj estis montritaj en la ekspozicio, kiuj ampleksis diversajn temojn novajn kaj interesajn. La homfiguroj, vivecaj kaj versimilaj en belaj koloroj, spegulas la novajn homojn kaj aferojn sur ĉiuj frontoj de la socialisma konstruado.

La popolaj papertranĉaĵoj de la gubernio Hajlun plejparte gloras la Partion, la grandan gvidanton Maŭ Zedong kaj la Tri Ruĝajn Flagojn, aŭ temas pri “armiĝo de la tuta popolo”, aŭ pri novaj homoj kaj aferoj en la kamparo kaj fabrikoj de la loko. Ĉiuj ili elspiras la spiriton de la nova epoko.



Novaj Esperantaj Eldonoj de Verkoj de Maŭ Zedong

La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio

64p. 95 × 145mm.

**La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en
la Kontraŭjapana Rezistmilito**

32p. 95 × 145mm.

La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj


48p. 95 × 145mm.

Mendebla ĉe la perantoj de EPC^ĉ aŭ la Libro-servo de ĈEL (P. O. Kesto 313, Pekino)

30 TUNOJN PEZA AERŜTONEGO

En oktobro de 1965, rara granda aerŝtono estis ekspozata en la urbo Urumĉi de la Hingianga Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Oni ĝin trovis en la dezerto de la gubernio Kinghe en tiu regiono.

Ĝi estas fera aerŝtono, havanta korpon de 3.5 kubmetroj kaj pezon de ĉ. 30 tunoj. La respondeculo de la Geologi-geografia Instituto de la Hingianga Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj diris, ke ĝi estas la tria en pezo sub la n-ro unua aerŝtono falinta en sudokcidenta Afriko kaj pezanta ĉ. 60 tunojn kaj la n-ro dua trovita sur la insulo Grenlando kaj pezanta ĉ. 33.2 tunojn.



Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (XI)

Pri Geedziĝo

Karaj geamikoj!

Multaj el vi demandis min pri la geedziĝo de ĉinoj. Ĉar Ĉinio estas lando de multaj nacioj, kiuj havas malsamajn morojn pri geedziĝo, ĉi tie mi ne povas menciigi ilin ĉiujn. Nun mi parolos nur pri la geedziĝo de han-nacio.

Unue mi parolu pri enamiĝo. En la nuntempa Ĉinio, enamiĝo de junuloj kaj junulinoj estas afero tute malsama ol tiu en la malnova Ĉinio antaŭ 17 jaroj.

Nun la ĉinaj gejunuloj kreskas en cirkonstancoj de la nova socia sistemo kaj havas egalajn ŝancojn por ricevi edukon kaj partopreni produkton de la socio. Tial ili estas nature provizataj per kondiĉoj kontakti, kompreni unu alian, amikiĝi kaj enamiĝi en la komuna vivo de lernado kaj laboro. Ili jam ne scias la malnovan moron de la ĉina feŭda socio "la viroj apartiĝu de la virinoj", nek pensas ke mono influas ĉion, kiel oni kutimas pensi en socio de privata posedsistemo, tial ilia am-koncepto estas malsama ol tiu en la aliaj socioj, kies bazo estas privata posedanteco.

Kio estas la komuna kriterio* de amo por la gejunuloj de la nova Ĉinio? Socialisma konscio kaj agemo en socialismaj laboroj, alivorte, fideleco kaj laboremo de la amato aŭ amatino por la revolucio kaj konstruado de socialismo.

Eble iuj dubus: Ĉu gejunuloj povas tiel alte taksi la politikajn postulojn kaj havas neniom da persona konsidero dum enamiĝo?

Ne, ne mankas al ili personaj konsideroj. Sed iliaj individuaj feliĉo kaj estonteco ja dependas de disvolviĝo de la socialisma konstruado. Viro ne postulas de virino tion, ke ŝi fariĝu pupo de la domo; kaj virino ne postulas de viro tion, ke li estu ŝia vivtenanto dum ŝia tuta vivo. Tial do, ili simpatias kaj enamiĝas nur en la intereso de la komuna afero; kaj ilia amo kreskas en la komuna idealo. Estas nature ke iliaj personaj konsideroj povas nur esti iliaj komunaj interesoj konformaj al la intereso de la socialisma konstruado.

Vidinte hodiaŭ la feliĉan geedzecon de la gejunuloj, maljunuloj ofte diras kun admiro: "Kiom feliĉaj estas ili". Efektive, ili estas nekompareble feliĉaj ol la viroj kaj virinoj en la malnova socio en kiu feŭdismo* regis, kiuj ne havis liberon geamikiĝi kaj povis nur geedziĝi kun iu nekonata laŭ la ordono de la gepatroj kaj la rekomendo de la svatistinoj*; nekompareble feliĉaj ol tiuj kiuj strebas al "Libera Amo" laŭ la okcidenta civilizacio*, sed fakte ne povas ne suferi limigon kaj malhelpon de la ekonomiaj kondiĉoj.

Granda ŝanĝiĝo okazis ankaŭ en la maniero de geedziĝo. Eble iuj el vi jam legis la novelaron de *Por Nova Afero, Nova Maniero*. En tiu libro estas du noveloj pri geedziĝo, nome "Edziĝo de Erhejĉjo" kaj "Por Nova Afero, Nova Maniero". Ili priskribas geedziĝon de ĉinaj gejunuloj kaj la ŝanĝiĝon en la moro de geedziĝo.

Nun pli kaj pli populariĝas la novaj manieroj de geedziĝo. Malgraŭ ke ili varias* laŭ regionoj, tamen ĝenerale ili estas simplaj, modestaj, seriozaj, ĝojplenaj kaj en la spirito "fari ĉion kun laboremo kaj ŝparemo". Ĉe gefianĉiĝo, ambaŭ familioj de la viro kaj virino jam ne postulas unu de la alia valorajn donacojn, kaj estas nemalofte ke tiun ceremonion oni simple ne faras. Kaj ĉe geedziĝo, la familio de la viro ne plu fervoras pri lukso, kaj ankaŭ tiu de la virino ne plu peze sin ŝarĝas per aĉeto de doto kaj ankaŭ aboliĝis* la kutimaĉoj superstiĉaj*. Post registrado ĉe registara oficejo, la gefianĉoj povas laŭvole decidi la daton de geedziĝo kaj fari la ceremonion aŭ en la domo

de la viro aŭ en tiu de la virino. Ekzemple, iu membro de la Komunisma Junulara Ligo, en Fuan-gubernio, Fugian-provinco okazigis sian edziĝan feston jene: la novedzo kaj la novedzino varme manpremis kaj salutis al la bogepatroj, kaj tiuj ĉi faris al ili gratulajn parola-detojn, la ĉeestantaj parencoj kaj amikoj aŭ kantis aŭ rakontis novajn rakontojn ktp., kaj viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj kadroj, kaj ordinaraj komunumanoj ĉiuj prezentis sian gratulon al la novaj geedzoj. Tia festo ne multon elspezigas sed grandan ĝojon donas kaj enhavas multe pli da signifo.

Koncerne la aĝon por geedziĝo, estas difinite en la Leĝo de Geedzeco, ke viro kun la aĝo de pli ol 20 jaroj kaj virino kun la aĝo de pli ol 18 povas geedziĝi. Ankaŭ la aliaj aferoj difinitaj en la Leĝo, ekzemple, malpermeso al bigamio* kaj preno de kromedzino, apliko de monogamio*, egaleco inter viroj kaj virinoj ktp., nun plene efektiviĝas.

La nuna geedziĝo havas multe da avantaĝoj* kompare kun tiu de la malnova Ĉinio. Por jam fini mian skribon nun mi ne parolos pri ili.

Batalrakonto de Vjetnamio

KAPTU ILIN VIVAJ

En la Sudo de Vjetnamio estas vilaĝo tre proksima al la malamika reduto*, kies pup-arme-anoj ofte malkvietigis la vilaĝon kaj turmentis la loĝantojn minacante, ke se neniu informos ilin kiam gerila* taĉmento* venos en la vilaĝon, la tutan vilaĝon ili forbruligos kaj ĉiujn homojn mortigos. Minacate de la vivdanĝero la vilaĝanoj kunvenis por elpensi ian kontraŭ-rimedon.

"Ni faru mortan lukton kontraŭ ili!" diris la junuloj.

"Kiel lukti kun malplenaj manoj?" diris la maljunuloj.

Junulino rakontis al ili heroaĵon de aliaj vilaĝoj en batalo kontraŭ la uson-pupa armeo. Aŭdinte ŝian rakonton ĉiuj ĝojiĝis kaj ekagis laŭ la ekzemploj. La fortikuloj iris fosi foskaptilojn, kaj la maljunaj aŭ malfortaj homoj pintigis bambu*-bastonojn, kaj oni faris ankaŭ

aranĝon por est-igi ver-similajn sonojn de pafado.

Post kiam ĉio estis preta, la junulino rapidis al la reduto kaj raportis al la pup-arme-anoj: "Alvenis gerilanoj!"

Tion aŭdinte la pupa plotonestro* tuj demandis: "Kiom da homoj?"

"Dekkelkaj," respondis la virino.

La plotonestro pensis ke malgranda estas ilia nombro, li do kolektis en rapideco dekkvin pup-arme-anojn kaj sin ĵetis kun ili en la vilaĝon. Je ilia alveno, la vilaĝanoj montris bedaŭron dirante: "Oj! Vi iom malfruis! Ĵus nin forlasis la gerilanoj. Sed ili diris, ke ili venos post nelonge. Unue manĝu kaj iom ripozu, atendu ĝis ilia reveno kaj tiam kaptu ilin vivaj." Tuj kiam finiĝis la parolo, pladoj de fiŝo, viando kaj aliaj kuirajoj kune kun brando alportiĝis. La pupaj soldatoj tuj komencis ŝmace* konsumi la bongustaĵojn.

Jam malheliĝis kiam ili sin satigis. Subite aŭdiĝis de ĉirkaŭe sinsekvo da pafoj. Unu vilaĝano envenis kaj diris kvazaŭ surprizite: "Ve! La gerilanoj venigis plimultajn soldatojn kaj sieĝas* la vilaĝon."

La plotonestro forte terurigiĝis kaj ekkuris al la reduto kun siaj uloj. Ne malproksime ili kuris, kiam renkonte alrapidis kelkaj popolanoj kiuj diris: "Haltu! Gerilanoj tie! Turnu vin, rapidu." La pup-arme-anoj kuregis en la direkto montrita, sed post kiam ili faris kelke da paŝoj, alkuris aliaj popolanoj al ili kaj diris en konsterno: "Haltu! Tie estas gerilanoj!" La pup-arme-anoj ne sciis kion fari, sed kuris jen tien, jen ĉi tien, kaj nelonge poste ili ĉiuj falis unu post alia en foskaptilojn, en kiuj la pintaj bambu-bastonoj ilin atendis.

La vilaĝanoj tiel kaptis vivaj ĉiujn dek kvin pup-arme-anojn kaj krome, ili akiris ankaŭ dek kvin pafilojn, per kiuj ili sin armis, kaj organizis en alian taĉmenton de gerilanoj. Kaj la junulino elektigis ilia estrino. La vilaĝo mem poste fariĝis tre fama "batalanta vilaĝo".

Ĉina Fablo

LI VIDIS NENIUN

En Ki-regno (730-481 a.K.) estis homo, kiu pensadis tage kaj nokte

pri akiro de peco da oro. Sed de kie ĝin akiri? Unu tagon, li tre frue ellitiĝis, rapide sin vestis kaj iris al la or-aĵ-ista butikio.

En la butikio, li vidis multe da brilaj or-pecoj. Ju pli longe li rigaridis, des pli avida* li fariĝis kaj li kaptis unu kaj forkuris. Sed li estis tuj kaptita.

"Kia aŭdaculo*!" diris la kaptinto. "Rabi oron en la hela tago antaŭ la okuloj de tiom multaj homoj! Kial vi ne malfermis la okulojn por vidi!"

"Miaj okuloj," diris la rabinto, "vidis nur brilajn or-pecojn, sed neniun homon."

Humoraĵo

KIU ESTAS HOMO KAPABLA?

Antaŭe, iu riĉulo sendis serviston por aĉeti brandon, kaj donis al li nur botelon sed ne monon. La servisto demandis: "Kiel aĉeti brandon sen mono?" La riĉulo diris: "Kiu ne kapablas aĉeti brandon per mono! Nur tiu, kiu povas aĉeti brandon sen mono, estas vere kapabla." Aŭdinte tion, la servisto ekiris senvorte por la aĉeto.

Momenton poste, la servisto revenis kun la botelo malplena kaj ĝin donis al la riĉulo. Tiu ĉi diris kolere: "Botelo sen brando! Kion mi trinku?" La servisto respondis: "Kiu ne kapablas trinki brandon el botelo! Nur tiu, kiu kapablas trinki brandon el malplena botelo, estas homo kapabla!"

Nia Vortareto

abol-i — forigi.

aŭdac-a — maltima.

avantaĝ-o — tio, kio donas superrecon aŭ pli grandan utilon.

avid-a — forte deziranta.

bambu-o — arbeca herbeĝo.

bigami-o — stato de viro havanta samtempe du edzinojn.

civilizaci-o — malbarbareco.

feŭdism-o — socia sistemo pri regado de sinjoroj-mastroj super kamparanoj.

geril-o — facil-mova milito.

kriteri-o — distingilo.

monogami-o — leĝa sistemo laŭ kiu viro ne povas havi pli ol unu edzinon.

ploton-o — arme-parto sub kompanio.

redut-o — kampa fortikaĵo.

sieĝ-i — ĉirkaŭi.

superstiĉ-o — malsaĝa kredo je supernaturaĵoj.

svat-i — proponi iun al alia homo kiel edzon aŭ edzinon.

ŝmac-i — manĝi kun bruoj.


taĉment-o — grupo da soldatoj.

vari-i — ŝanĝiĝi sinsekve.

Kuriozaj Bestoj

RANO KUN LIPHAROJ

En 1945, sur la monto Omeĵ en Siĉuan-provinco, Ĉinio, oni trovis strangan ranospecion kun lipharoj, kies scienca nomo estas *Vibrissaphora boringii* Liu. Ĝi estas 70-90 milimetrojn longa, kun tre plata kapo. Sur la supra liprando de la vira besto estas 12-16 harsimilaj elkreskaĵoj de korneca epidermo, kaj la ina havas sur la sama parto flavetajn punktojn. Ĝia haŭto estas glata kaj ne portas verukojn kiel bufoj, sed tre delikatajn maŝarsimilajn haŭto-faldetojn. Tiaj ranoj troviĝas ankaŭ en Junnan- kaj Fugian-provincoj, Hajnan-insulo k. a. lokoj.



ĈASADO KUN AVĈJO—Bildrakonto por infanoj, redaktita de la Ĉina Eldonejo por Geknaboj, eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. 24 kolorbildoj de Jang Jongking, kun klarigoj de Ĝaŭ Fuhing. Formato: 17.0 x 18.7 cm. Prezo: Rb.0.13, £ 0-1-0, Ff.0.70, Gld.0.50 Aĉetebla ĉe la Libro-servo de la Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.



En la Granda Hing-an-montaro de nordorienta Ĉinio loĝas la olunĉun-nacianoj, kiuj antaŭe okupiĝis ĉefe pri ĉasado por sin vivteni. Ili estas kuraĝaj, spritaj kaj lertaj en pafado. Nun, kvankam plimulto el ili jam komencis loĝi fiksloke kaj mastrumi agrikulturon, tamen la ĉasado ankoraŭ restas grava parto de ilia vivo. La libreto priskribas kiel olunĉuna knabo lernas ĉasi.

La unua bildo en la libreto prezentas al ni neĝbatalon de olunĉunaj knaboj. Inter ili sin trovas Najan, la heroo de la rakonto. Revokita de la avĉjo, Najan rapide revenis kaj kune kun la avo iris al granda arbaro por lerni ĉasadon. Tie li ellernis, kiel oni povas distingi la piedsignon de linko, kiel oni povas faligi ĝin de sur alta arbo. Li sciis, kial oni pafas sciurojn je ilia okulo kaj per kia maniero oni povas eligi ilin el arbotruoj. Fine, kune kun la avo li mortpafis grandan urson.

Per belaj kaj koloraj bildoj la libreto havigas al geknaboj sciojn pri bestoj, vekas en ili kuraĝon kaj informas ilin pri la vivo de olunĉunoj. Ĝi estas ne nur interesa legaĵo por infanoj, sed ankaŭ bona facila legolibro por komencantoj, kun sufiĉe flua kaj facile legebla lingvo, kaj klara preso.

Ĝoŭ Guohiang

KAŬKAZAJ RAKONTOJ — Verko de M.J. Lermontov granda poeto de Rusio, tradukita de D. Staritsky. Ĝin eldonis UEA ĉe la 150-a datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro. Formato: 14.8 x 21 cm., kun plasta kovrilo. 70 p. Prezo: 5,-ned. gld. (20 steloj).

La libro elektis tri pecojn de la fama verko "Heroo de Nia Tempo" de la aŭtoro. Oni povas diri, ke ĝia eldono estas bona iniciato por rememorigi la poeton.



"Heroo de Nia Tempo" estas la ĉefa proza verko de la poeto. Pro ĝi li estis ekzilita kaj mortigita de la intrigaj manoj de la cara korto. En ĝi li kreis la figuron Peĉorin, kiu havis akran saĝon, liberan volon, malestimas la nobelan socion, sopiras grandiozan celon de la vivo kaj fiere protektis sian liberecon kaj sendependecon. Tamen li ne trovis vojon por sia energio, kaj en la batalo li falis en individuan egoismon. Li ne zorgis la bonstaton de la aliuloj, male li celis provizoran plezuron je la doloro de aliaj. Kiel la aŭtoro mem diris: "La heroo estas figuro formita de la plene disvolviĝintaj malfortaj flankoj de la tuta generacio en lia tempo. Do lia ironio estas vipado al la tiama socio".

La tri noveloj *Bela I*, *Bela II Maksim Maksimiĉ*, kaj *Tamanj* kolektitaj en tiu ĉi libreto fakte reprezentas nur la enkondukon kaj fragmenton de la tuta verko. Plie, la eldoninto ne faris rimarkon, ke *Tamanj* estas elektita el la taglibro de Peĉorin. Tio erarigis la komprenon pri la spirito de la verko, kaj ebligis la legantojn ilin aprezi kiel nur izolaj noveloj. Tia aranĝo de klasikaj verkoj ne estas tre bona. Tamen ĝi estas multe preferinda kaj rekomendinta ol la verkoj de ekzistadismo kaj similaj, kiuj propagandas nur la pesimisman barakton de la agonianta socio.

Honfan

EKZEMPLO SEKVINDA

ESPERANTO estas ilo, per kiu la popoloj povas kompreni unu alian. Sed ĝi povas ludi tiun rolon nur dank' al la fervoraj esperantistoj, kiuj estas ne nur aktivaj legantoj de utilaj libroj kaj gazetoj en Esperanto, sed ankaŭ fervoraj disvastigantoj de tiuj bonaj legaĵoj; ili akcelas la komprenon inter la popoloj ne nur rekte per Esperanto sed ankaŭ tradukas, diskonigas sur paĝoj de siaj nacilingvaj eldonaĵoj utilajn materialojn en la esperantaĵoj. Multaj el niaj legantoj ja faris tiajn laborojn. Jen estas kelkaj leteroj pri tio kiujn ni ricevis lastatempe. Ni kore salutas al ili kaj promesas lerni iliajn bonajn ekzemplojn.

Nia malnova leganto kaj malnova amiko **Kavenius en Finnlando** skribis interalie:

...vi sendis al ni bildaron titolitan *Certe Triumfos la Popolo de Vjetnamio, Certe Malvenkos la Usonaj Agresantoj*. Nun mi povas rakonti kaj montri, kiel mi uzis ilin por helpi la vjetnaman popolon. Mi tranĉis la bildon post bildo, skribis por ili nacilingvan tekston kaj donis al la redakcio de nia gazeto *Nova Tago*. Ĝis nun 12 bildojn oni jam publikigis. Kelkaj aperis sole kun bezonata teksto sed aliaj estis kiel partoj por artikolo aŭ aktuala novaĵo ĉiutage en Sudvjetnamio. Viaj bildoj estas tre valoraj al ni. Nun miaj kolegoj... scias, ke pere de mi ili povas ricevi taŭgajn informojn kaj bildojn. Mi sendas la bildojn, kiujn mi uzis kaj aperigis en nia gazeto.

Unu plian signifoplenan laboron k-do Kavenius faris. Li ne nur sciigis al aliaj homoj la utilecon de Esperanto, sed pli grave, per tio ĉi li malkaŝis la veron de la agresado fare de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio antaŭ la okuloj de tiuj kiujn la falsa propagando trompas

kaj montris al tiuj, kiuj sincere volas defendi la pacon, kaj montris kiu estas malamiko de la paco kaj kiel oni devas defendi la pacon.

Ankaŭ **k-do Zumbo en Italio** estas nia malnova amiko kaj kunlaboranto dum longa tempo. Li skribis al ni lastatempe:

...Hodiaŭ mi sendis al vi la martan numeron de la monata gazeto *L' INCONTRO (La Renkonto)*, sur kies kvara paĝo vi povos legi mian novan artikolon, unue pri disaŭdigoj (en Esperanto) de Radio Pekino, due pri la novaĵoj de "Kurantaj Aferoj" de *El Popola Ĉinio*, n-ro 1 de 1965... Mi certigas vin, ke post nelonge mi publikigos aliajn artikolojn pri via Ĉinio.

K-do Theobald nia peranto en Okcidenta Germanio, sciigis nin:

El la n-ro 1 de EPĈ mi tradukis la artikolon "La Turisma Vivo de la Ŝanhajanoj". Ĝi estas presita en Wandern und Bersteigen (Migrado kaj Montgrimpado), revuo de la laborista organizo kiu cetere estas internacia kaj havas land-organizaĵojn en multaj landoj. De la nomita revuo kun la tradukita artikolo mi sendas al vi ekzempleron. Plue mi havas alian ideon. La nomita revuo povus aperigi tipajn ĉinajn fotojn el *Pejzaĝoj de Ĉinio* kaj *El Ĉina Fotografia Arto*. Tiaj aŭ similaj

fotoj, kiuj devas esti bone kliŝeblaj, estus akceptotaj ankaŭ de aliaj revuoj.

Alia leganto en Bulgario skribis al ni dum sia tradukado de la Rakontoj pri Afanti el nia gazeto:

Mi proponis la rakontojn pri Afanti al la loka ĵurnalo kaj la redakcio akceptis ilin volonte. La redaktoroj promesis regule represigadi miajn tradukojn de la rakontoj. Sed ili dezirus sciigi al la legantoj detalaĵojn pri la vivo kaj la agado de Afanti...

Sekve ni sendis al li la necesan materialon, kaj antaŭ nelonge li alsendis al ni la ĵurnalojn en kiuj estis presitaj tiuj rakontoj kaj aliaj materialoj el nia gazeto.

La leteroj de niaj amikoj donis al ni veran ĝojon kaj kuraĝigojn por niaj laboroj, kaj multe helpas nin en plua klopodado por plibonigi kaj disvolvi senĉese nian laboron por pli bone akceli kaj intimigi la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj de la mondo. Ni esperas ke niaj legantoj sekvos la ekzemplojn de tiuj ĉi amikoj, kaj sciigos nin pri viaj fruktoj de klopodado. Ni estas ĉiam pretaj laŭeble vin helpi en tio. Se oni bezonus aldonajn materialojn aŭ bildojn el la originalaj artikoloj, ni laŭeble tion sendos kun plezuro.

—La Red.

*F-ino Elena Hnilicova, MALACKY, Zahorie 13, ĈSSR, 16-j. dez. kor. kun spertaj ges-anoj ĉiulandaj per PI, L.

*Vladimirov Talev, 22-j. studento, dez. kor. kun geamikoj en Afriko, Azio kaj aliaj por interŝ. de pk. kaj pri muziko, dancoj, lit. Adreso: Bulgario, Dimitrograd-1, kv. "V. Kolarov" bl. 51. Atanas.

*S-ro Dimitar Cervenakov kaj s-ino Elenka Cervenakova dez. kor. kun s-anoj de aziaj kaj aliaj landoj pri ĉ. t. Adreso: kv. Ljubovo 1, ur. Gabrovo, Bulgario.

*Hungaraj esp-istoj, 18-60 j., dez. kor. kun ĉ. 1. Adresu al: "Konkordo" Esp-Grupo, Budapeŝt II., Kelekti Karely-u.22. Hungario.

*Nikolao Abraham, dez. kor. kun s-anoj de aziaj landoj per belaj il. pk. Adr: Nemetvolgyi ut 87. B. ep. I. 10, Budapeŝt XII, Hungario.

EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (96) 1966

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Hana aktorino lernas de kazaĥa aktorino ludadon de muzikilo.

Foto de Li Ĝongkuj

Ĉe la Sojlo de 1966

Nova Hingiang en Prosperiĝo
Amikeco inter Ĉinaj kaj Japanaj Junuloj

La Petrola Industrio de Ĉinio
Pasinta kaj Nuntempa
Nova Fizionomio de Hingiang
(Bildpaĝoj)

Kaj Greno kaj Kotono
Kurantaj Aferoj
La Rondiranta Hospitalo de Kin-
juan-gubernio
Ŝanĝoj en Lhasa

La Duonagrokultura kaj Duonlerna
Lernejo en Santajŝan

Ĉiam por la Revolucio
Fidelaj Servantoj de la Popolo
Nuntempa Daĉen-insularo
Tiel Mi Servas al Agrikulturo
Ginggang-monto — la Unua Bazlo-
ko de la Ĉina Revolucio

Kanto al Revolucio
Ĉirkaŭ la Konkursejo
Novaj Rekordoj de la Dua Tutlanda
Sportkunveno

Statistikoj pri la Dua Tutlanda
Sportkunveno

Ĉarkondukisto (Poemo)
Kial Mizeras Landoj en Azio kaj
Afriko?

Ju Pli Batalas, Des Pli Fortiĝas
la Armeo kaj Popolo de Suda
Vjetnamio

Kanto al Revolucio (Bildpaĝoj)
Du Generacioj en la Taĉmento kun
Sovaĝansera Plumo

Antaŭaj Servutuloj — Nunaj Aktoroj
30 Tunojn Peza Aerŝtonego
Post la Kurso

Rano kun Lipharoj (Kuriozaj Bestoj)
Sur Nia Librobreto
Ekzemplo Sekvinda (Inter Ni)

Korespondi Deziras
Sur la dorskovrilo — Nova Ŝoseo
sur la Montaro Tianŝan

Foto de Hju Bang

KORESPONDI DEZIRAS

*Vu van Ha, NN3 Dai hoc kinh te-ke hoach, Hanoj, Vjetnamio. 23-jaraĝa studento, dez. kor. kun gejunuloj k. gestudentoj de Japanio, USSR, Kubo, Germanio, Francio, Bulgario pri lit., muziko, ekonomio k. interŝ. pm. k. esp. librojn k. gazetojn.


*S-ro Hristo Radev, str. "Car Asen I" -9, Kolarovgrad, Bulgario kun gejunuloj el tuta mondo kaj interŝ. bk.

*300 esp-istoj de la Vroclava Esp-Klubo dez. kor. kun tuta mondo. Skribu amase al Pola Esp-Asocio, Wroclaw, str. Dubois 3, Pollando.

*S-ro Konstantin Mikuliĉ, MALACKY 329, ĈSSR, malnova esp-isto, dez. kor. kun pensiulinaj el ĉ. 1..




Graciaj bambuoj ekster Vujoŭ-monaĥejo.



Giganta budho ĉe Lingjun-monto.

Parto de la guberni-urbo Leŝan.



PEJZAĜO DE LEŜAN

Leŝan estas urbo en Siĉuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. La urbo situas ĉe la kunfluejo de Dadu-rivero kaj Min-rivero, kiu estas la ĉefa branĉo de la supra Jangzi-rivero. Dum la sezono de superakvo, Dadu-rivero torentas ĉi tie impete kaj impone. Ĉe la komenco de la 13-a jarcento p. K. oni skulptis ĉi tie gigantan budhon el roko vizaĝe al la rivero. Ĝi estas 12 metrojn alta, kun verto kies rondo estas 3.3 metrojn longa kaj la skulptado daŭris 90 jarojn. Ĝi forte imponas per sia kolosa korpo super la rivero. Sur la monto troviĝas Vujoŭ-monaĥejo, tre vizitinda por turistoj pro siaj kvietaj belaĵoj kaj densa arbaro.

19420

